

KOPIRAJTO
Copyright 1959
POR ĈIA CELO REZERVITA DE
LA AŬTORINO ĈE
KOMUNA KONVERSACIA KLUBO
KOPENHAGO

Vinjeto de Per Lundgreen
Muziko de Marie de Mierre

LA AŬTORINO ESTAS
KIEL LA UNUA DIPLOMITA PER
Argenta Sprono de KOKO
MAINZ, 1958

Presita en Danlando de Logos-Tryk

VIRINO ĈE LA LANDLIMO

DRAMETOJ KAJ SKEĈOJ

de

MARJORIE BOULTON



Eldonejo KOKO
Komuna Konversacia Klubo
Kopenhago 1959

DEDIĈA LETERO

al

JULIO BAGHY

KAREGA PACJO,

Mi dediĉas

ĉi tiun libron al vi, ĉar
je noblaj sentoj vi plej riĉas
inter la tuta konatar! —
kaj noblajn homojn mi ja konas
multajn, kaj ilin amas tre;
sed vi plej korvarmige bonas.
Vi estas ankaŭ korife'
de nia dramo, ĉu sub farbo
de la aktora masko, ĉu
vi sidas sonĝe sub pomarbo,
dramverkas mem por nia ĝu'.
La korpo kaj anim' doloras;
vi vivas en sufer' konstanta;
gajon heroe vi aktoras
en nia vivo esperanta;
lojale, sur scenejo trista,
obeas al la reĝisoro,
la centra forto optimista,
la ena bon' de via koro.
Vi ludis multajn rolojn lerte
en la teatro, la movado,
la vivo, ĉiam am-aserte,
ĉe skribotablo, sur estrado . . .

Ĉar vi elstare eminentas,
libron dediĉas mi omaĝe;

altan homtipon vi prezentas,
 la rolon ludas tre kuraĝe.
 Jes, Prezidanta Moŝt' hungara,
 Jes, Akademiano Baghy,
 tre dece mi genuas. Kara
 Julio, ĉu mi rajtas agi
 filine, diri amikine:
 „Por vi mi sentas multajn amojn
 tre dolĉe nuancitajn; vi ne
 forpuŝu miajn etajn dramojn,
 sed legu ilin indulgeme.
 Vi scias, ke dramaturgi'
 tre malfacilas.“ . . . ?

Ĉirkaŭpreme

salutas

Via

MARJORIE

ANTAŬPAROLO

Mi dediĉis multan tempon al verkado de esperantaj dra-
 metoj kaj eĉ porkomencantaj farsetoj, eble pli kiel esperan-
 tisto ol kiel verkisto. Kial? Unue, ĉar nia literaturo, tiel mi-
 rinde riĉa je poezio, tiel estiminde riĉa je romanoj kaj nove-
 loj, estas eĉ strange malriĉa je dramoj. Kelkfoje mi serioze
 strebis por krei esperantan dramon, kiu meritis lokon en nia
 vera literaturo. La leganto decidu por si mem, ĉu mi suk-
 cesis. Mi estos kontenta, se mi stimulos pli bonajn verkis-
 tojn al verkado de pli bonaj dramoj.

Mia dua motivo estis pedagogia. Por ellerni lingvon, oni
 devas multe legi; kaj por flue paroli, estas pli utile multe
 laŭtlegi. Dramlegado tre helpas en kursoj, kaj la publika
 prezentado de dramo estas utila portempa celo. Tial mi ver-
 kis ne nur por spertaj esperantistoj, kiuj kapablas bone ludi
 seriozajn dramojn, sed por timemaj gekomencantoj, kiuj po-
 vos iom forgesi siajn timojn en simplaj roloj. Ni kutime lern-
 as multon kaj bone fiksas ĝin en la memoro, kiam ni amu-
 ziĝas pere de lingvo aŭ alia studotemo.

Mi ankaŭ kredas, ke amatora dramaprezentado, eĉ dram-
 legado, estas terapie tre valora. Dum ni aktoras, ni forgesas
 nin mem kaj niajn problemojn, ni eksteriĝas ripozige kaj
 eble ankaŭ stimulas nian imagpovon simpatian. Dramaj ek-
 zercoj ofte helpas nin al malstreĉiĝo kaj tiel al pli bona
 mensa sano. Ni civilizuloj iom forgesis ludi, kaj ĉiuj homoj
 bezonas ludon; dramaj aktivoj donas al eĉ la plej laborob-
 sedita konscienco decan pretekston por ludi kaj juniĝi.

Dramverkistoj kutime postulas honorarion por ĉiu pre-
 zentado. Ĉar mi verkis miajn esperantajn dramojn pro Espe-
 ranto kaj pro la movado, mia plej bona honorario estos, ke
 oni uzu miajn dramojn, ankaŭ ke oni aĉetu aliajn esperan-

tajn librojn. Tamen, mi estas normale vantema homo; se iu prezentos dramon mian kaj poste sendos al mi eventualajn gazetraportojn aŭ fotojn, li donos al mi grandan personan plezuron.

Al ĉiuj, kiuj ludos esperantajn dramojn, mi deziras lan-
gojn sennodajn, lumojn perfekte funkciajn, kurtenojn
kiuj fermiĝas glate, aŭdantojn kiuj aprobas manplate, re-
ĝisorojn, kiuj tondros nur private. Al reĝisoroj, mi sendas
mian specialan simpation, kaj esperas ke ili ne verdigos la
tutan atmosferon per sakroj, kiam ses samideanoj sur sce-
nejo ŝajnas dum tempeto esti distriĝemaj elefantoj aŭ bal-
butantaj bubaloj. Mi konas tiujn suferojn.

Dramverkisto devas ludi multajn rolojn; neniu ajn inter
miaj personoj reprezentas min mem. Mi celis variecon laŭ
dramotipo, stilo, temo, personoj. Se iu vorto akcidente ĉa-
grenas iun leganton, mi pardonpetas, kaj esperas ke li tro-
vos konsolon sur alia paĝo.

Mi volas speciale danki tiujn en U. E. A. kiuj proponis,
eblogis kaj aranĝis la Belartajn Konkursojn. Tiuj konkursoj
stimulis kaj kuraĝigis dramverkadon en la movado, kaj la
apenaŭ videbla laboro de la organizantoj helpis al la kreado,
ne nur de mia libro sed de multaj aliaj dramoj.

Sed mi ne plilongigu mian antaŭkurtenan paroladon. Jen
la drametoj: ili utilu al la movado!

Stoke-on-Trent, 1959.

M. B.

VIRINO ĈE LA LANDLIMO

Unuakta Tragedio

(Premio en Belartaj Konkursoj, Marsejlo, 1957)

PERSONOJ:

MARIA, 20-jara

MATEO, 22-jara

FILIPO, 20-jara

SOLDATOJ kaj LANDLIMGARDISTOJ

SCENO:

Sur monteto ĉe landlimo. Se eble, pentrita tolo montru
belan, vastan pejzaĝon kun kamparo kaj vilaĝetoj, sed tio
ne necesas. La monteto estas kovrita per herbo kaj floretoj.
Estas printempo. La suno brilas. Je la komenco de la dramo,
alaŭdo laŭte kantas.

MARIA envenas. Si estas kamparanino en pitoreska regio-
na kostumo.

Maria: Ho kara alaŭdeto! Kantu, kantu!
En tiu brustokreva ĝoj' konstantu!
Kantu kaj malaperu en la sun'
ĉar ankaŭ mia koro kantas nun.
Li venos, jes, li venos, mia kara
denove el la vilaĝet' najbara
Kantu, alaŭdo; trila vivoĝuo
dankpreĝu en la blindiganta bluo!

(Si staras kaj atendas, rigardante dekstren. MATEO envenas
el maldekstre. Li estas kamparano, ankaŭ en pitoreska re-
giona kostumo. Li aspektas tre malfeliĉa kaj kvazaŭ konsu-
mita. Dum momento li rigardas MARIAN per avidaj tortu-

ritaj okuloj. La kanto de la alaŭdo ĉesas. MARIA rigardas la ĉielon.)

Maria: Do, ĉu vi jam elverŝis vian koron?
ĉu jam elkantis vian amadoron?
Jen, jen la birdo falas, plumbopezal

Mateo: Ĉi tie, nun? Ĉu estas vi freneza?

Maria (*turniĝante al li*):
Ne, nur feliĉa! Povra hom', Mateo.
Kial vi sekvas min kun ada veo?
Ne estas mi por vi; mi nur kompatos.
Alian eble vi feliĉe svatos.

Mateo: Mi amas vin!

Maria (*milde*):
Vi volas min posedi . . .
Povra Mateo!

Mateo (*kolere*):
Jes, mi povas tedi!
Vi min premadas nun sub via plando.
Sed mi . . . mi loĝas en la hejma lando,
mi estas hom' honesta, patriotol
Maria, ĉu vi estas idioto?
Ĉu al la propra sekureco blinda?

Maria: Kiel vin helpi, gvidi, kompatinda?
Mateo, mi kompatas; mi sinceru;
mi tre deziras, ke vi ne suferu;
sed mi Filipon amas; jen la fino.
Provu kompreni sorton.

Mateo: Ho, virino
perversa! amo falsa, fia, stultal

Maria (*ankoraŭ milde*):

Vi ne persvados min per vort' insulta!

Mateo: Vi nur celadas vian propran falon!

Maria: Ne, ne, Mate'

Mateo: Rigardu la ĵurnalon!

(*Li montras al ŝi malgrandan kampanan ĵurnalon. Ŝi ek-*
krias angore. Li kvazaŭ triumfas kaj parolas tre laŭte.)

Vidu! Militdeklaro! Luktoj jam!

Maria: Kio okazos nun pri nia am'?

Mateo: Ho, vi virinoj, koroj senrezonaj
pensadas pri aferoj nur personaj!
Finfine ni atakas! Ilin nun
ni lecionos per sufiĉa pun'!
Jen, jen, soldataj kantoj kaj tamburoj!
ni pelos la friponojn! Kiaj kuroj!
Mi soldatiĝos tuj! Al mort' aŭ gloro!

Maria (*preskaŭ svenanta*):

Ho ve, glaciaz gutoj en la koro!

Mateo: Staru, fieru! La patruj' vekiĝas!
Denove en la mondo ĝi prestiĝas!
Nu, venu tuj.

Maria: Mi adiaŭos!

Mateo: Ne, nel
Vi nur obstinas stulte, jes, azene!

(*Li provas fortiri ŝin. FILIPO envenas, el dekstre. FILIPO*
estas alia juna kampano, sed vestita en regiona kostumo,
kiu tre forte kontrastas kun tiu de MATEO.)

Mateo: Diablo!

Maria: Lasu min!

Filipo: Ho ve, Maria!
Jam, jam militas via land' kaj mial

Mateo (*lasante MARIAN, parolas amare*):
Do, adiaŭu! Sed rapidu!

Maria: Ho vel
Ho, kiam mi renkontos vin denove?

(MATEO iras flanken. Li vere volas dece foriri dum kelkaj momentoj; sed li ne povas. Li do daŭre rigardas la geamantojn envie, ĵaluze, turmentite. MARIA, ekplorante, ĵetas sin en la brakojn de FILIPO.)

Maria: Ho, kara, kara! Kial la malpaco?
Cu en la mondo, ne troviĝas spaco
por multaj gentoj, por ideoj multaj?

Filipo: Kara, la homoj povas esti stultaj.
Spite kruelojn de la politiko,
neniam estos vi „la malamiko“!
Ne eblas!

Maria: Kion do ni povas fari?

Filipo: Nenion ajn, kara; nur daŭre kari
ĝis la frenezo ĉesos, lipo tuŝos
denove lipon ame, aŭ ni kuŝos
sur herbo ruĝa, tiu herb' neŭtrala
kiun la homoj tretas Kara, kara!

Maria: Filipino, nun vi estas tro avara!
Eble ni ne postvivos tian krizon;
ni uzu nian tutan kis-provizon;
kelkaj minutoj por feliĉo restas.

(Kisas lin.)

Jen, tiel mian amon mi atestas.

Mateo: Infero!

Filipo (*kisante MARIAN*):
Jen, mi mian! (*rekisante*) Mi konfirmu!

Maria: Dio! per Dia amo, amon ŝirmu!

Filipo: Vi estas mia sola vivovero!
Mi estu civitano de la tero!
La registaroj do batalu mem
kaj lasu nin en nia brakoprem';
sed nel la sanga tajdo nin forportos,
disigos nin

Maria: Plej kara, vi ne mortos!
Mi ne permesos! Estis ni feliĉaj!
Ili ne rajtas Homoj superstiĉaj,
pri flagoj, pri sloganoj, kaj pri mapoj!
Kruelo kaj frenezo en la kapoj!

Filipo: Ho vel! Sed ni, ni havas jam eternan
feliĉon ni nin amis

Maria: Jes, internan
pacon ni havos dum la sanga lukto;
en niaj koroj kreskas vivofrukto.

Mateo: Diable! Kiel tion mi toleros?

Filipo: Ni daŭre amos, kiam ni suferos;
ni fidelados, jes, per amoj spitaj,
kiam ni devos vivi disigitaj,
aŭ eble morti, eĉ.

Maria: Ne, ni ne mortos!
Mi certas nun, ke nia amo fortos

por gardi nin! Ĝi superŝvebos lume
kiel anĝelo! Tamen, tamen, dume
denove kisu min!

(Ili pasie ĉirkaŭbrakas unu la alian. MATEO preskaŭ kon-
vulsias.)

Mateo: Mi ne eltenos!

(Pafoj aŭdiĝas iom malproksime.)

Jen, jen! la tago de justeco venos!

Maria: Ho ve, Filipino, kia aĉa aŭdo!
Antaŭ momento kantis la alaŭdo.
Sed kisu min denove.

Mateo: Mi instigos
landlimgardistojn! Ilin mi venigos!
Nun ĉiuj devos esti zorgaj, pro
la patrolando! Estos mi hero',
kaj tiaj kisoj pikas la okulojn!

(Krias dum li forkuras.)

Ek al batal'! Mortigu la fremdulojn!

Maria: Ho, ĉu Mateo kriis? Povra kor'!

Filipo *(ĉirkaŭrigardante)*:
Ion li kriis nun li estas for.

(Pafoj denove aŭdiĝas.)

Maria: Ĉu oni jam batalas, do, proksime?

Filipo *(ĉirkaŭrigardante)*:
Ne, ŝajne ne videble. Ni sentime
povos paroli dum momentoj kelkaj
pri ĝoj' pasinta, pri espero kaj velkaj

(Ili sidiĝas.)

Ĉu vi memoras tiun etan ponton
ĉe la landlimo?

Maria: Jes, vi trovis fonton,
sekvis la rivereton

Filipo: Ŝaŭmo-boloj
plaĉis al mi, kaj ranoj, kaj primoloj
Sencele kaj feliĉe mi esploris.
Tiam, subite, ankaŭ vi ekfloris,
vi, en najbara lando; kaj mi petis
permeson la gardisto nur ridetis
tiam la homoj estis homaj tie
Sekve, mi enamiĝis plej pasie.

Maria: Kaj preskaŭ tuj, kiam mi vin ekkonis,
tiu printempo bela min ordonis.

Filipo: Tiel feliĉaj, ke ni timotremis.
La teron ni apenaŭ piedpremamis.
La majskaraboj belis kvazaŭ agloj,
fungoj kaj raŭpoj ŝajnis vivmirakloj.

Maria: En la arbar' feliĉis mi ĝissvene,
kaj mi karesis tiun bufon bene;
ĉu vi memoras?

Filipo: Jes!

Maria: Kaj ankaŭ ĉu vi
memoras kiel vi insistis pruvi
amon, per nuda mano deŝirante
rozon por mi? Vi donis ĝin, dirante:
„Jen rozo; delikata la koloro
pli ruĝas tiu sango el la koro
sur mia fingro. Donus mi abundon
por vi“.

Filipo: Kaj vi vi kisis tiun vundon.
Ruĝiĝis vi, paliĝis vi, kaj flustris
„Ho, vi amo tiel sale gustis!“

Maria: Ĉu tion diris mi? Ĉu vere, kara?

Filipo: Jes, vere. Eble tiu gusto mara
spicis la ĝojon de la tagoj! Strange!

Maria: Do, vi sincere amis min korsange!
Tiam la tagoj ŝajnis ĉiuj sunaj.

Filipo: Ho vel! ni estis tiam tiel junaj!
Ni devos ĝisrevidi nun kuraĝe,
la tempo venas por ekvivi saĝe
Ho vel!

Maria: Ĉu vi memoras pri la fragoj
kiujn ni trovis?

Filipo: Kaj la etaj flagoj
kiujn ni interŝanĝis?

Maria: Kaj la brila
kvarco? Feliĉo estas tre facila!
Sed nun

Filipo: Ni ne parolu pri doloro!
En vi, en mi, restados la memoro
pri tiu jar' mirinda. Sub sigeloj
ni gardos ĉion, ĉion, dum krueloj
regos, kaj homoj stultos tiel brue.
Eble trankvilo tamen venos frue,
pli frue ol ni kredas.

Maria: Jes; pro fido
de amo mi nur diros: „Ĝis revido!“
Fidelon kaj esperon nun per kis'
sigelu ni

Filipo: Nur ĝis (*kisas ŝin*).

Maria: Nur ĝis, jes, ĝis
milito forgesigos en pardono. (*Kisas lin.*)

Mateo (ekstere):
Jen, jen la malamiko, la spiono!

(*Unu revolvera pafo aŭdiĝas. FILIPO, kun ne tre laŭta krio, konvulsie premas MARIAN kaj falas, mortante, ankoraŭ tenante MARIAN en la brakoj. MATEO kuras sur la scenejon kun tri soldatoj.*)

Maria (ridante ame):
Kara, vi min sufokas, tenas ŝtale!

(*Subite forŝiras sin, kriegante.*)

Ho Dio! via buŝo gustas sale!

Unua soldato:
Jen la spiono kuŝas sur la tero!

Dua soldato:
Bonege trafis via revolvero
je la distanco!

Maria (kriegante):
Ho, la sang' skarлата!
Parolu, diru vortojn, plejamatal!

Filipo: Marial (*mortas*).

Maria: Jes! Kion vi volas diri!
Jes, mi aŭskultas!

(*Genuas apud li.*)
Ĉu vi povas spiri?
Ne, ne!

(Si volas flegi lin, kaj vidas sangon sur la propraj manoj.)

Ho, rozoj, rozoj tie floras!
Vi plukis rozon! Jes, mi rememoras!
Rozon por mi! Jes, rozoj ruĝas ĉie!
Nur ruĝo! Ruĝaj rozoj! Ruĝpasie!

(Si estas jam freneza pro la ŝoko. Dum la restanta parto de la dramo ŝi parolas delire, malkohere.)

Tria soldato:

Sed la virino estas nia, ĉu ne?

Mateo: Jes.

Maria: Kaj alaŭdo kantis. Ĉio sune
brilegis. Kaj la ŝtonoj, kaj la sprosoj!
Ho, rozoj, rozoj, ruĝaj, ruĝaj rozoj!

Mateo: Maria, venu al la hejmo, tuj!

Maria: Jen rozoj, ruĝaj rozoj sur rozuj'!

(Du LANDLINGARDISTOJ envenas.)

Unua landlingardisto:

Cu la spiono estas tie ĉi?

Unua soldato:

Jes, morta. Ni mortpafis lin. Jen li.

Dua landlingardisto:

Kaj la virino?

Mateo: Nia.

Dua landlingardisto:

Jen komploto!

Unua landlingardisto:

Vi vere agis kiel patrioto.

Mateo: Ne kulpas la virino.

Dua landlingardisto:

Kiu scias?

Rilato kun la malamiko fias.

Mateo: Sed ne arestu ŝin, mi petas! Ŝi
nur amis stulte, blindis pro pasi'.

Dua landlingardisto:

Ni faros nian devon Ni forprenos
tiun kadavron ĝin ni ekzamenos
eble informojn donos ĝi utilajn.

Maria: Mi aŭdis la alaŭdokantojn trilajn!

(La UNUA kaj TRIA SOLDATOJ forportas FILIPON.)

Dua landlingardisto:

Dankon.

(Kaptas MARIAN per la ŝultro.)

Kaj vi, vi estas sub aresto.

(MARIA rezistas dum momento. La UNUA LANDLINGARDISTO helpas sian kamaradon. Subite MARIA cedas al ili kaj rektigas sin digne.)

Maria: Jes, min konduku al la nuptofesto.
Vi havas, ĉu, alian kuglon por mi?
Kun mia edzo nun mi devos dormi.
Benoj kaj ĝojoj, amo kaj ripozo
Jen por la novedzino, ruĝa rozo.
Mi havas rozon en la mano, vidu!
Nu, tio estas nuptofesto; ridu!
Kia vizaĝo! Kiel ĝi amaras!

(Montrante MATEON.)

Kaj jen la bona, pia pastro staras.
Vi benos nin, ĉu ne?

Mateo: Ho Dio, Dio!

Maria: Jen la komenco de la litanio.

Mateo: Jaluzo, kien vi kondukis min!

Maria: Filipino, venas via novedzin'!

Dua soldato:
Mi ne kapablas vidi tion plu.

(Foriras. Pafoj aŭdiĝas, pli proksime ol antaŭe.)

Unua landlimgardisto:
La malamiko!

Maria: Mia festa bru'!

Dua landlimgardisto:
Kiam ŝi trankviliĝos, ŝi konfesos.

Maria: Eternan amon vi al mi promesos,
Filipo; mi vin amas tre, jes, tre!

Dua landlimgardisto:
Ni forkonduku ŝin.

Mateo: Ho ve, ho ve!

Unua landlimgardisto:
Do, venu, bona mia.

Mateo: Ho mizero!

Maria: Jes, ruĝaj rozoj, ĉie sur la tero.
Mi venos kun vi, bonaj homoj, ĝoje.
Ni trovos novajn rozojn nun, survoje.

(Batalbruo nun proksimiĝas, ĝis la fino de la dramo.)

Jes, pruntu vian brakon dankon, dankon,
patreto!

Unua landlimgardisto:
Ĉu ni eble aŭdas tankon?

Dua landlimgardisto:
Jes, tankojn kaj kanonojn. Ni rapidu.

Maria: La sonoriloj sonas! Ridu, ridu!
Aŭskultu, oni festas geedzigon,
oni prihimnas la honoran ligon!
Jen rozoj, rozoj! En la horo bona,
la tuta mondo iĝos rozoplena!

(La LANDLIMGARDISTOJ forkondukas ŝin.)

Mateo: Mi kredis, ke mi amas ŝin. Mi gvidis
ilin ĉi tien, kaj mi ŝin perfidis.
Kaj mi ne sciis kiel malamiko
morta aspektos! Stulta fanatiko!
Vi eĉ ne sciis ami, nek malami!
Vi povis vorti nur, nur melodrami,
vi stulta friponego! Vi ŝin pelis
al freneziĝo! Kial vi kruelis?
Feliĉo vin ofendis! Pro jaluzo
vi kuris al gardistoj kun akuzo
Amanto, patrioto, en duobla
fiero mi min kredis tiel nobla!

*(Li retrovas sian ĵurnalon, duonfreneze disŝiras ĝin, disĵetas
la pecojn, piedpremas ilin.)*

Ho, malbenitaj estu la ĵurnaloj,
kiuj incitas homojn al bataloj!
Dronu en koto, kanajlaĵoj! Fi!

Dum niaj horoj de malam-pasi'
 vi flatas la pasion; vi kredigas,
 ke nobla sinofero nin instigas!
 Vi stampas viajn laŭtajn grandliterojn
 blindigas nin kaj vekas fi-fierojn!
 Dronu en koto! Aĉa trivialo!
 Sed ĉu hodiaŭ kulpas la ĵurnalo,
 nur la ĵurnalo? propagandsistem'?
 Ne! Ĝi frenezas, kaj mi kulpas mem!
 Rozoj de sango ĉie; nur deliro,
 kaj morta estas juna, gaja viro
 morta li blindas, li silentas, surdas
 kaj kiu kaŭzas morton tiu murdas
 kaj murdon oni punas mi, murdinto
 jes mi lin murdis pro ĵaluza blindo
 Kaj iu devos puni min

(La UNUA LANDLINGARDISTO revenas.)

Unua landlingardisto:

Ne staru
 tiel! Vi estas en danĝero! Faru
 ion sagacan jen la malamiko!
 Vin ŝirmu tuj! Forkuru, lunatiko!
 Vi atentigos ilin tie ĉi
 pri nia ejo! Kuru do, simi'!

Mateo: La malamiko venas stranga vorto

(Li duonfalas teren, kvazaŭ pro laceco.)

La malamiko la detruo morto

Unua landlingardisto:

Nu, mi ne restos plu! Estu sagaca!
 Tio ne estas argumento paca!

(Forkuras, kriegante.)

Vin armu! Jen la tankoj, jen invadoj!
 Al la kanonoj! Pretaj kun grenadoj!

Mateo (ŝanceliĝe leviĝas):

La ruĝaj rozoj kreskos ĉie, brue
 Mi ekkomprenis ĉion tro malfrue
 malamon ĉiuj krios nun, alarme

(Pli laŭte.)

Fratoj! Al vi mi kuros nun senarme!
 Mortigu min! mi ne meritas vivi!
 Mi volas sub la tankoj nur pasivi;
 forviŝu min; mi iĝu sanga pulpo,
 kaj ostoj disbatitaj pro la kulpo
 jes, ruĝaj rozoj por la novedzino!
 Venu doloro, venu fino, fino,
 nur fino kaj forgeso! Ho soldatoj,
 murdu nur min, miaj frenezaj fratoj!
 rozoj de morto moku min, surbruste,
 dekoracioj! min mortigu juste!
 Frenezo, frakasado . . . furiozoj
 blindo silento rozoj, rozoj, rozoj!

*(Hurlante kiel besto MATEO ekkuras al la kreskanta bruo,
 dum la kurteno falas.)*

ILUZIO

Unuakta Komedio

(Premio en Artfesto de Brita Esperantista Asocio 1956)

PERSONOJ:

SLAVKO JURKOVIČ, proks. 50-jara; jugoslavo; poeto.

LJUBO GRAHOVAC, proks. 45-jara; jugoslavo; literaturamanto;
intima amiko de JURKOVIČ.

HENRI LEBLANC, proks. 45-jara; franco; literaturamanto.

NILS ANDERSSON, proks. 35-jara; svedo; literaturamanto.

PETER ALLAN, proks. 22-jara; anglo.

SHIRLEY GROSSMITH, proks. 20-jara; anglino.

SCENO:

Kvieta angulo en la ejo de la Interkona Vespero de U. E. A.-Kongreso. Kelkaj festonoj kaj verdstelaj ornamaĵoj pendas sur la muro. Malantaŭe oni vidas longan benkon apud la muro. Pli antaŭe troviĝas tri ordinaraj seĝoj kiel oni kutime vidas en kunvenejo. Estas bone, se la reĝisoro povos sugesti la gajan bruon kaj homamason de tia vespero, ekz. per muziko, malproksima konversacio, glastintado k. t. p.

NILS ANDERSSON, HENRI LEBLANC, LJUBO GRAHOVAC kaj SLAVKO JURKOVIČ envenas. ANDERSSON estas alta, blonda, sana, bonhumora svedo; LEBLANC estas franco, diketa, malalta, portas okulvitrojn; li estas tre inteligenta kaj organizema. Li portas kelkajn librojn sub la brako. GRAHOVAC, jugoslavo, estas alta, okulfrape bela kaj impona, tre bone vestita, ŝatinda viro kun granda societa aplombo kaj vigla menso. JURKOVIČ, renoma Esperanta poeto, estas malalta, tre maldika, malforta, pala, kun sentema kaj inteligenta, sed ne bela vizaĝo; la dekstra maniko estas diskrete alpinglita sur la brusto, ĉar la poeto estas per-

dinta la dekstran brakon. Li nun estas lacega, senaplomba kaj nervema. Li tuj ĵetas sin sur la mezan seĝon; GRAHOVAC sidiĝas apud li.

Grahovac: Ĉu vi fartas malbone, Slavko? Ĉu la koro denove misfaras?

Jurkoviĉ: Tute ne, dankon, Ljubo; nur la amaso kaj la bruoj estis iom tro por mi. Mi ne volis ĝeni vin; sed vere, mi vidas nun, ke mi ne plu taŭgas por kongresoj. Vi tre helpas min, Ljubo, se vi plenumos mian peton.

Leblanc (sidiĝante): Sed, kara Jurkoviĉ, pensu pri via renomo! Via apero finfine en mondkongreso estas sensacio. Oni scias, ke vi ĉeestas, kaj ĉiuj literaturamantoj entuziasmiĝas. Oni deziras, ke vi legu poemojn dum la Arta Vespero; multaj homoj serĉas vin por paroli kun vi; eĉ la plej komencantaj komencantoj konas vian nomon kaj petos vian subskribon; finfine, post tiom da suferoj kaj malfacilaĵoj, nia genia Slavko Jurkoviĉ ĉeestas mondkongreson. La aŭtoro de *Asfodeloj kaj Vinberoj*, de *Stelbrulvundoj*, de *Kantoj el la Mallumo*, de via nova sonetaro — kara Jurkoviĉ, vi ne rajtas kaŝi vin! Mi petegas!

Grahovac: Ne insistu, Henri. Tio ne estas ordinara malkuraĝo aŭ komplimentpostula falsmodesteco. Mi konas la historion. Liaj travivaĵoj inter la faŝistoj — kaj, vere, estas mirakle, ke li iel travivis — ruinigis liajn nervojn, ne nur stumpigis lin.

Jurkoviĉ: Iam mi ĝojis oratori . . . mi hontas pro mia nuna malforto, sed vere mi ne kapablas paroli sur publika podio, aŭ kun multaj nekonatuloj. Oni bezonus tro da klarigoj kaj ekskuzoj.

Andersson (kiu staras post la seĝo de JURKOVIČ, kaj kliniĝas): Mi pasigis la militajn jarojn en neŭtrala lando, kaj

mi povas kompreni, ke tio estas avantaĝo en la post-milita vivo. Pardonu nian postulemon; sed ni tiel deziregas, ke ni dece festu la eventon de via reapero.

Jurkoviĉ: Kara amiko, vi estas ankoraŭ mia bonkora Nils Andersson. Mi tre, tre bedaŭras unue mi sentis min sufiĉe forta, sed nun . . . ne, Ljubo, mi petas vin, pripensu mian proponon denove. Malmultegaj ĉi tie konas min persone; kaj al malnovaj amikoj kiel vi mi ĉiam pretas paroli. Sed ej, mi kvazaŭ ne fortas por alfronti mian propran renomon. Mi ne aspektas tiel, kiel oni atendas, ke poeto aspektu. Jen mi, kripligita, nervema, malbela skeleto! Eĉ mia subskribo ne estas plu la antaŭmilita subskribo, ĉar mi devis lerni la uzadon de la maldekstra mano mi seniluziigos ĉiujn, kiuj renkontos min, eble eĉ malbonfaros al la prestiĝo de nia literaturo mi nun estas karikaturo de mia mem . . . estas pli bone, ke la iluzio restu, ke oni memoru pri la antaŭmilitaj fotoj Sed vi, Ljubo, vi bonege prezentas la vulgaran koncepton de poeto. Vi aspektas romantika, bela, forta. Viaj okuloj fulmas; vi havas agrablan voĉon por deklami; vi ĝuas societon kaj scias konversacii senĝene. Kial vi ne estu Slavko Jurkoviĉ por la publiko kaj donu al ili plezuron?

Grahovac: Mi volonte legus poemojn por vi, sed mi ne estas aktoro.

Jurkoviĉ: Vi ne bezonas esti. Oni ne vidis min en kongreso dum dekkvin jaroj; vi ne bezonas imiti mian voĉon aŭ miajn gestojn; la malmultaj kiuj memoros min bone estas miaj geamikoj, kaj al ili mi ne volas mensogi. Por ludi min, vi havas ĉion bezonatan; ni loĝas en la sama urbo; vi scias pri miaj nunaj libroprojektoj; vi konas multajn miajn poemojn parkere; vi konas miajn opiniojn, post multaj argumentoj! Mi tute ne petas, ke vi ludu min inter

ej: interjekcio milde malaproba.

la Akademianoj aŭ aliaj gekonatuloj; kun ili ni povos aranĝi etan konspiron; ili estas komprenemaj homoj kaj pardonos mian nervmalsanon; sed, kara Ljubo, protektu min kontraŭ la nekonatuloj, la nova generacio!

Grahovac: Do, mi konsentas, se la aliaj helpas min.

Jurkoviĉ: Dankon, dankon!

Andersson: Mi ne volas trudi kongresajn devojn al Slavko, mi vidis tro da rifuĝintoj por ne iom kompreni liajn sentojn; jes. Mi konsentas.

Leblanc: Ankaŭ mi. Sed, Grahovac, ĉu vi estas preta legi poemojn kaj tiel plu?

Grahovac: Jes, tion mi povas facile fari. Konversacio estas multe pli delikata problemo, sed mi faros laŭ mia eblo.

Jurkoviĉ (premante lian manon): Koran, koran dankon, kara mia!

Grahovac: Nenio dankinda! Nur malgranda procento, kontraŭ la oferoj kiujn vi faris por la patrujo kaj por la mondo — ej, ne eklarmu, diablo!

Andersson: Nu, ni devas pripensi la praktikajn problemojn. (*Li parolas kun larĝaj gestoj, indikante, unue, GRAHOVAC.*) Vi estos Slavko Jurkoviĉ, la renoma poeto. Via kongresnumero estos 397. Mi devos tuj mencii nian konspireton al la K. K. S. kaj la Prezidanto, antaŭ ol ili faru ian embarasan anoncon. Kaj al la aliaj aranĝantoj. Tion mi faros. Kaj vi, Slavko, kiu vi estas? Vi devos havi nomon, kaj ne, kiel hundo, respondi al fajfo aŭ al hej!

Grahovac: Mi kredas, ke la plej simpla solvo estas, ke li reciproke pruntu mian nomon. Mi ne estas konata, kaj malofte ĉeestas kongresojn.

Andersson: Do, bone, vi estu Ljubo Grahovac. Almenaŭ ni tiel ne havos komplikajojn pri nacieco. Estus tro konfuze, se jugoslava poeto hazarde faligus sian italan pasporton aŭ krokodilus france!

Leblanc: Kaj kiam oni demandas, Ĉu vi konas la poeton Jurkoviĉ? mi diros, Jes, jen li. *Fingromontras GRAHOVAC*). Kaj se oni diros, Kiu estas la alia viro, la malpli alta? mi diros, Ho, neniu ajn grava; mi kredas, ke estas iu Grupokato aŭ Gripopako aŭ io.

Grahovac: Kanajlo! — Sed jes, jen la metodo. Bonege, nun Slavko ridetas.

Andersson: Nu, mi foriros tuj por klarigi al K. K. S. kaj al la aliaj grandaj nuksoj pri la kerno de la afero. Kaj vi ĝuu la kongreson trankvile. Kaj estu feliĉa, Slavko, ni tre, tre amas vin.

Grahovac: Dankon!

Andersson: Ne vi, idioto!

Grahovac: Mi nur provludas. (*ANDERSSON foriras*). Nu, mi estas Slavko Jurkoviĉ, kiu verkis *Stelbrulvundoj* kaj *Kanto el la Mallumo* — Sankta Salamandro, se mi nur kapablus tiel verki! Mi donus mian dekstran brakon por — diablo! pardonon! forgesu tion! Nu, vi volas, ke mi skribu ion en via libro, sinjorino? Plej volonte. Pri neologismoj, estimata sinjoro? Jen demando, al kiu oni ne povas respondi dum kvin minutoj.

Jurkoviĉ: Bonege!

Leblanc: Ĉu doktoro Privat staras tie? Mi urĝe bezonas paroli kun li. (*Leviĝas; sed, forirante, li renkontas SHIRLEY GROSSMITH, beletan, modestan, timeman anglinon. Ŝi estas en embaraso, sed junulina amo kuraĝigas ŝin.*)

Shirley: P-pardonon, sinjoro, mi ne volas ĝeni vin . . .

Leblanc: Bela knabino neniam kapablas ĝeni min. Kion vi deziras, samideanino?

Shirley: P-pardonon, sed vi estas Akademiano Leblanc, ĉu ne?

Leblanc: Jes, tion mi konfesas!

Shirley: Ĉu vi povas eble d-diri al mi, kie troviĝas Slavko Jurkoviĉ, la poeto?

Jurkoviĉ (*flustre al GRAHOVAC*): Mi lasos vin sola, kaj revenos (*Foriras*).

Leblanc: Kiel feliĉe, fraŭlino, ke vi demandis al mi nun, kaj ne antaŭ kvin minutoj! Sinjoro Jurkoviĉ sidas tie, sur la seĝo . . . jen. Alparolu lin sentime; li estas tre bonkora. Pardonu min, mi havas urĝan komisionon! — Ej, kien doktoro Privat nun forflugis? (*Rapidas for, kun grimaco al GRAHOVAC*).

Shirley (*al GRAHOVAC, tre timeme*): Ĉu, sinjoro, vi . . . e ĉu ? ĉu ? ĉu ? ĉu (*glutas.*)

Grahovac (*afable*): Ĉu vi volas ludi lokomotivojn kun mi? Nu, ĉu mi povas helpi vin?

Shirley: Vi estas Slavko Jurkoviĉ, ĉu ne?

Grahovac: Jes.

Shirley: Mi estas en t-terura embaraso mi senpense impertinentis pri vi, sinjoro

Grahovac: Ĉu vere? Vi ne aspektas kiel recenzistino!

Shirley: Mi n-ne scias, ĉu mi povos klarigi

Grahovac: Sidiĝu kaj provu.

Shirley (*sidiĝante apud li*): D-dankon, sinjoro Jurkoviĉ. Mi terure hontas. Mi - e - pretendis koni vin p-personel P-por ke . . . por ke . . . por ke . . .

Grahovac: Nu, ne tiel terure porke, knabino, se tio estas la sumo de viaj pekoj! Tre bagetela krimeto. Kaj nun vi ek-konas min persone; do, via mensogeto komencas veriĝi! Kaj ĉu vi konas miajn verkojn? Ĉar se jes, vi ja konas la plej interesan parton de mi. (*JURKOVIC revenas; rimarkante ke la konversacio povas esti interesa por li, li sidiĝas sur la benko kaj restas tre senbrua.*) Se vi bone konas miajn verkojn, vi konas min persone. Alie, mi estas tre ordinara persono.

Shirley: Mi tre ŝatas vian poezion. — Ĉu estas al vi ĝene, ke oni laŭdu viajn verkojn?

Grahovac: Tute nel

Shirley: Mi mensogis, kiam mi diris, ke mi konas vin; sed mi vere ofte volis vin renkonti, sinjoro Jurkoviĉ, por diri kiom viaj poemoj plaĉas al mi. Ekzemple, via *Beroj* . . .

Grahovac:

„L'arbustoj sangas pro la skurĝa puno
de la kruelaj ventoj de l' aŭtuno . . .“

Shirley: „La sangogutoj brilas, rondaj, pezaj,
kvazaŭ sur sinvipantoj pentfrenezaj . . .
sur nigraj membroj tiu sango gutas,
spite la vundojn, la arbustoj mutas . . .“

Grahovac:

„Sed, en la beroj, loĝas jam la semo
de renaskiĝo post la vintra premo . . .“

— Jes, mi vidas, ke vi vere konas ion de mi. Mi dankas al vi pro viaj afablaj vortoj.

Shirley: Sed mi v-venas al vi kun granda, honta peto.

Grahovac: Petu do.

Shirley: Mi vojaĝis el Anglujo kun juna viro, studento, kaj . . . kaj . . .

Grahovac: Kaj vi ekplaĉetis unu al la alia, ĉu?

Shirley: Li estas tre sincera, tre inteligenta . . . kaj mi volis . . . e . . . iom imponi al li . . . ĉar mi ne estas samnivele klera kiel li . . . kaj nun mi vere hontas pri mia stulteco . . mi pretendis koni vin, altestimata, korespondi kun vi . . . kaj li estas mem verkisto, kaj tre volis renkonti vin por paroli kun vi . . . tial mia mensogo tre helpis nian amikecon . . . kaj nun li petegas, ke mi prezentu lin al vi, kaj mi ne scias kion fari! Mi tiom volas plaĉi al li kaj igi lin feliĉa!

Grahovac: Mi komprenas. Ej, vi estas kanajlino . . . vi devus scii, ke mensogoj neniam prosperas . . . sed vi estas tre komprenebla kaj simpatia kanajlino . . . kaj se oni vipus min pro ĉiu friponaĵo mia, mia propra dorshaŭto ne estus en tre bona ordo. Eĉ mi povas ja mensogi pro bona motivo . . . Nu, kara mia, mi kredas, ke unu malgranda ekstra poento en mia ĉisemajna porcio da mensogoj ne detruos mian animon. Iru trovi vian junan amikon; prezentu lin al mi; mi parolos afable al li . . . kaj se mi tiel povos helpi al simpatia juna paro, mi pardonos al vi vian misfareton!

Shirley: Vi multe pli faras por mi, ol mi meritas. .

Grahovac: Ne, ne . . . ne dankinde . . . kaj via nomo? Se ni korespondadis, mi probable konas vian nomon.

Shirley: Shirley Grossmith (*forkuras*).

Grahovac (*kun neangla prononco*): Shirley Grossmith.

Shirley, mia amikino . . . Ejl (*Al Jurkoviĉ*) Ĉu mi ludas bone?

Jurkoviĉ: Jes, tre. Simpatia knabino! Multaj homoj volas paroli kun verkistoj, sed malpli multaj vere ŝatas la verkojn, aŭ komprenas ilin. Estas interese ŝtelaŭskulti parolon destinitan al si mem! Kaj, kvankam mi ja estis nematura kiam mi verkis tiun *Beroj*, kaj nun verkus pli koncize, la metaforo ankoraŭ plaĉas al mi Ĉit!

(*Rigardas sian kongreslibron; prinotas diversajn aferojn. SHIRLEY revenas kun PETER ALLAN, juna angla universitata intelektulo de la plej egoista, nematura tipo. Lia unua diro al SHIRLEY estas preskaŭ formulo sen-emocia.*)

Allan: Vere, Shirley, vi estas tre kara karulino, kiu faras ĉion por mi.

Shirley (radiante): Mi treege ĝojas, ĉar mi povas helpi . . . Sinjoro Jurkoviĉ!

Grahovac (leviĝante): Ha, estas mia eta Shirley el Anglujo denove; mia poeziamanto! Kaj ĉu vi alkondukas vian amikon?

Shirley: Jes, sinjoro Jurkoviĉ; ĉu mi rajtas prezenti mian amikon Peter Allan, ankaŭ el Anglujo? Li volas verki, kaj tre admiras vin.

Grahovac: Iu ajn amiko de Shirley estas mia amiko; bonan tagon, sinjoro Allan.

Allan: Bonan tagon, sinjoro Jurkoviĉ; mi dankas vin pro via afableco. Ĉu ni povas iom interparoli pri literaturaj aferoj?

Grahovac: Volonte. Ni sidiĝu. (*Sidiĝas sur la meza seĝo. ALLAN sidiĝas apud li, tute ne atentante SHIRLEY.*) Kaj vi, Shirley, vi tre amas la literaturon . . . (*indikas la*

alian seĝon. SHIRLEY sidiĝas. Poste, dum la konversacio, ŝi rigardas ALLAN kun naiva, junulineca amo, kiu malrapide evoluas al doloro, seniluziĝo kaj humiliĝo.)

Allan: Mi havas en la poŝo kelkajn manuskriptojn, pri kiuj via opinio estos tre utila al mi. (*Elpoŝigas paperaĵojn*). Eble vi povus konsili min, al kiu eldonisto mi sendu ilin mi ne volas perdi la tempon ĉe netaŭgaj eldonistoj . . . aŭ ĉe tiuj, kiuj ne pagas. (*GRAHOVAC ĝentile rigardas la poemojn. Lia vizaĝo indikas, ke li ne trovas la verkojn tre bonaj, sed li penas, resti afabla.*) Pro tiaj celoj mi serĉis vin; mi esperas, ke via intereso kaj influo puŝos min antaŭen. Ĉu vi povas rekomendi al mi redaktorojn kaj eldonistojn, kiuj bone pagas? Kaj kiuj esperantaj gazetoj meritas, ke mi legu ilin por studi la plej bonajn metodojn por esti akceptata?

Grahovac (rigardante verkon): Tre interesa

Shirley: Peter, ĉu . . . ?

Allan: Kompreneble, vi estas tiel sperta aŭtoro, ke vi povos konsili min, kaj tiel mi ne perdos mian tempon. Ho, kaj mi havas alian ideon.

Shirley: Peter

Allan: Vi vidas mian manuskripton . . . sed tio estas nur parto de la verko, specimeno, kompreneble. Ĉu vi eble skribos antaŭparolon? Mi estus tre dankema. Ĉiuj aĉetos libron kun antaŭparolo de vi.

Grahovac: Eble. Mi devos unue tralegi la manuskripton; alie mi ne scios kion diri pri vi.

Allan: Ho, ne necesos tralegi la tuton, se vi estas okupita; kelkaj laŭdaj vortoj de vi sufiĉos. Kaj mi havas alian ideon pri kunlaborado, sed tio devos esti treege konfidenca,

sinjoro Jurkoviĉ. (*Ĉirkaŭrigardas kaj vidas la veran poeton.*) Ĉu ni povas iri eksteren — ien, kie neniu scivolemulo ŝtelaŭskultos?

Grahovac (*penante regi fortan agacosenton*): Se vi volas. (*Ĉiuj tri leviĝas; GRAHOVAC kaj ALLAN komencas foriri.*)

Allan: Mi kredas, ke mia plano alportos monon kaj renomon ambaŭ. Vi pruntu vian nomon, kaj mi . . .

Shirley: Peter . . .

Allan: Momenton; ni devas diskuti ion konfidence.

Shirley: Mi komprenas; mi ne ĝenos; sed, Peter, kiam mi retrovu vin?

Allan: Ho, iam, iam; ne sekvu min kiel ŝafino; ni renkontiĝos ie dum la kongreso; tute ne gravas. Ĝis la! Nu, sinjoro Jurkoviĉ, mia propono estas, ke vi pruntu vian nomon, por vendigi . . . (*Ili eliras. SHIRLEY, kiu kredas sin sola, malfeliĉe postrigardas ilin.*)

Shirley: Ho, Peter! . . . Kaj mi k-k-kredis . . . kaj permesis al li k-kisi min . . . Ne, mi ne devas p-plori. (*Purigas la nazon.*) Mi mem eraris . . . sed kial li tiel hipokritis? — Mi devos esti p-pli saĝa! (*Kaj nun ŝi vere ploras. JURKOVIC venas al ŝi, kliniĝas super la seĝodorso kaj komencas karesi ŝian kapon.*)

Jurkoviĉ (*simpatie*):

„Sed en la beroj loĝas jam la semo de renaskiĝo post la vintra premo; kiam la sangogutoj branĉojn trempas, tiam la estonteco jam printempas, kaj, el la ruĝa sango de doloro, kreskos la rozo, la somera floro;

arbustoj nigras; larma pluvo bruas, sed nun, eĉ nun, l' arbusto evoluas . . .“

Shirley (*rigardante lin dankema tra larmoj*):

„Nekomprenataj leĝoj ja ordonas tion; kaj ĉio ciklas kaj sezonas . . .“

Jes, mi komprenas. Kaj kiu vi estas?

Jurkoviĉ: Kongresano . . . Mi vidis, hazarde — pardonu min! — tiun malbelan epizodon. Tiu junulo ekspluatis vian simplan koron! Diablo! ni viroj povas esti stulte senkoraj . . . sed, kedu min, kara, li trafos lecionon. Mi konas sinjoron Jurkoviĉ tre bone, kaj li kutime volas esti kuraĝiga al junaj verkistoj; sed mi povas ĵuri al vi, ke nun lia piedo jukas pro dezirego bone trafi lian . . . e . . . li tre malŝatas homojn, kiuj nur volas utiligi aliajn.

Shirley (*penante regi sin*): Jes. Peter volis ŝajne . . . nur utiligi min . . . kaj nun mi ne estas plu interesa . . . kaj mi kredis . . . li igis min kredi . . . ke li amas min . . . aŭ ekametas min . . .

Jurkoviĉ (*ankoraŭ karesante ŝian kapon*): Forgesu lin, kara knabino; li ne estas inda je via koro.

Shirley: Sed mi mem . . . mensogis stulte por plaĉi al li.

Jurkoviĉ: Jes, por plaĉi al li . . . kaj li mensogis al vi por ekspluati vin. Mi rimarkas malsimilecon. Tiu via Peter ludis amon trompe . . . kaj tio estas grandega blasfemo kontraŭ la vivo — nur por profeti de via helpemo. (*SHIRLEY denove ekploretas.*) Nu, kion frakasita mezaĝulo kiel mi povas fari por konsoli vin? Mi volus ĉirkaŭpremi vin kaj dolĉe alparoli vin; sed ho ve! Neniam plu mi ĉirkaŭpremos knabinon. Ni vidu kion ni povas fari per nur unu ĉirkaŭpremilo, ĉu? (*Li sidiĝas flanke de SHIRLEY kaj ĵetas la maldekstran brakon ĉirkaŭ ŝiajn ŝultrojn.*) Nu,

kion mi diru por konsoli vin, mia knabino kun la pura ju-
na koro?

Shirley (subite): Kaj mi . . . mi ploras pro knabo, kiun mi
konis nur dum kelkaj tagoj, kaj vi, vi perdis brakon . . .
kiel stulta kaj malforta ŝajnos al vi mia plorado!

Jurkoviĉ: Kara mia, nur malprofundaj kaj kruelaj animoj
piridas la dolorojn, kiujn ili jam postvivis. Mi konas vian
doloron. Mi ne malestimas ĝin; mi nur bedaŭras, ke dum
via printempo vi devis trovi senkorulon!

Shirley: Vi estas tre bona, tre komprenema . . . Mi sentas
min terure malsaĝa. Mi ekamis lin tro frue, kaj . . . kaj
ĉio estas nur idiota iluzio!

Jurkoviĉ: Kara knabino, ĉiu amo estas, parte, iluzio. Ĉiu
homo, kiu amas, vidas en la amata persono belajojn, nob-
lajn ecojn, pli abunde ol tiaj ecoj fakte troviĝas. Oni diras,
ke Dio de Amo estas blinda; kaj la dezirego trovi vivku-
nulon ja ofte blindigas nin. Sed eble, vere, ni blindiĝas
per troa lumo, ĉar, kara mia, tiu iluzio, tiu blindeco, estas
la plej sankta afero, la plej nobla evoluigilo, la plej pura
plezuro kiu ekzistas en tiu ĉi dolorplena, egoismoplena
mondo. Amo komenciĝas per iluzio, jes; sed homoj,
kiuj vere scias ami, finfine scias, ke tiu iluzio kondukas
nin al la plej profunda realo de niaj animoj. Iam vi certos
pri tio, ĉar vi havas ameman koron; sed vi ankoraŭ ne tra-
fis vian veran amon.

Shirley: Tio do ne estas stulta afero, sentimentalaĵo, ĉu?

Jurkoviĉ: Nepre ne. Mi mem, kara, mi estas tiel aĝa, ke jes,
mi rajtas karesi vin, kaj vi pensas pri mi kiel pri patro, ĉu
ne? Mi, pro la milito, tio estas, pro homa malamo, estas
ruino. Sed ie en la ruino vi povus ankoraŭ trovi rozĝarde-
non; kaj eble, ĉiuprintempe, kelkaj asfodeloj rekreskas en

la tretita herbaro. Ne, Shirley, bedaŭru pri malbona elek-
to, bedaŭru pri la eraro de via nesperteco; ploru pro viaj
suferoj, se vi volas, sed neniam, neniam dum via vivo, be-
daŭru aŭ ploru ĉar vi amis . . . aŭ amas . . . aŭ amos
denove . . .

Shirley: Kiel bele kaj konsole vi parolas! Mi povus preskaŭ
kredi, ke ankaŭ vi estas poeto! Mi penos esti kuraĝa . . .
tio vere estis eraro . . . eble mi eraris, ĉar ĝis nun mi vivis
tro solece.

Jurkoviĉ: Tre eble. Esperanto nun donos al vi multajn ge-
amikojn. Eble mi mem skribos al vi iam post la kongreso;
kio estas via kongresnumero?

Shirley: 1.764.

Jurkoviĉ: 1.764. (*Prinotas ĝin.*) Bone. Iam mi sendos al vi
leteron, kiu estos eta surprizo por vi.

Shirley: Vi tre bonfaris al mi; mi estas dankema. Nun mi vo-
las fari ion saĝan, konstrueman . . . eble mi iros aŭskulti
prelegon morgaŭ matene . . . mi enlitiĝos frue hodiaŭ . . .
Koran, koran dankon. (*Ili manpremas. JURKOVIĈ su-
bite kisas ŝian vangon amike.*)

Jurkoviĉ: Ĝis la, mia angla knabineto. (*SHIRLEY foriras.
Post paŭzeto GRAHOVAC revenas, sola, grandpaŝe, en
tre malbona humoro.*)

Grahovac: Ĉu la junulino jam foriris? — Eble des pli bone!
Kia mizera egoisto kaj cinikulo! Amiĉjo, mi esperas, ke mi
ne detruis vian reputacion pri afableco kaj toleremo; sed
tiu ulaĉo vere kolerigis min! Mi ĵus eksplodis per mia
plena opinio pri li. Kia specimeno!

Jurkoviĉ: Jes, vi lasis ĉe mi la plej bonan parton de tiu paro,
naivan knabinon, sed esence promesplenan kaj bonkoran.

Mi tre ĝojas, ke finfine vi donis bonan lecionon al tiu sintrudema, aroganta knabo.

Grahovac: Jes, lecionon . . . sed bedaŭrinde mi ne bridis min, ne restis ĉe la vorta stadio . . . finfine li komencis iĝi rekte kaj malkaŝe ofenda, kaj mi . . . ej, mia temperamento! mi renversis plenan bierglason sur la kapon de tiu sinjoro!

Jurkoviĉ: Ej! — Sed mi ne povas malĝoji. Mi estus povinta renversi tutan bierbarelon sur lian kapon! (*Mediteme.*) Tamen, en medio de sankta harmonio, en familia rondo, eble ne tre taŭga agmaniero!

Grahovac: N-ne. Konsentite. Ho, tiu hundido! — Mi ĉirkaŭpromenos por trankviligi min iomete! *Foriras. Preskaŭ tuj, PETER ALLAN revenas, sekigante la kapon per naztuko, kaj tre kolera.*)

Allan: Ĉu vi vidis tiun Jurkoviĉ? Ĉu li venis tien ĉi?

Jurkoviĉ: Jes.

Allan: Kie la fripono nun estas, do? Mi intencas procesi kontraŭ li pri neprovokita atako! Li publike ofendis min, renversante bierglason sur mian kapon! Kie estas tiu Jurkoviĉ?

Jurkoviĉ (subite kun nova aplombo kaj fiero): Mi estas Slavko Jurkoviĉ. Kion vi deziras ĉe mi?

Allan: Vi ne estas Jurkoviĉ; li estas alta, granda homo, kun laŭta voĉo! Li atendu, ĝis mi denuncu lin!

Jurkoviĉ (severete): Sinjoro Allan, mi ne kutime mensogas. (*Proponas sian pasporton.*) Estu tiel bona, kontroli ĉi tion kaj konvinki vin pri mia idento. (*ALLAN malafable prenas la pasporton, kontrolas, kaj redonas ĝin.*)

Allan: Do, iu krimulo ludas vin trompe . . . kaŝas sin sub via nomo! Mi serĉos lin ĉie, mi denuncos lin, mi . . .

Jurkoviĉ: Momenton, sinjoro Allan. Mi mem scias, ke bona amiko mia ludis mian rolon, por protekti min kontraŭ trudemuloj, ĉar mia sano estas malbona. Se vi faros ion ajn kontraŭ li, mi eble klarigos al multaj, kiel vi ludis la rolon de juna amanto, por havigi al vi intervjuon kun mi — kaj mi kredas, ke poste vi havos la pli nigran reputacion. (*ALLAN estas konsternita.*) Vi estas egoista specimeno, ĉu ne? Vi ĉagrenas bonkoran, naivan knabinon; vi parolas al verkisto — aŭ vi kredas, ke vi parolas al li — kvazaŭ li devus esti nur via ilo . . . poste vi kverelas kontraŭ li . . . kaj vi plendas, ĉar li nur ĵetis iom da biero sur vian kapon! Mi estus eble ĵetinta ankaŭ la glason mem!

Allan: E. . . . e. . . . e. . . .

Jurkoviĉ (pli milde): Mi ne kutime parolas tiel al la homoj, precipe ne al junaj homoj. Ni devas multon pardoni al la junaj homoj, ĉar por ili la vivo vere estas dolora enigmo. Pardonu min; eble mi parolas al vi tro severe. Sed mi petas, ke vi pensu iom pli sincere, antaŭ ol vi faru ion kontraŭ tiu sinjoro.

Allan: E. . . . e. . . . Eble. (*Foriras, hontema kaj senaplomba.*)

(*HENRI LEBLANC revenas.*)

Leblanc: Kiel fartas la ludo? Mi ne povis ĝis nun alparoli la Prezidanton; muro el homoj forbaras min! Sed mi parolas al li kiel eble plej baldaŭ. Andersson jam parolis al K. K. S. kaj li promesis silenti . . .

Jurkoviĉ: Mi ne volas, ke vi aŭ Andersson parolu al la Prezidanto.

Leblanc: Kara Slavko, kio okazis al vi? Via okulo brilas, via voĉo fortiĝas . . . Mi tre ĝojas . . .

Jurkoviĉ: Mi estas mi mem denove, Henri! Mi venos kun vi por trovi la aliajn! Poetoj ja povas esti utilaj, eĉ se ili havas nur unu brakon kaj aspektas kiel portreto de la Malsato! Mi estas mi denove! Hej! Kaj mi legos poemojn por vi, Henri, se vi volas . . . ampoemojn, militpoemojn, eĉ poemojn pri la espero!

Leblanc: Mi ĝojegas! Kara mia! Kiu donis al vi tian lecionon?

Jurkoviĉ: Mi kaŝaŭskultis min mem, dum mi donis tiun lecionon al alia! Iluzio, iluzio . . . sed mi ridis . . . kaj mi simpatiis . . . kaj knabino dankis min pro spirita helpo . . . Neniu ajn ludu min . . . nun mi ludos min mem . . . mian veran mem . . .

(Ili foriras, parolante, dum la kurteno falas.)

ĈE L'AKVO DE FORGESO

Poezia Dramo

(Premio en Belartaj Konkursoj, Bolonjo, 1955)

Por Karola Rossetti kaj Ljuba Lapenna

PERSONOJ:

LA GARDISTOJ DE LETEO

EŬRIDIKO

ORFEO

SCENO:

Hadeso. Senkolora mondo. Malvarma, blueta lumo. Sur la fono ni vidas nigrajn, senfoliajn arbojn, kiuj ne moviĝas. Maldekstre, la du Gardistoj de Leteo sidas sur digeto kovrita per preskaŭ nigra herbo. Ĉe la piedoj de la unua staras nigra pokalo. La Gardistoj de Leteo estas nigre vestitaj en longaj grekstilaj roboj, kun manteloj, kaj ili portas nigrajn okulmaskojn. Ili parolu kaj gestu kiel eble plej maŝinece, sensekse kaj nehome.

Gardistoj de Leteo:

Ni estas neo.

Ni estas seno,

jen malkreo,

jen reveno.

Ni estas seno,

ni estas neo,

jen la sereno

de Leteo.

Rivero fluas

en Hadeso

en nigra kreso
sed ne bruas.
Ni estas neo,
jen maljeso,
jen forgeso,
jen Leteo.

Ni estas Neo,
finfina Fino,
jen malgeo
por vir' kaj ino;
jen Leteo,
jen forgeso;
ni estas neo
kaj regreso.

(Angora kriego de virino aŭdiĝas.)

Dua Gardisto:

Nova animo venas, laŭ fatalo.

Unua Gardisto:

Mi pretas; preta staras la pokalo.
Venu l' animo fremda.

Dua Gardisto:

Ne — kontraŭel
Mi konas ĝin. Mi vidis ĝin antaŭe.

Unua Gardisto:

Antaŭe? — Kiel?

Dua Gardisto:

Venas Eŭridiko;
la edzo ŝin aĉetis per muziko;
eksmorta, ŝi transiris Stiksan bordon,

renversis faton kaj la kosman ordon,
forĝesis la forgeson de Leteo,
savita per la kanto de Orfeo.

(EŬRIDIKO envenas dekstre. Ŝi aspektas preskaŭ normale homa. Ŝi portas grekan virinan robon, palroz koloran; ora rubando ligas ŝian hararon. Ŝi tenas floron en la mano. (Sovaĝa rozo tre taŭgas, sed iu ajn bela sovaĝa floro sufiĉas.) Kiam ŝi aperas, la sceno iom heliĝas. EŬRIDIKO senespere kaj fikse rigardas dekstren, dum la GARDISTOJ parolas.)

Unua Gardisto:

Sed la muziko ne tre longe fortis.
Eksmorta, ŝi revenas; ŝi remortis.

Dua Gardisto:

Kontraŭ la radturniĝo de la Fato
potencas nek muziko nek Amato.
Ĉio okazas, kio plej konvenas.
Ŝi iris; jes; sed vidu, ŝi revenas.

Unua Gardisto:

La nigra reĝ' eltrovis la kondiĉon,
kiu detruos tian rab-feliĉon.
Tion atendis mi. L'amanto ardis,
kontraŭ kondiĉo, frue ŝin rigardis,
ŝin perdis.

Dua Gardisto:

Dua morto tuj ŝin frapis.
Bone.

Unua Gardisto:

Neniam vere ŝi eskapis.

(EŬRIDIKO finfine ĉesas rigardi dekstren; ŝi ekrigardas la GARDISTOJN kaj parolas plorante.)

Eŭridiko: Revidi lin, remorti — ho angoro!
Nenio restas, krom la tera floro,
kiun mi plukis kiel memorilon,
kiam mi perdis la vivantan brilon
de l' tero ĉe la limo de l' infero.
Orfeo! Ho karega! ho mizerolo!

Unua Gardisto:
Jen fino de la kontraŭleĝa rabo!

Eŭridiko (*tre ameme, sed angore*):
Orfeo! Ho, senpacienca knabo!
Ho kara, kara, kara mia edzo!
Ho, kara eĉ en fuŝo kaj stulteco!
Ho, kara! — Kiel inoj rajtas plendi?
Viroj ne tre kapablas por atendi.
Ho, kara! vi ne povis. Mi komprenas.

Unua Gardisto (*moke*):
Saluton, Eŭridiko. Vi revenas.

Eŭridiko: Jes.

Unua Gardisto:
Kaj vi ne plu kisos, ne plu kveros.

(*Paŭzeto. La mokemo de la GARDISTO kvazaŭ stimulas EŬRIDIKON al defio. Ŝi videble penas regi sin.*)

Eŭridiko: Tamen, mi ne ankoraŭ senesperos. (*Ŝi sidiĝas.*)

Unua Gardisto:
Vi du ne povis venki vian sorton.

Eŭridiko: Ankaŭ Orfeo iam trafos morton.

Dua Gardisto:
Nepre. Kaj jen la fino de l' rakonto.

Eŭridiko: Ne. Se Orfeo estas ja mortonto,
kiel li estas, sur la certa vojo
mi lin atentos, en humila ĝojo.
Virinoj pli kapablas por atendi.
Mi paciencos. Devos li descendi.

(*La GARDISTOJ DE LETEO ridaĉas nehome kaj metale.*)

Eŭridiko: Ni vivas aŭ malvivas laŭ fatalo.
Vivo, malvivo, estas nur detalo.
Nun mi akceptas; ni ekzistu sune,
lune, senlume; sed ni restu kune.

Unua Gardisto:
Vi miskomprenas.

Dua Gardisto:
Ne naive stultu.

Unua Gardisto:
Leĝoj vin ligas, ino.

Dua Gardisto:
Jes, aŭskultu.

Unua Gardisto:
Vi volis venki faton, malhumile.

Dua Gardisto:
Vi lin revidos, jes; sed senutile.

Unua Gardisto:
Kiel vi amos lin sen viva karno?

Eŭridiko: Spiritoj eble amos dum eterno.
Surtere, eĉ, nin ligis mensa ligo
malpli kaprica ol la korp-instigo.

Unua Gardisto:
Vi estas morta nun, ne plu edzino.

Dua Gardisto:

Sciu: jen punkto! jen la fina fino!

Eŭridiko: Li mortos; do, li venos; kaj mi sidos
ĉi tie, ĝis Orfeon mi revidos.

Unua Gardisto:

Sed, dum li ne ĉeestas, ĉu vi ne
sentas doloron akran?

Eŭridiko: Ve, ho vel

Tamen, suferos mi en pacienco:
li venos, mia sola rekompenco.

Unua Gardisto:

Pa! Inoj mortaj, same kiel vivaj,
ŝajnas ankoraŭ blindaj kaj naivaj,
rifuzas eĉ gustumi l' akran veron,
pacigan kaj majestan senesperon.
Viaj doloroj estas nur la vanaj
esperoj, la turmentoj plej tiranaj
de l' homa viv': alfrontu la realon;
ne plu suferu: prenu la pokalon.

(Li prezentas al EŬRIDIKO la nigran pokalon.)

Trinku denove el eterna Neo;
senesperigu; trinku el Leteo.
Tero kaj via tera amo foros,
kaj via kor' neniam plu doloros.

*(EŬRIDIKO etendas la manon por preni la pokalon, sed
vidas la floron, kiun ŝi ankoraŭ tenas.)*

Eŭridiko: Mi pensis pri perfido, eta floro;
Nel en mizero sanktu la memoro!

(Ŝi rifuzas la pokalon.)

Dua Gardisto:

Trinku; forgesu; tio vin konsolos.

Eŭridiko: Se mi ne volas?

Unua Gardisto:

Vi tre baldaŭ volos!

Eŭridiko: Forgesi ĉiun elokventan tuŝon
de liaj manoj? — lian dolĉan buŝon?
la brakopremon, kiu tiel ravas? —

Unua Gardisto:

Kisojn en nia lando ni ne havas.
Forgesu, aŭ, spirito jam sensenta,
vi vagos en deziro plej turmenta.

Eŭridiko: Mi, memorante korpan dialogon,
por amo trovos ilon kaj apogon.
La karnaj korpoj estas nur pronomoj,
klarigas la rilaton de la homoj,
simbolas ilin, helpas por distingo;
nun ni parolos per alia lingvo.
Mi devos suferadi, ĝis li venos;
mi lin memoras, ĝis revido benos.

Dua Gardisto:

Forgesu! Aŭ memoru, sed por puno
larmu eterne en senĉesa nuno.

Eŭridiko: Ah, jam mi torturiĝas pro la diso!

Unua Gardisto:

Forgesu! Trinku!

Eŭridiko: Ah, la lasta kiso!

La lasta sveno post la serpentmordo!
Engluta nigro de l' infero-pordo!

— Tamen, li venis serĉi min; kaj li
denove venos.

Unua Gardisto:

Kava iluzi'!
Li venos; jes; kaj trinkos; kaj forgesos
tuj; eĉ se vian amon vi konfesos,
li ne komprenos plu. La iluzio
forflugos — ĉia vana tera scio.
Komprenu, ke li ne plu estos viro;
vi por eterne daŭros en sopiro
al ombro, daŭros en dezir' turmenta
por io nigra, surda kaj silenta.

Eŭridiko: Ne . . . ne . . . sed jes, vi konas ĉion, vere
parolas . . . forgesite, senespere
vivi . . . ne plaĉi plu al li . . . ho ve!
Ne esti mi . . . ne koni lin . . .

*(Ŝi kovras la vizaĝon per la manoj kaj silentas dum mo-
mento. Poste ŝi stariĝas kun defia digno.)*

Sed ne!
Ne! vi, en via senkolora samo,
kion vi scias pri la homa amo?
Amo ne estas kiso kaj kareso,
ĝi estas la tuthoma vivojeso,
per tuta korpo kaj per ĉiu senso,
per tuta koro kaj per tuta menso,
aliformanto de la viv', plenumo
kaj pelo, la aero kaj la lumo,
oftega kiel akvo; kaj pli kara
ol diamanto, aŭ rubeno rara;
ĝi min fortigis, hardis per doloro;
per ĝi mi kredas al la viv-valoro.
Jen: mi ankoraŭ amas; do, sen timo

amo validas preter vivo-limo!
Ni ambaŭ vivis lian vivon, mian,
vivis du vivojn, tiel kreis trian;
ni kvazaŭ du riveroj en la maro
ekzistis en sinperdo, estas paro;
en ambaŭ restas rezistivaj memoj;
en am' troviĝas fuŝoj kaj dilemoj.
Jes; ni suferis; ni eraris; sed
duope, en rezisto aŭ en ced';
en la duop' ankoraŭ mi duonos;
se volos li forgesi, mi pardonos,
ĉar mi komprenos, li suferas same
kiel l' edzin', dise kaj ĉiam ame . . .
sed amo restos mia vivocelo;
se mi ne vivas, tamen en fidelo
mi daŭru!

Unua Gardisto:

Tamen, nun vi estas morta.
Sen am' Hadeso estos tre komforta.

*(Li denove proponis la pokalon. EŬRIDIKO turnas la dor-
son al li, rifuzante.)*

Forgesu vian edzon!

Eŭridiko: Ne!

Dua Gardisto:

Obeu!

(La UNUA GARDISTO penas perforte trinkigi ŝin.)

Unua Gardisto:

Ne amu plu!

Eŭridiko: Orfeon mi ne neu!

(Ŝi baraktas kaj forkuras, sed faligas sian floron.)

Dua Gardisto:

Si trinkos! Sed atentu, ĉar nun iu
nova alvenas.

Unua Gardisto:

Mi operaciul!

(ORFEO envenas, kurante, ploregante. Li portas nigran tunikon, sed helverda mantelo preskaŭ kovras ĝin.)

Orfeo: Leteo, ho Leteo! Ho, forgeso!
Forgesu mi pri ĉiu malsukceso,
pri sopirado, amo senespera,
perdo kaj propra morto plej mizera,
pri l' homoj, kiuj min en sang' disŝiris,
pri ĉio kion iam mi deziris!
Ĉar ĉio estas tro! Ho, Eŭridiko!

(Pro la krio, EŬRIDIKO revenas, sed heziteme.)

Mia malforto, stulto, am-paniko,
vidvigis min denove! Nigra ondo,
min forgesigu pri l' angora mondo!

(La UNUA GARDISTO prezentas al ORFEO la pokalon. Li tuj trinkas avida; EŬRIDIKO krias kaj etendas la manojn al li; li redonas la pokalon; la mantelo forfalas, kaj li restas nigre vestita.)

Eŭridiko: Orfeo! Oj, mi venis tro malfrue!

(Li tute ne aŭdas ŝin.)

Unua Gardisto:

Li daŭros nun sename kaj vakue.

(ORFEO fermas la okulojn, tremas, ŝanceliĝas, sed poste rektigas sin. Nun li estas perfekte kaj senvive trankvila.)

Orfeo: Subite mi vertiĝis en la spaco.
Nun venas vasta, infinita paco.
Ho ripoziga nigro!

(Li vidas la floron faligitan de EŬRIDIKO kaj prenas ĝin.)

Kolorero!

— Kio ĝi estas?

Unua Gardisto:

Floro de la Tero.

Orfeo: Mi ne komprenas vin.

Eŭridiko: Oj!

Orfeo: De la Tero?

Mi ne komprenas. *(Faligas la floron denove.)*

Eŭridiko: Plena senespero!

Orfeo: Ne gravas.

(EŬRIDIKO alproksimiĝas kaj denove etendas la brakojn al li, sed li neniel reagas.)

Eŭridiko: Mia edzo! Min rekonu!

(La GARDISTOJ ridaĉas.)

Dua Gardisto:

Do, ĉu li amas?

Eŭridiko: Ho, mi trinkos! Donu!

Unua Gardisto:

Finfine vi komprenas, kaj sagaca
iĝas! Do, trinku! Estu plene paca!

(Li prezentas la pokalon. EŬRIDIKO prenas ĝin, sed ŝia mano tiel tremas, ke ŝi elverŝas kelkajn gutojn sur la fali-

gitan floron. Si kriegas, faligas la pokalon kaj genuas por rigardi la floron, kiu estas nigriĝinta.)

Eŭridiko: La floro . . . mi ĝin plukis en la lumo . . .
nigra . . . velkinta . . . morta sen parfumo . . .
Ha, via paco kaj rezigna neo
estas la pac' de putro kaj pereol
Ho lasta memorilo! Ho pocio
damna, la fino de la emocio! (*Stariĝas.*)
Mi ĝin rifuzas, kaj mi sekvas lin,
serveme, nekonate, kun obstin'
por ĉiam; mia kara min bezonos
eble, finfine . . . se li min ne konos.
Li min ne amos plu; sed mi lin vidos;
eble mi helpas lin, konsolos, gvidos
iel; mi vagos en eterna tristo,
sed mia amo estas la ekzisto
por mi, kaj mi kolora kaj reala
restos, eterne ama kaj lojala;
mi amos lin laŭ eblo, en infero,
kiel mi amis sur la suna tero.

(ORFEO vagas sur la scenejo kun klinita kapo. La UNUA GARDISTO reprenas la pokalon, plenigas ĝin en la rivero post la digo, kaj denove prezentas ĝin.)

Unua Gardisto:
Virino, jen la akvo de forges'.
Ĉu do vi volas vin torturi?

Eŭridiko (triumfe):
Jes.
La nuna sorto estas ja terura —
senama, vi ne scias! — ja tortura —
tamen, torturoj kun Orfeo pli
plaĉas, ol paco kaj ripoz' sen li.

(La GARDISTOJ ridaĉas kaj residiĝas.)

Orfeo: Mi ne komprenas ion ajn. Mi venas
ien . . . el ie . . . sed mi ne komprenas.

(EŬRIDIKO sin metas antaŭ lin, tiel ke li ne povas ne vidi ŝin.)

Eŭridiko: Dio al vi min sendis, por protekto.

(ORFEO longe kaj fikse rigardas ŝin; li ne rekonas ŝin, sed li ekamas ŝin.)

Orfeo: Benata estu Di', pro la elekto!

(La metala rido de la GARDISTOJ tuj ĉesas.)

Benata estu Dio, kiu benas.
Mi ĵus naskiĝis . . . kaj mi ne komprenas
la vivon . . . kion diri? . . . stranga sorto!
Ĉu mi vin serĉis . . . dum la tuta morto?

Eŭridiko: Jes.

Orfeo: Kaj post ia longa iluzio
mi trovas vin?

Eŭridiko: Jes.

Orfeo: Dankon do al Dio!
Vi restos, ĉu? Ne estas iluzia?

Eŭridiko: Jes, dum eterno mi restados via.

Dua Gardisto:
Ho abomena diro, aĉa vido!

Unua Gardisto:
Malvenko! Ho obsceno, ho perfido!

obsceno: pudor-indignigo.

(La GARDISTOJ sin ĵetas teren sur la digo kaj kovras sin per la nigraj manteloj. Ili similas al limakoj.)

Eŭridiko: Venu. Ni plukos asfodelo-garbojn,
rigardos la trankvilajn nigrajn arbojn,
promenos en la kampoj de l' infero
sen timo de disiĝo aŭ sufero,
ĉar morto jam okazis. Ĝi sufiĉas.
Kunaj por ĉiam nun, ni ekfeliĉas
finfine. Jen la nigra mortopovo
nun mortas mem post ĝia lasta provo.

Orfeo: Mia perfekta, dolĉa kunulino,
vi ŝajnas kvazaŭ bela halucino,
kiun mi ĉasis, kiu en realo
aperas nun, vivanta idealo:
Mirinda renkontiĝo! Estu danko
al Dio! — Sed ĉu vi min amas, ankaŭ?

Eŭridiko: Ek de l' unua vid' mi amis, kara.

Orfeo: Eltrovitino! Kara, senkomparal
Vivu la mortol' ĉar, sen preĝo peta,
mi trovis vin, kaj tuj vi estis preta
kvazaŭ vi min atendus! Mia bela,
ĉu dum eterno estos vi fidela?

Eŭridiko: Jes, en futuro kaj en pasinteco,
mi nunas nun kun vi, ho kara edzo.

Kurtenfalo.

VAKA SEĜO

Unuakta Tragedio

(Premio en Belartaj Konkursoj, Marsejlo, 1957)

PERSONOJ:

HELEN GROSSMAN, lernejestrino, 60-jara
BRENDA KING, instruistino, 45-jara
CHRISTINE POVEY, instruistino, 50-jara
MARION MELLER, instruistino, 30-jara
SHIRLEY DANBY, instruistino, 22-jara
KATHLEEN FORD, instruistino, 35-jara
MARY TOMLINSON, instruistino, 55-jara
MARGARET LANDMAN, lerneja sekretario, 30-jara

SCENO:

La stabĉambro en knabina gimnazio. Lerneja blazono kaj granda kalendaro pendas sur la muro; neniam bildoj, sed granda afiŝtabulo kaj lecionhoraro. Sep lignaj seĝoj troviĝas ĉirkaŭ modere granda tablo. Du malnovaj, malbelaj brakseĝoj ankaŭ troviĝas en la ĉambro. Altaj ŝranketoj kun la nomoj de stabaninoj surskribitaj. (Tiujn ĉi oni povas imagi ekster la scenejo, se tiaj ŝranketoj ne estas facile troveblaj.) F-ino KING kaj f-ino POVEY interparolas, sidante sur la brakseĝoj. F-ino KING estas inteligenta, sentema virino, simple sed bonguste vestita, en malhelaj vestaĵoj; ŝia mieno estas nervema kaj iom melankolia. F-ino POVEY, simple vestita, iomete sed ne farse distrigema, estas trankvila kaj ĉiam pacigema, konsolema.

Brenda King: Mi vere ne scias, kiel mi toleros la komencon de tiu ĉi nova trimestrol

Christine Povey: Ne turmentu vin, Brenda; mi certas, ke post kelkaj tagoj vi sentos vin pli bone.

Brenda King: Sed vidi ĉion, kion Sylvia uzis kaj tuŝis antaŭ nur kelkaj semajnoj . . . ! Ŝi estis malfeliĉa tie ĉi . . . mi scias . . .

Christine Povey: Sed nun ŝi estas feliĉa. Mi certas, Brenda, ke nun ŝi ĝuas pli bonan vivon, la plej belan vivon. Vi scias, Brenda . . . mi multe ploris kaj preĝis; sed post la ŝoko kaj la doloro, mi ekkomprenis. Vi povas certi, ke nun ŝi feliĉas, ŝi ege feliĉas; kaj ĉiuj tiuj ĉi stultaj bagateloj estas forgesitaj.

Brenda King: Se nur mi havus vian fidon!

Christine Povey: Sen ĝi mi mem ne povus spiri tie ĉi. (*Leviĝas kaj amike premas la ŝultron de sia amikino.*) Vi komencas kun la duajara grupo, ĉu ne? Mi ĵus kontrolis, kaj viaj libroj estas en la klasĉambro.

Brenda King: Mi dankas vin, Christine. Jes, mi nepre devas iel regi min kaj eklabori.

(*F-ino FORD, ridema, bonhumora, sed esence malkontenta fraŭlino, iom malbonorde vestita, envenas kun f-ino TOMLINSON, malŝike vestita, malsana kaj ĉiam laca, kaj f-ino MELLER, kiu estas ŝike vestita kaj ŝajnas iom malmola, kvazaŭ ciniketa, malfeliĉa sed ne sinkompatema.*)

Marion Meller: Saluton, Brenda! saluton, Christine! Mi dezirus al vi feliĉan trimestron, se ni povus iel ajn esperi pri tia miraklo!

Brenda King: Ĉu la nova instruistino alvenis?

Kathleen Ford: Jes; ŝi estas ĉe fraŭlino Landman, kiu klarigas al ŝi diversajn detalojn.

Christine Povey: Kia ŝi estas?

Marion Meller: Timema. (*Iras al sia ŝranko, elprenas ekzercojn, tuj eksidas ĉe la tablo kaj komencas korekti ilin.*)

Christine Povey: Ĉu vi fartas pli bone post la ferio, Mary?

Mary Tomlinson: Ne tre. Mi ne povas bone dormi. Mi devas uzi dormigajn pilolojn. (*BRENDA KING reagis nerveme.*) Kaj matene mi havas kapdolorojn. Vere, mi devus ekiĝi; sed mi ne scias, kiel mi vivus inter nun kaj la pensio.

Christine Povey: Vi devos preni bonan tason da varmega teo je la matena interrompo.

(*MARGARET LANDMAN, en nigra, virina kompleto, envenas, kondukante SHIRLEY DANBY. F-ino DANBY estas timema, naiveta, hezitema, inteligenta kaj esence ŝatinda junulino, bone sed kviete vestita. Ŝi portas malgrandajn orelingojn, kaj fianĉinan ringon.*)

Margaret Landman: Jen la nova viktimo, fraŭlino Danby. (*Ĉiuj salutas ŝin.*) Mi jam metis vian nomon super ŝranketo. Bonvolu rigardi la afiŝtabulon kiel eble plej ofte; alie vi nepre malrimarkos ion gravan. Fraŭlino Ford, jen la ŝlosilo de la laboratorio.

Kathleen Ford: Dankon. Ĉu la nova pesilo alvenis?

Margaret Landman: Ankoraŭ ne. Fraŭlino King, la novaj libroj por la biblioteko alvenis, kaj fraŭlino Crossman petas, ke vi ordigu ilin tuj. Fraŭlino Povey, fraŭlino Crossmann diras, ke vi forgesis adicii la registron je la lasta tago de la trimestro.

Christine Povey: Mi pardonpetas; mi atentis tion tuj. (*Eliras kun la sekretariino.*)

Marion Meller: Do! la drakino jam flamspiras. (*Fraŭlinoj KING, TOMLINSON kaj FORD serĉas kajerojn kaj li-*

brojn.) Dank' al Dio, ke mi havas liberan horon nun, kvankam tio ne estas aŭguro por la tuta trimestro! Kaj feliĉe por vi ankaŭ, fraŭlino Danby, nia flavbekulino!

Kathleen Ford: Ĉu vi korektas jam, Marion, je la unua tago de nova trimestro?

Marion Meller: Jes, kompreneble! ĉu mi estas, laŭ via interpreto, stabanino kiu forportus korektendaĵojn por la ferio? Ne, ne; mi devas labori en tiu ĉi drakinejo por gajni mian buterpanon, sed kiam mi ferias . . . mi ferias!

(Elektra sonorilo laŭte sonoras.)

Mary Tomlinson: Ho ve, mi ne estas preta! *(Ekforiras rapide, faligas libron, reprenas ĝin, eliras.)*

Kathleen Ford (elirante): Ek al!

Brenda King (elirante): Ĝis la!

Marion Meller: Ĉu mi ŝokis vin, fraŭlino Danby?

Shirley Danby: E . . .

Marion Meller: Jes. Jes, sed vi ne volas vundi min. Antaŭ dek jaroj, mi volis instrui, eduki. Nun mi volas ricevi ĉiunmonatan ĉekon kaj atendi decan pension; kaj mi vojaĝas dum la ferioj; kaj dum la ferioj mi ĝuas la vivon.

Shirley Danby: E . . . ĉu vi ne ŝatas la profesion?

Marion Miller: Mi kredas, ke plaĉus al mi eduki . . . sed tie ĉi mi ne edukas . . . kaj la ferioj de instruistino estas sufiĉe longaj por iom kompensi.

Shirley Danby (eksidante ĉe la tablo): Eble mi devas pli zorge prepari miajn lecionojn. *(Komencas labori, kun libro kaj notlibro.)* E . . . fraŭlino . . . e . . .

Marion Meller: Marion Meller.

Shirley Danby: Fraŭlino Meller . . . mi scias, ke ne tre decas kritiki dum mia unua tago tie ĉi, sed . . . ĉu vi opinias, ke dektrijaraj knabinoj vere ĝuos tiun ĉi libron? *(Montras libron. MARION MELLER rapide trafoliumas kaj poste redonas ĝin.)*

Marion Meller: Ne.

Shirley Danby: Ĉu do . . . post kelkaj semajnoj, kompreneble . . . mi rajtus proponi alian libron . . . ?

Marion Meller: Nekonsilinde! *(CHRISTINE POVEY revenas.)* Ŝajnas, ke vi ankoraŭ ne komprenas la Unuan Grandan Leĝon: ke la infanoj ne ĝuu!

Shirley Danby (ŝokite): Ho, fraŭlino Meller! — Sed en la seminario, oni diris al ni . . .

Marion Meller: Fromaĝo! En la seminario oni havas ideojn; tie ĉi oni havas . . . fraŭlinon Crossman, la lernejestrion!

Christine Povey: Sed ni povos iomete klopodi feliĉigi la knabinojn, Marion.

Marion Meller: Vi estas fakirino, Christine, miraklopova; mi ne. Fraŭlino Danby, ĉu vi konas fraŭlinon Povey? *(Ili salutas unu la alian.)*

Christine Povey: Pardonu min; mi ne volas tro enŝovi mian nazon; sed ĉu mi rajtas peti, ke vi ne sidu en tiu seĝo?

Shirley Danby (tuj leviĝante): Pardonon . . . kial ne?

Christine Povey: Mi kredas, ke dum kelkaj tagoj tio kaŭzus doloron al fraŭlino King. Ĝi estis la favorita seĝo de via antaŭulino, Sylvia Redfearn. Ŝi . . . ŝi foriris iom tragike, kaj fraŭlino King tre sentis la aferon.

Marion Meller: Plej bone ke ŝi sciu la veron tuj, Christine.

Christine Povey: Eble jes . . . Sylvia ne eksiĝis; ŝi subite mortis . . . per akcidento.

Shirley Danby: Ho, mi bedaŭras. (*Eksidas sur alia seĝo.*)

Christine Povey: Ŝi ne suferis . . . ŝi uzis dormigajn pilolojn, ĉar la nervoj estis malsanaj; kaj unu nokton ŝi erare prenis troan dozon. Fraŭlino King, la kompatindulino, trovis ŝin matene, mortan. Ŝi terure suferis ĉe la postmorta enketo. Ŝi vere tre amis fraŭlinon Redfearn, kiu estis tre inteligenta, sentema . . . preskaŭ same juna kiel vi . . .

Shirley Danby: Kia tragedio! — Mi dankas vin, ĉar vi sciigis min. Mi estos tre zorgema kun fraŭlino King. Estus terure, reveki tian memoron.

Marion Meller: Oni devas ĉiam esti iom singarda kaj taktoplena kun fraŭlino King. La sezono de la vivo . . . vi komprenos, ĉu ne?

Shirley Danby: Jes.

(*F-ino TOMLINSON envenas. Ŝi estas tre pala kaj duonkolapsanta.*)

Christine Povey: Mary! (*Helpas ŝin al brakseĝo.*) Kio estas?

Mary Tomlinson: Ho ve, mi estas malsana. Mi ĵus vomis. La kapo (*F-ino POVEY flegas ŝin.*)

Shirley Danby: Ĉu mi povas helpi?

Marion Meller: Ne, ne; ŝi ofte havas tiajn kapdolorojn. Migrenon. Mi iros kaj superrigardos ŝian klason. (*Ŝi estas ironta, sed preskaŭ kolizias kun f-ino CROSSMAN, la lernejestrino. F-ino CROSSMAN estas alta, iom impona laŭ aspekto, sed, tre videble, unu el tiuj neŭrozulinoj kies ĉefa plexuro estas humiligi aliajn por senti sin mem potencaj. Acida parolmaniero.*)

migreno: perioda, tre forta kapdoloro.

Helen Crossman (kiu ne atentis la individuojn): Kiam miaj stabaninoj havas liberan interlecionon, mi atendas ke ili laboru kaj ne babilu. Mi klare aŭdis voĉojn. Fraŭlino Tomlinson, kial vi ne instruas vian klason?

Mary Tomlinson: Mi pardonpetas, fraŭlino Crossman; mi ĵus vomis . . . mi . . . ho ve!

Marion Meller: Ŝi havas migrenon. Mi iras por superrigardi ŝian klason.

Helen Crossman: Do, rapidu, aŭ la infanoj ekbruos; ne staru kaj gapul! (*F-ino MELLER foriras, grimacante al la dorso de la lernejestrino.*) Fraŭlino Tomlinson, vi vere tro ofte havas tiujn ĉi kapdolorojn. Se vi ne povas normale labori, vi devas eksiĝi.

Christine Povey: Ŝi bonfartos baldaŭ, fraŭlino Crossman.

Helen Crossman: Baldaŭ tamen ne estas nun. Fraŭlino Danby, mi vidas, ke vi portas orelingojn. Bonvolu ne porti tiajn juvelojn en la lernejo. Ili ne taŭgas en atmosfero de laboro kaj alta moralo.

Shirley Danby (deprenas la orelingojn, vundite sed volante impresi bone): Mi pardonpetas, fraŭlino Crossman; mi ne sciis pri viaj preferoj.

Helen Crossman: Vi scios por la estonteco. Fraŭlino Povey, vi forgesis adicii la registron je la lasta tago de la trimestro. Atentu la malgrandajn detalojn, kaj la lernejo funkcios glate. Vi perdis mian valoran tempon per tiu malzorgemo.

Christine Povey: Jes, fraŭlino Crossman; mi pardonpetas.

Helen Crossman: Mi iros kaj rigardos kelkajn klasojn. (*Foriras.*)

Shirley Danby: Ho ve!

Christine Povey: Io estas malagraba en ĉiu posteno, kara mia. Ne permesu, ke tiaj aferoj tro ĉagrenu vin. Kaj . . . pardonu min; sed ĉu vi permesas, ke mi donu al vi eĉ alian konsilon?

Shirley Danby: Jes, fraŭlino Povey. Mi vidas, ke tie ĉi mi bezonas multajn konsilojn.

Christine Povey: Vi estas fianĉino, ĉu ne? Mi vidas, ke vi portas fianĉinan ringon.

Shirley Danby: Jes.

Christine Povey: Kara mia, mi tute komprenas, ke vi sentas feliĉon kaj fieron pri tio, sed mi konsilas, ke vi ne permesu al fraŭlino Crossman sciigi pri via fianĉineco.

Shirley Danby: Sed, fraŭlino Povey!

Christine Povey: Mi scias. Mi scias. Sed tie ĉi fraŭlino Crossman estas tre malfeliĉa virino . . . ni devas preĝi por ŝi, kaj laŭ niaj kapabloj paciencadi . . . ŝi estas ege malfeliĉa, kaj la feliĉo de aliaj dolorigas ŝin, eĉ kvazaŭ ofendas ŝin. Pardonu min.

Shirley Danby: Ho ve!

Christine Povey (dezirante konsoli ŝin): Ĉu vi esperas edziniĝi baldaŭ?

Shirley Danby (pli gaje): Post du jaroj. Ankaŭ Peter estas instruisto. Ni ambaŭ tre amas infanojn. Ni esperas, ke post kelkaj jaroj ni mem povos havi familion . . . Mi havas portreton de Peter en la mansako; ĉu vi volas vidi ĝin!

Christine Povey: Jes, dankon. (F-ino DANBY montras al ŝi portreton.) Jes, via fianĉo aspektas tre sincera, bonkora junulo . . . jes, mi ŝatas tiun senvualan, simplan vizaĝon. (Redonas la portreton.) Mi dankas vin.

Mary Tomlinson: Eble mi nun devas reiri al mia klaso.

Christine Povey: Ne valoras la penon; la sonorilo sonoros post momento; kaj vere, vi ne taŭgas por instrui. Mi vidas, ke vi tre suferas.

Mary Tomlinson: Jes, sed mi devos esti forta. (Eklarmante senbrue.) Mi ne povas perdi la postenon. Mi ne scias, kion mi faros sen salajro.

Christine Povey: Ne timu, Mary.

(La elektra sonorilo sonoras denove.)

Shirley Danby (leviĝante): Ĉu vi afable montros al mi, kie troviĝas la kvarjara klaso B?

Christine Povey (leviĝante): Jes, volonte. Mary, kiu klaso estos nun la via?

Mary Tomlinson: La triajara A.

(Fraŭlino FORD, MELLER kaj KING envenas. F-ino FORD formetas kajeron kaj prenas du librojn. F-ino MELLER rearanĝas la ekzercojn, kiujn ŝi volis korekti, metas ilin denove en sian ŝranketon kaj prenas kajeron. Dume, f-ino KING formetas librojn kaj prenas mapon. F-ino MELLER faligas sian kajeron kaj paperpeco elfalas.)

Kathleen Ford (redonante la kajeron): Buterfingrulino! — Kio estas tio?? (Laŭtlegas.) Ses botelojn da glukozaj limonado, du sifonojn da sodakvo! Vi devos esti pli singarda, Marion; vi baldaŭ iĝos ebrulino!

Marion Meller: Kiam mi havis stomakinflamon.

Kathleen Ford: Hm; tie ĉi oni bezonas viskion.

Marion Meller: Ĉu vi fartas pli bone, Mary?

Mary Tomlinson: Iomete.

glukozo: sukera substanco vinbera.

(Fraŭlino CROSSMAN denove envenas.)

Helen Crossman: Kiam la sonorilo estas sonorinta, mi atendas, ke ĉiuj miaj stabaninoj iru tuj al siaj klasoj; kaj tuj signifas tuj, ne post kvinminuta babilado. (Ŝi subite rimarkas la ringon de f-ino DANBY.) Fraŭlino Danby, mi kredis, ke mi ordonis al vi demeti viajn juvelojn.

Shirley Danby (timeme ektuŝante siajn orelojn): Jes, fraŭlino Crossman; mi jam demetis ilin.

Helen Crossman: Kaj kio estas tiu brilanta ringo sur via maldekstra mano?

Christine Povey: Fraŭlino Danby intencis tuj demeti ĝin, fraŭlino Crossman.

Shirley Danby: Sed . . . sed, fraŭlino Crossman, tio ne estas juvelo . . . almenaŭ ĝi ne estas ornamaĵo; aŭ mi ne portas ĝin kiel ornamaĵon; tio estas mia fianĉina ringo.

Helen Crossman (preskaŭ elkraĉante la vortojn): Via fianĉina ringo! Neniu ajn el miaj stabaninoj portos fianĉinan ringon en la lernejo! Demetu ĝin tuj! Mi ne toleros tian ekzemplon inter miaj knabinoj!

Shirley Danby: Sed, fraŭlino Crossman, tio ne estas afero de ornamado, de vanteco . . . tio estas simbolo . . . io al mi tre sankta . . .

Marion Meller (averteme): Ĉit, ĉit!

Mary Tomlinson (mallauĝte): Ho ve!

Helen Crossman: Vi estas tie ĉi por instrui, ne por revii pri via knabamiko.

Shirley Danby: Sed, vere, fraŭlino Crossman, mi nun laboras pli bone pro li. Kiam mi estas tentata al iu maldili-

ĉit: interjekcio silentiga.

genteco aŭ malpacienco, mi pensas pri mia fianĉo, kaj mi tuj

Helen Crossman: Aŭskultu, fraŭlino Danby! Dum la semajnfino vi kaj tiu via knabamiko povas stultaĵi kaj amaĵi private laŭdezire

Shirley Danby (indigne): Sed . . .

Helen Crossman: . . . sed en la lernejo vi ne portos tiun ringon. La knabinoj estas jam sufiĉe stultaj kaj sentimentaj, sen via helpo.

(F-ino DANBY, ĝiskore vundite, surprizita kaj senaplobm-igita, eklarmas kaj, palpante, eksidas sur la tabua seĝo.)

Brenda King (histeriete): Ŝi sidas en la seĝo de Sylvia Redfearn!

Shirley Danby (larmante pli forte): Pardonu min! (Ŝi volas leviĝi; f-ino POVEY amike premas ŝian ŝultron.)

Brenda King: Ne, ne, knabino; sidu kie ajn vi volas.

Helen Crossman (sarkasme): Eĉ dum la lernejestrino staras.

Brenda King: Ĉu vi intencas, ke ŝi iru laŭ la vojo de Sylvia Redfearn?

Christine Povey: Brenda, Brenda . . .

Helen Crossman: Fraŭlino King, regu vin. Iru tuj al via klaso. Fraŭlino Danby, vi ne komencas tre bone. Fraŭlino Meller, kial vi atendas? Iru al via klaso.

Marion Meller: Diablo, ĉu vi ne havas pli da homa komprenemo ol napo?

Christine Povey: Marion!

Helen Crossman: Vi pardonpetos pro tio, fraŭlino Meller.

Estas krime paroli tiel al la lernejestrino, precipe antaŭ aliaj stabaninoj!

Brenda King (pseŭdotrankvile): Krime . . . ĉu vi volas sciigi pri vera krimo? Mi kredas, ke la sola krimulino tie ĉi estas mi.

Helen Crossman: Vi histerias! Kia komenco al la trimestrol

Brenda King: Ne, mi ne histerias; mi ne troigas. Estas ja krime, ĉu ne, malvere atesti?

Christine Povey (kiu ekkomprenas): Brenda! Ĉit! Fraŭlino Crossman . . .

Brenda King: Estas ja krime, ĉu ne, ĵurorompi ĉe postmorta enketo kaj kaŝi la veron?

Helen Crossman: Kion vi diras?

Brenda King: Mi kaŝis la veron por eviti multan malbonon; por helpi sinjorinon Redfearn . . . por ke la reputacio de la lernejo ne suferu . . . por ke vi mem ne suferu, fraŭlino Crossman . . . sed kiam fraŭlino Danby eklarmis en la seĝo de Sylvia, mi ekkomprenis devon al la vivantoj!

Christine Povey: Brenda . . .

Brenda King: Sylvia Redfearn ne mortis per akcidento. Sylvia Redfearn intence mortigis sin mem.

Christine Povey: Ne, ne!

Helen Crossman: Vi nur imagas misterojn! Vi volas krei skandalon!

Brenda King: Mi povas montri al vi la pruvon. (Prenas leteron el sia mansako kaj montras la koverton al ĉiuj.)

Kathleen Ford: Ho, la manskribo de Sylvia! (Ekploras.)

Brenda King: Kiam mi iris por serĉi ŝin tiun matenon, mi trovis ŝin . . . kaj mi trovis leteron sur la noktotablo. Mi legis ĝin . . . dufoje . . . trifoje . . . kiom da fojoj mi ne scias . . . mi devis rapide decidi; kaj mi decidis, ke mi forprenos la leteron kaj silentos . . . oni verdiktu pri akcidento. Nun mi legos la leteron al vi.

Helen Crossman: Vi ne legos tiun leteron! Mi malpermesas! Iru al via klaso tuj!

Marion Meller: Tio ĉi ne estas plu afero de horaroj kaj laborkontraktoj! Silentu! Ni rajtas aŭdi la lastajn vortojn de kompatinda Sylvia!

Helen Crossman: Vi ne restos tie ĉi nun, nepre ne, fraŭlino Meller!

Marion Meller: Ĉu vi kredas, ke mi volas resti tie ĉi? Legu la leteron, Brenda!

(Fraŭlino Crossman, sentante ke pli forta potenco senpotencigas ŝin, eksidas, furioza kaj timema.)

Brenda King: Mi ruinigis min por savi la reputacion de la lernejo. Eble mi devos iri en karceron nun pro ĵurorompo; kiu scias?

Christine Povey: Mi kredas, ke en tia kazo oni montros homan kompaton . . . eble nur monpunos. Brenda, legu la leteron; la vero estos pli bona ol multaj teruraj konjektoj.

Brenda King (laŭtleĝante): „Kara Brenda, pardonu min. Eble mi nun agas tre malkuraĝe, sed vere mi ne povas toleradi plu. (Fraŭlino FORD denove ekploras. Ĉiuj estas konsternitaj; fraŭlino DANBY estas kvazaŭ paralizita pro teruro, aŭdante sian antaŭulinon.) Mi ne vidas elirvojon. Mi plurfoje diris al fraŭlino Crossman, ke mi volas serĉi alian postenon, kaj ŝi ĉiam respondis, ke mi faru laŭ in-

klino, sed la profesia konscienco ne permesos, ke ŝi donu al mi bonan rekomendon.“

Marion Meller (histerie al f-ino CROSSMAN): Murdistinol (F-ino CROSSMAN volas respondi, sed ne trovas vortojn.)

Brenda King: „Mi scias, ke mi malkompetentas; sed tio ne estas, kara Brenda, ĉar mi ne volas labori. Mi ne povas plaĉi al fraŭlino Crossman. Marion tre volas helpi min, (MARION MELLER ekploras) kaj konsilas min iĝi indiferenta al mia laboro. Sed mi vidas la okulojn de la knabinoj, tiujn fenestrojn el kiuj rigardas malsataj spiritoj . . . ho ve, ankaŭ spiritoj ribelemaj, ĝis ili ne povas instrui, aŭ timpremitaj, ĝis ili ne kuraĝas labori. Mi sentis, ke mi devas se eble fari ion por ili. Mi ankoraŭ kredas, ke oni povas eduki per amo, en feliĉa atmosfero, sen timo, sen deviga enuo; vere mi kredas tion, Brenda, kaj kaj . . . (F-ino KING preskaŭ ekploras, sed post momento regas sin.) . . . kaj ankoraŭ en tiu fido mi mortos. Mi mem tre kulpas; mi estas nesperta, tro juna, eble naŭva; mi havas fidon en la koro, sed mi jam vidas, ke mi ne komprenas taktikon. Salutu por mi ĉiujn, kiuj volis helpi min: Marion, kies konsilojn mi ne kapablis sekvi; Christine, kies religiemana rezignacion mi ne povas imiti; (F-ino POVEY ekploras) Kathleen, kiu ofte klopodis ridigi min por konsoli min; kaj Mary, kiu ofte, kiam ŝi mem suferigis pro sia migreno, ankoraŭ havis simpatian vorton por mi.“ (F-ino TOMLINSON ekploregas. F-ino KING daŭrigas, iomete amare.) Kaj ĉu vi kredas, ke mi ne volas plori, relegante tiujn ĉi vortojn? Sed mi devas ne plori nun; mi devas batali, riski, eble perdi ĉion . . . por ke alia honesta junulino ne iru laŭ sama malluma vojo kaj tria novulino ne eksidu en la seĝo de Sylvia Redfearn! Kaj vi, turmentistino, vi, diktatorino ŝtonkora, englutu nun vian medikamenton!

Helen Crossman (anhelante): Kiel vi aŭdacas . . . kiel vi aŭdacas ?

Brenda King: Mi finlegos tiun ĉi leteron, aŭ mi krevos pro doloro kaj kolerol (Laŭtlegas.) „Salutu ilin ĉiujn; kaj prenu kison por vi mem, ĉar vi tiom volis helpi min, vi estis tiel bona por mi.“ — Malvere; mi faris nenion; mi malsukcesis. „Sed nun mi ne povas plu. Tiom da mensa konflikto malebligas al mi dormi. Mi volis esti instruistino, kaj tie ĉi mi devas esti vokto inter timregataj sklavinetoj, kaj sklavino mem. Oni pardonu min; mi luktis, sed mi estas laca, lacega, tiom laca; kaj nun mi prenos multajn pilolojn kaj dormos ĉiam. Adiaŭ, Brenda! Via mizera, mizera, mizerega amikino, Sylvia.“

(Momento de silento sekvas.)

Mary Tomlinson: Ŝi pravas . . . sklavinon . . . ho ve! (Svenas. La aliaj ne atentigas ŝin.)

Marion Meller: Murdistino!

Brenda King: Kaj nun mi iros laŭ mia propra vojo . . . al la mort-enketisto, por konfesi mian krimon.

Helen Crossman: Vi iros rekte en karceron!

Brenda King (trankvile): Tiu ĉi lernejo jam estas karcero.

Helen Crossman: Vi ne forportos tiun ĉi leteron! Donu ĝin al mi! Mi detruos ĝin! (Ŝi provas manĉapti la leteron. F-ino KING savas ĝin.)

Brenda King: Do, nun ankaŭ vi sentas krimemon, ĉu? Eble plej bone ke mi iru tuj!

Helen Crossman: Mi ordonas al vi, iru al via klaso! Kontraktoromp!

Brenda King: Mi estas jam ruinigita. Adiaŭ! (*Eliras kun la letero. F-ino CROSSMAN volas sekvi ŝin, sed f-inoj FORD kaj MELLER tenas ŝin, ĝis pordofermo aŭdiĝas.*)

Helen Crossman: Mi faros . . . ho, mi faros ion teruran . . . mi ne scias kion mi faros . . . (*subite perdante la fortojn*) . . . mi estas tre mizera maljunulino . . . neniu ajn amas min . . . mi gravas al neniu ajn . . . (*Foriras, stumble.*)

Christine Povey: Ho Dio, kompatu Viajn infanojn kaj la malsanajn animojn!

(*MARION MELLER metas la manojn amike sur la ŝultrojn de f-ino DANBY.*)

Marion Meller: Jen konsilo, kara mia. Foriru. Foriru tuj. Post tia skandalo oni komprenos kaj akceptos vian eksigon. Rekomencu ie alie. Multaj bonaj lernejoj troviĝas en nia lando . . . multegaj. Sed se vi restos en infero de falseco kaj tiraneco, vi iĝos apatia kaj cinika . . . aŭ via seĝo vakos . . . baldaŭ . . .

Shirley Danby: Ĉu vi venos kun mi?

Marion Meller: Mi? Ne, ne: mi estas jam ŝtoniĝinta, brutiĝinta, perdita.

Shirley Danby: Ne. Vi simpatias kun aliaj. Ĉio bona en vi restas, nur dormas.

Marion Meller: Kara bona naivulino! (*Subite ŝia vizaĝo ek-lumetas.*) Sed . . . vi pravas. Jes, mi venos kun vi . . . ni serĉos lernejon, kie malfeliĉulino ne konsolas sin, malfeliĉigante aliajn . . . ni . . . fraŭlino Danby, ni edukos! kaj mi eble retrovos mian animon!

Christine Povey: Dume, ni provu trankviligi la knabinojn. (*Kiam ŝi eliras, krio aŭdiĝas; f-ino POVEY revenas; f-ino LANDMAN kuras en la ĉambron.*)

Margaret Landman: Fraŭlino Ford! Venu al la laboratorio tuj! Fraŭlino Crossman . . . !

(*Ĉiuj leviĝas, konsternite escepte de f-ino TOMLINSON.*)

Al la laboratorio, tuj!

Kurtenfalo

2060

Fantazia dramo

(Premio en Belartaj Konkursoj, Kopenhago, 1956)

PERSONOJ:

SINJORO VERDO, 120-jara

SINJORO GRIZO, 95-jara

JULIO ALTMANN, 24-jara

LIDIO MIRKOVIĆ, 24-jara

SCENO:

En belega publika ĝardeno. La reĝisoro devos iom uzi sian imagpovon por krei angulon de ĝardeno, kiu sugestos teknican progreson. Plej malproksime, ni vidas parapeton; ĝi estas palverda kaj tre harmonias kun la sceno. Maldekstre, ronda lampo sur stango estas fiksita al la parapeto. Pli proksime al la aŭdantaro ni vidas duoblan benkon, laŭ tipo ofte videbla jam en parkoj, sed laŭ pli eleganta formo kaj ŝajne el iu nova materialo. Unu sidloko frontas la parapeton, unu la aŭdantaron. Laŭeble, la reĝisoro montru belajn florplenajn bedojn, arbojn, arbustojn kaj aliajn belajn laŭ sia propra fantazio, kreante, ekzemple novajn flortipojn, kiuj ankoraŭ ne ekzistas. SINJORO VERDO kaj SINJORO GRIZO envenas de dekstre; ili argumentas amikece. Kvan-
kam SINJORO VERDO estas 120-jara, li aspektas kiel nuntempa sana 70-jara viro, kaj la 95-jara SINJORO GRIZO aspektas kiel nuntempa 60-jara viro. La reĝisoro uzu sian propran fantazion por la vestaĵoj; sed la du maljunuloj portu riĉajn kolorojn, malhelajn, kaj aspektu iom imponaj. (La voĉoj ne estu malbele altaj kaj malfortaj, nur malfortetaj.)

Sinjoro Verdo: Vi diras, ke mi estas Estontecisto nur pro

sentimentaleco. Nu, mi honeste opinias, ke post centdu-
dek jaroj oni ne plu povas esti sentimentala, amiko!

Sinjoro Grizo: Mi ne intencis diri, ke vi estas afektebla. Mi
scias, ke vi estas sincera, sed iom tro naive molkora. Ĉu ni
sidiĝu?

Sinjoro Verdo: Bone. (Li volas sidi kaj rigardi la parapeton.)
La sunlumo estas ja tre agrabla.

Sinjoro Grizo: Pardonu mian stultecon, sed mi preferas ne
rigardi la riveron. Mi konfesas, ke la grandega alteco kaŭ-
zas al mi kapturniĝon.

Sinjoro Verdo: Laŭ via deziro — estas al mi egale! (Ili si-
diĝas sur la benkoparto, kiu rigardas la aŭdantaron.)

Sinjoro Grizo: Nu, vi scias, ke mi ne estas Pasintecisto pri
absolute ĉio ajn. Ekzemple, en la Referendumo de la 6-a
majo 2035 mi ja voĉdonis por la Tutmonda Maljunula
Sanvojaĝservo — kiun, fakte, ni ambaŭ nun uzas, vi el via
terparto kaj mi el mia! — Mi voĉdonis, sed tute ne pen-
sante pri estontaj avantaĝoj al mi mem!

Sinjoro Verdo: Nur laŭ la principo, ke helpi plenan sanon
pli utilas ol kuraci malsanojn, ĉu?

Sinjoro Grizo: Ĝuste tial. Mi neniam estis kontraŭ multaj
plifaciligoj de la homa surtera situacio. Sed vi Estontec-
cistoj, laŭ mia opinio, penas eĉ tro faciligi la vivon, for-
preni valorajn defiojn kaj stimulojn . . . Ekzemple, pri tiu
baldaŭa referendumo pri la pli granda fleksebleco de la re-
guloj pri juneciniado. Nu, pri la propono, ke oni rajtu
iniciigi dum la dekdua jaro, kaj ke oni ne absolute devu
iniciigi ĝis la deksepa jaro, mi povus konsenti. Sed la pro-
pono, ke la infanoj mem elektu la daton ŝajnas al mi tre
malaprobinda.

Sinjoro Verdo: La lokaj iniciad-komitatoj havos la rajton rifuzi vere nematuran kandidaton, por ke neniuj ajn infano petu seksan liberon nur pro scivolemo aŭ imitemo.

Sinjoro Grizo: Jes; sed mi timas, ke tiu granda fleksebleco de la vivpostuloj igos la vivon tro facila; la vivo estas jam tre facila por la nuntempaj gejunuloj. Ili vere devas lerni toleri, atendi, akcepti la vivon tia, kia ĝi estas.

Sinjoro Verdo: Oni parolis same, kiam ni estis junaj — ni, kiuj edukiĝis per tredo kaj timo. Nuntempe la dudeka jarcento ŝajnas pratempo de barbara krueleco kaj nenecesa angoro. Eble post alia jarcento oni miros, kiel la dudekunjarcentuloj eltenis!

Sinjoro Grizo: Se jes, la raso ja estos malfortiĝinta, kiel mi nun timas.

Sinjoro Verdo: Nu, mi iom dubas pri la simptomoj de degenerado en niaj junaj submaraj vetkurantoj, niaj lunvojaĝemaj geknaboj, aŭ la multaj gelernejoj kiuj proponas sin por sciencaj esploroj! La homo estas nature aventur-ema; kaj vera malfeliĉo povas pli malfortigi nin, ol iu ajn feliĉo!

Sinjoro Grizo: Sed kia deviga defio eĉ hodiaŭ proponas sin al niaj gejunuloj?

Sinjoro Verdo: Nu, la iniciad-ceremonioj mem postulas moderan kuraĝon kaj sinregadon.

Sinjoro Grizo: Konsentite! Sed poste kio? Aŭ antaŭe?

Sinjoro Verdo: Mi kredas, ke la vivo mem ĉiam portos al ili defiojn. La tero povas iĝi pli sekura, la socia ordo pli justa kaj milda; sed homoj restas homoj; ili ankoraŭ frontas amon, familian kunvivadon, labordevon kaj morton.

Sinjoro Grizo: Ni neniam interkonsentos! Tamen, la referendumo montros la publikan opinion. Mi havas rendezuon kun amiko el la Antarkta Regiono — interesa ulo kun multaj neordinaraj memoroj! (*Leviĝas.*)

Sinjoro Verdo: Ĝis la, dol! Mi restos ĉi tie kaj rigardos dum duonhoro la florojn. Eble mi havos nur kelkajn printempojn nun, kaj floroj ankoraŭ neniam tedeas . . .

Sinjoro Grizo: Ĝis la! (*Foriras. SINJORO VERDO dum paŭzeto rigardas la florojn. Dum li meditas, JULIO ALTMANN envenas. Bela, sana, simpatia junulo en helkoloraj, simplaj vestaĵoj. Sed nun li estas preskaŭ frenezeca pro interna konflikto kaj doloro. Li kuras al la parapeto, kaj komencas grimpi, preta sin ĵeti malsupren. SINJORO VERDO vidas lin kaj stariĝas.*)

Sinjoro Verdo (milde kaj digne): Ne.

Julio (respekteme sed senespere): Kial ne?

Sinjoro Verdo: Eble jes, eĉ; sed pripensu iomete unue.

Julio: Amiko, mi ne plu kapablas toleri miajn proprajn pensojn!

Sinjoro Verdo: Do, neniuj ajn rajtas postuli, ke alia homo, kiu havas netolereblan kaj neforigeblan doloron, gardusian propran ekziston. Sed la plimulto de niaj doloroj estas aŭ forigeblaj, aŭ tolereblaj per iom da saĝo. Venu ĉi tien. (*JULIO proksimiĝas heziteme.*) Ne timu; mi estas Estontecisto; mi deziras la feliĉon de la nova generacio. (*Iom pli aŭtoritate.*) Sed ankaŭ mi estas centdudekjara. Tio signifas, ke dum dudek jaroj mi estis Memorgardanto kaj Popola Konsilanto, kaj, vidante urĝan malfeliĉon, havas la rajton kaj devon pridemandi la kaŭzon. Akceptite?

Julio (kun klinita kapo): Jes, devige akceptite . . .

Sinjoro Verdo: Se mi ne povos helpi vin aŭ proponi al vi helpanton, mi ne plu ĝenos vin. Dume, eksidu. (*JULIO eksidas apud li.*) Bone, nu, sincere klarigu: Kial vi, promesplena civitano, volas mortigi vin?

(*LIDIO MIRKOVIC envenas, kurante, plorante. Si estas bela junulino, arda, sincera, kaj portas helajn, simplajn vestojn. Vidinte JULION ŝi ĵetas sin al la piedoj de SINJORO VERDO.*)

Lidio: Julio, Julio, plej kara! Nur lasi por mi tiun teruran leteron? — Sinjoro, vi estas Konsilanto, ĉu ne? Altestimata, mi petegas vin, helpu mian karan, kion ajn mi mem devos fari aŭ trasuferi! Li ne mortu! La vivo povas esti tiel bel!

Sinjoro Verdo (karesante ŝian kapon): Jes ja; kaj bela knabino simbolas la belecon de la vivo.

Julio: Lidio, ni ne povos solvi la problemon! Kial turmenti nin daŭre? Mi malekzistu; vi forgesu min!

Sinjoro Verdo: Vi tute ne kverelis, ŝajne?

Julio: Kverelis! Dum du jaroj en la Prova Domo ni neniam kvereletis; dum du jaroj en la Prova Domo nia amo kreskis! Sed nun mi vidas, ke tiu amo sankta, kiu lumigis niajn vivojn kaj donis al ni vivocelon, estas por mi fatala.

Lidio: Julio, mi ĵuras, ke se vi mortigos vin, mi sekvos vin!

Sinjoro Verdo: Ni ne parolu pri la morto, sed pri la vivo. Vi du amas unu la alian per arda, sincera, sankta amo. Post du jaroj en la Prova Domo vi nepre scias, ke nek imitemo, nek frivola scivolemo, nek urĝa amoro, motivas vian rilaton. Nu do, vi du posedas ion, kio estas inter la plej karaj trezoroj de la homaro; kaj Julio, ne povante portadi tiun ŝarĝon de ĝojo, volas sin mortigi. Nel Diru, mi petas, la tutan veron.

Julio: Ni kompreneble volas fari la Porĉiaman Promeson kaj akiri la rajton krei infanojn.

Sinjoro Verdo: Des pli bone.

Lidio: Ni estas ambaŭ sanaj, fizike kaj mense.

Sinjoro Verdo: Kaj ĉu vi estas ambaŭ ĉiel liberaj?

Lidio: Jes, sed

Julio: Mi havas tre fian heredaĵon. Ĝi estas tiel elstare fia, ke mi ne rajtas riski la transdonadon.

Sinjoro Verdo: Ĉu oni oficiale forprenis de vi la rajton patriĝi?

Lidio: Tute nel! Eble tio estus por ni pli facila Mi insistas, ke li estas tro skrupula; ke per bona medio kaj edukado ni povos forigi iun ajn inklinon al tiu heredaĵo . . .

Julio: Sed, Lidio, mi mem ne toleras la penson, ke mi povus naskigi, kaj pere de vi, tian homon!

Sinjoro Verdo: Ĉu vi konsultis genetikiston?

Lidio: Jes; mi petegis tion. La genetikisto diris, ke oni ne povas esti certa, sed ke Julio nepre rajtas riski.

Julio: Sed ĉu pere de vi, plej kara, ĉu pere de vi?

Sinjoro Verdo: Mi komprenas; ju pli profunde amo validas, des pli ĝi skrupulemas, des pli hezitas pri sia propra merito. Kio estas tiu heredaĵo, kiu obsedas vin?

Julio: Mia patrino edukiĝis en orfejo, ĉar ŝia patro murdis ŝian patrinon. Mia patrino estis ankoraŭ bebino. Feliĉe ŝi ne memoris multe pri la afero mem . . . sed laŭ la arkivoj la patro bategis la patrinon per granda botelo, ĝis

ĝi dispeciĝis . . . kaj sango estis ĉie . . . mi povas imagi . . . mi povas tro bone imagi, sinjoro! . . . kaj finfine li strangolis ŝin . . . Ŝajnas ke li ne amis la infanon kaj ĉesis ami la patrinon, kaj tiam li estis beste ebria . . . Mia avo estis monstro, monstro! Kaj mi ne povas forgesi, ke tia monstra sango fluas en miaj vejnoj; mi povos transdoni tian here-
daĵon al senkulpa infano . . . al la infano de mia Lidio!

Lidio: Julio, Julio, nur vin mi deziras . . . kia ajn vi estas!

Sinjoro Verdo: Nu, via historio estas ja terura, pli terura ol mi atendis. Sed viaj propraj gepatroj estis bonaj kaj normalaj, ĉu ne?

Julio: Jes, ŝajnas ke jes . . . eĉ banalaj . . .

Sinjoro Verdo: Mi kredas, ke vi tre troigas la riskon; ke, eble ĉar vi havas ian neracian kulposenton kaj kvazaŭ timas vian propran feliĉon, vi kreas por vi teruran himeron. Vi tre serĉis tra arkivoj, ĉu ne?

Julio: Jes.

Sinjoro Verdo: Ĉu vi trovis aliajn patologiajn tipojn?

Julio: Ne. La murdo okazis en 2011. Panjo edziniĝis kun Johano Altmann en 2034, kaj mi naskiĝis en 2036. Miaj gepatroj . . .

Sinjoro Verdo: Altmann . . . ?

Julio: Mi pardonpetas.

Sinjoro Verdo: Ne gravas. Mi ekpensis pri io. Viaj gepatroj . . .

Julio: Ŝajne vivas feliĉe kaj normale. Mi ne trovis alian strangaĵon.

Lidio: Kaj ni ne trovis monstron aŭ strangulon je la patra flanko.

Julio: Ne; sed ĉiam banalulojn! Kiu scias, ĉu tia ordinara morala forto ĉiam venkos la monstran inklinon?

Sinjoro Verdo: Ej, mia amiko, monstro infera sin kaŝas en ĉiu homo; sed la plimulto de ni regas ĝin. (*Paŭzeto.*) Sed . . . se vi ja scius, ke unu el viaj prapatroj estis neordinare valora homo . . . ĉu tio sufiĉus por retransviligi vin?

Julio: Jes! Jes, se nur mi povus trovi ion por aldoni ekvilibron . . . jes, mi akceptus! Sed kiu proponus al mi tian scion? Mi mem traserĉis multajn arkivojn, kaj trovis nenion signifan.

Sinjoro Verdo: Julio Altmann . . . ĉu vi konas la nomon de via patra avo?

Julio: Jes: Rudolfo Altmann.

Sinjoro Verdo: Rudolfo . . . Nu . . . tion oni kutime ne scias, sed vi trafolumis multajn dokumentojn, pelite per via obsedo . . . ĉu vi konas la plenan nomon de via praavo . . . de la patro de Rudolfo Altmann?

Julio: Fakte jes; mi scias: Henriko Altmann, kiu naskiĝis en 1951 kaj mortis en 2015.

Sinjoro Verdo: Henriko Altmann, pontingeniero, Nebengeweg 45, Dresden?

Julio (ekstarante en mirego): Vi estas sorĉisto! — Tio estis la adreso de mia avo Rudolfo Altmann, ankaŭ! Mi vizitis lin, mi mem, estante knabeto! Mi ne bone memoras lin . . . nur kalvan bonulon . . . sed vi pravus pri la adresol

Lidio: Kiel vi scias pri li? Ĉu vi vere estas sorĉisto?

Sinjoro Verdo: Ne . . . nur tre maljuna maljunulo. Julio, via praavo, Henriko Altmann, estis viro, kiu estis preta suferi mokojn, eĉ malhelpi sian karieron, perdi amikojn kaj pro-

tektantojn, elspezi, labori, pro absolute malegoista celo, kiel modesta helpanto en la liberigo de la homaro.

Lidio (ĝoje): Julio, Julio!

Julio: Se nur mi certus pri tio . . . tio ja estus por mi savo kaj feliĉo!

Lidio: Kaj tial, por mi ankaŭ!

Sinjoro Verdo: Mi ne povas diri, ke mi intime konis Henrikon Altmann; mi parolis kun li eble kvar-kvin foje . . . ni interŝanĝis bildkartojn kaj maloftajn leterojn dum eble dek jaroj . . . sed mi havas en la poŝo la pruvon, ke li havis ian neordinaran bonfaremon. (*Li elprenas libreton.*)

Lidio: Kia stranga, antikva tipografio!

Sinjoro Verdo: Jes! la libro estas nun kuriozaĵo; sed mi gardas ĝin, por memorigi min dum miaj sunsubiraj tagoj, ke mi ne misuzis mian vivon. Ĝi estas la kongreslibro de la granda Jubilea Kongreso de Esperanto, 1985. Jen. (*Li trafolumas la libron.*) Jen Henriko Altmann; numero 283; via praavo. Li nepre havis kelkajn noblajn ecojn, eĉ elstarajn; li estis tre fervora esperantisto.

Julio: Esperantisto? Sed kiel oni povas esti esperantisto — isto de lingvo? Kvazaŭ oni estus spiristo aŭ manĝisto . . . ?

Sinjoro Verdo: Jes, Esperanto nun ŝajnas al vi du natura kiel spirado; vi tuj uzas ĝin ekster via propra lingva regiono.

Julio: Jes, hejme mi parolas la neoteŭtonan dialekton, Lidio — Lidio Mirkoviĉ — la panslavan; hejma dialekto estas iom . . . e . . . komforta . . .

Lidio: Jes, komforta, kiel pantofloj! sed kompreneble ekster la hejmregiono ni uzas Esperanton.

panslava: tutslava lingvogrupo.

Julio: Inter ni . . . sed kia besto estis tiu esperantisto — kvazaŭ Linjo estus panslavistino?

Sinjoro Verdo: Se vi volas havi multajn detalojn, vi povos atingi mian hejmon per ŝtallibeletoj en duonhoro; aŭ iu ajn altgrada lernolibro pri lingva historio klarigos al vi. Sed mi certigas al vi nun, ke Henriko Altmann kuraĝis uzi kaj propagandi Esperanton en 1985 — kiam la plimulto de la homaro ankoraŭ mokis, rezistis, eĉ malamamis ĝin. Ĉu vi komprenas, ke en 1985 nacieco (vi sendube konas la koncepton, el la enciklopedio?) —

Lidio: Jes —

Sinjoro Verdo: — ankoraŭ floris? Homo, kiu celis interkomprenigi la homaron per neŭtrala lingvo, riskis morkojn, kaj en multaj regionoj eĉ gravajn malagrablaĵojn? Jes, ni vojaĝas nun al la luno kaj la proksimaj planedoj, kaj malmulte pensas pri la oferoj de la pioniroj; ni ĉiuj flugas en ŝtallibeletoj, atomhelikopteroj aŭ raketoj kaj ne pensas pri iliaj martiroj. Vi gejunuloj ne memoras, kiel mi, ke antaŭ nur jarcento, oni histerie ridegis, kiam la unuaj pioniroj preparolis la eblon fari ŝtofojn kiujn oni neniam devas purigi; kaj por vi, la mondo ĉiam havis unu lingvon. Sed mi memoras aliajn tagojn; dum pli ol cent jaroj, la homoj, kiuj uzis Esperanton ŝajnis stranguloj, devis suferi, toleri, kaj nekredeble pacienci.

Julio: Mi tre ĝojus, se vi montrus al mi viajn relikvojn, pri tiu stranga epoko.

Sinjoro Verdo: Jes, mi ĝojos montri ilin al vi. Mi povos eĉ montri al vi kelkajn leterojn de Henriko Altmann . . . jes, esperantaj leteroj kiujn vi, Lidio, komprenos tuj; kaj vi vidos kiel li laboris . . . inter moko kaj malfacilaĵoj . . . por kontribui al la libero, kiun vi nun ĝuas en

via generacio. Ni luan ŝtallibeleton, ĉu? — Vi povas fieri pri via praavo, Julio; lia sango povas neŭtraligi la sangon de patologia monstro kaj doni kaŭzon eĉ por via sentema altruismo via skrupulemo.

Lidio: Julio, Julio! via praavo estis vere tre granda homo!

Sinjoro Verdo: Ne, li ne estis „granda“, nek mi, kiu strebis simile; la plimulto de ni estis simplaj homoj tre banalaj, eble sed kun homamaj flamoj en la koroj, simplaj homoj povas preskaŭ fari miraklojn Mia laboro nun estas finita; la tago, kiun mi atendis, antaŭ longa tempo venis mi konfesas, ke iasence mi eĉ sentis pardon! Sed la vivo ĉiam longiĝas, la mondo daŭre riĉiĝas; oni vidas ĉiam novajn perspektivojn por la homa raso. Eble vi du estos alispecaj pioniroj Vi ne plu emas enabismiĝi, ĉu?

Julio: Ne.

Sinjoro Verdo: Do, ni trafu tiun ŝtallibeleton kaj vizitu mian hejmon. Mi montros al vi miajn etajn trezorojn el forgesita epoko Ne danku; mi ĝojos klarigi ĉion al vi tiaj memoroj estas la ĉefaj plezuroj de maljuneco ke ni faris ion por la homaro kaj eble ĉe la vivofino nur tiaj memoroj ankoraŭ gravas Ni iru do!

(La kurteno falas, dum ili foriras.)

DRASTA KURACADO

Unuakta Komedio

PERSONOJ:

KARLO KVIK, 28-jara, juristo
HENJO KVIK, 25-jara, lia edzino
ELIZABETO PLAŬD, 25-jara, malnova amikino de HENJO
PETRO PEP, 18-jara, studento

SCENO:

La ĉefa ĉambro en la malgranda sed agrabla apartamento de la junaj geedzoj KVIK. Maldekstre, pordo al la litĉambro; dekstre pordo al la kuirejo; malantaŭe, dekstre, pordo al la koridoro. La vazoj de simpla matenmanĝo ankoraŭ troviĝas sur tablo meze de la ĉambro. Du seĝoj ĉe la tablo. Malantaŭe, eta ronda tablo kun plena florvazo kaj telefono; sofo. Maldekstre, antaŭe, alta dokument-tirkestaro. Estos bone, se en la ĉambro troviĝas radioaparato, gramofono, kopio de bona bildo; ĉio indiku bonan guston kaj modere komfortan, sed ne lukse riĉan vivon. KARLO KVIK, inteligenta, plaĉaspekta, simpatia viro, serĉas ion en la dokument-tirkestaro.

Karlo: Karega, ĉu vi vidis min demeti la specialan raporton pri la afero de Brun ie? Ĝi estas sur flava papero. Ve, mi jam malfruas!

Henjo (el la kuirejo): Vi relegis ĝin en la lito hieraŭ vespere, anĝelo!

Karlo: Ho, jes! *(Iras en la litĉambron. La telefono sonoras.)*
Ĉu vi povas respondi?

(HENJO envenas. Ŝi estas ĉarma juna virino, freŝa, beleta,

sana, simpla. Si portas antaŭtukon kaj tenas viŝilon en la mano. Si kuras por preni la telefonon.)

Henjo: Allo! Jes. Jes. Ho, kara, kiel agrable aŭdi vian voĉon denove! Ĉu vere? Kiel bone? Jes, mi tre ĝojos revidi vin kiel eble plej baldaŭ. Kara mial! Kompreneble mi ankoraŭ amas vin; ne hezitu!

(KARLO revenas iom maltrankvile. Li portas dikan flavan dokumenton kaj tekono. La konversacio videble malplaĉas al li, kaj li rigardas la telefonon malamikece.)

Jes, mi estis en la kuirejo. Vi ankoraŭ ne vidis tiun ĉi etan amnesteton, ĉu? Ne, Karlo devas nun eliri por viziti klienton ne, la stultulo ekmalsanis kaj ne kapablas viziti Karlon sed des pli bone, ĉu ne? ni povos babili senĝene pri ĉio!

Karlo: Kiu estas tiu?

Henjo: Jes, venu tuj kaj mi regalos vin per kafo kaj hejmbakita torto. Estas belega surprizo! . . . Do, kie vi estas nun, kara mia?

Karlo: Kiu estas tiu? Tiu kara mia?

Henjo (al KARLO): Momenton, anĝelo, mi ne tre bone aŭdas. (Al la telefono.) Jes, estos facile. Trafu tramon 35 . . . unue, transiru la straton; eliru ĉe Zamenhof-Placo . . . Jes, bonege! Iru laŭlonge de Hodler-strato, kaj nia strato estas la kvara ĉe la dekstra flanko. Suprenvenu senhezite! Mi lasos la pordon malŝlosita! Ĝis la! (Demetas la telefonon.) Ho, Karlo, kia malrida mieno!

Karlo: Kiu vokis vin?

Henjo: Elizabeto Plaŭd, la malnova lerneja kaj kolegia amikino pri kiu mi tiel ofte parolas. Ŝi laboris eksterlande dum tri jaroj, kaj nun estas reveninta.

Karlo (pli feliĉe): Elizabeto . . . amikino! Bone! (Metas la dokumenton en la tekono.) Ĉu vi certas, ke estis virino?

Henjo: Jes, estis Elizabeto.

Karlo: Kaj ĉu nur Elizabeto vizitos vin, dum mi estos for?

Henjo: Jes, ŝi estas sola en la urbo.

Karlo: Kaj el ŝia vizito vi ne kreos pretekston por inviti Pepaŭ alian viramikon al la apartamento?

Henjo: Karega stultulo kaj stulta karegulo! Ĉu mi estas en la akuzitejo? Kial vi tiel demandadu? Ĉu vi ne fidus al mi?

Karlo: Ĉu vi ne ricevos alian vizitanton?

Henjo: Karlo, tutsincere, vere, ne. Kial vi estas tiel suspektema? Ĉu vi povas dubi ke mi amas nur vin?

Karlo (penteme): Pardonu min, Henjo. Mi ne scias kial mi ĵaluzas! Mi ja fidus al vi . . . sed mi tiom amegas vin! Do, estu bona knabino! Kie estas mia ĉapelo? (Prenas ĝin.) Mi esperas reveni je la unua; se ne, mi telefonos. Ĝis la, karegal! (Ili kisas unu la alian. KARLO eliras tra la koridora pordo. HENJO postrigardas lin ame; poste ŝi forportas la vazojn, ordigas la ĉambron, demetas la antaŭtukon. Ŝi forgesas la viŝilon, kiun ŝi lasas apud la telefonon.)

Henjo: Ho viroj, viroj! Unue ĵaluzi kaj ĉagreni nin, poste diri ke vi ĵaluzas, ĉar vi amas! (Iu frapas sur la koridoran pordon.) Envenu! (Kuras al la pordo por renkonti ELIZABETON PLAŬD, kiu envenas, ridetante. ELIZABETO estas tre ŝika, lastmodeca virino, inteligenta kaj gaja, iom malpli malkora ol HENJO.)

Elizabeto: Saluton, Henjo! Mi tre ĝojas revidi vin! Hej, kia ĉarma nesteto!

Henjo: Kara Elizabeto! Envenu kaj kaŝtrinku! Mi dum longa tempo sopiris montri al vi mian hejmeton. (*Helpas ELIZABETON demeti la mantelon.*) Tion mi metos sur pendigilon por vi. (*Iras kun ĝi en la litĉambron.*) Venu; tie ĉi ni dormas . . . kaj tie ĉi ni kelkfoje maldormas, pro ia komplika proceso . . . Mi baldaŭ iĝos juristino mem.

Elizabeto (rigardante en la litĉambron): Kia bela lampo!

Henjo: Jes, onjo Margareto donacis ĝin al ni. (*Montrante la kuirejon.*) Jen la eta kuirejo. Ni tre fieras pri nia fridoŝranko, kvankam ĝi ne estas multe pli granda ol cigaredskatolo!

Elizabeto: Jes, sed mi povas kompreni, ke dum somero butero malpli flua ol advokata parolado estas havinda.

Henjo: Bedaŭrinde ni ne havas nian propran banĉambron; troviĝas unu por du apartamentoj. Sed la studento en la alia apartamento estas bona purema knabo — sciencstudento. Sed kion ni faras, starante! Ni ne vidis unu la alian dum tri jaroj! Ni sidiĝu kaj ĝuu bonan babiladan sesion! Kaj baldaŭ mi pretigos kafon.

(*ELIZABETON sidiĝas sur la sofo, HENJO sur ligna seĝo, en iom neformala pozo.*)

Elizabeto: Do, Henjo, ĉu la geedza vivo ankoraŭ plaĉas al vi?

Henjo: Kara mia, mi estas tre, tre feliĉa.

Elizabeto: Post du jaroj? Ej, Henjo, vi estas tute eksmoda! Sed mi ĝojas; vere mi ĝojas. Mi sciis, ke via Karlo estas inteligenta kaj havas bonan perspektivon por la profesia estonteco . . . sed mi ne certis, ĉu li povos feliĉigi virinon. Tiuj malvarmaj, vortremburitaj juristoj . . .

Henjo: Elizabeto! Karlo tute ne estas malvarma tipo. Li estas tre amema, tiel dolĉa kaj karesema. Vi ne kredus, kiom li dorlotas min. Li helpas min pri la mastrumado; portas donacojn hejmen por mi, parolas al mi ĉiam bone. Kaj ni neniam ajn kverelas, escepte . . . ne. Mi vere estas tre feliĉa junulino.

Elizabeto: Escepte io, ĉu? Mi kredis, ke vi aspektis iomete ĉagrenita, kiam vi malfermis la pordon. Mi timis, ke eble li komencis bati vin.

Henjo: Elizabeto!

Elizabeto: Ho, mi nur ŝercas! Sed ĉu vere iu araneo troviĝas en via supo? Ĉu tiu perfekta edzo havas mankon?

Henjo: Ne . . . Ne . . . sendube mi estas tro sentema. Estas idiote atendi superhoman perfektecon, ĉu ne? Mi estas tre feliĉa, sed . . . Ne . . .

Elizabeto: Sed, sed, sed kio? Serioze kaj sincere, ĉu vi havas etan problemon?

Henjo: Mi estas pli naŭva ol vi . . . Vi multe vojaĝis, vidis la mondon . . . eble vi povos konsili min. Karlo estas tre ĵaluzema, suspektima.

Elizabeto: Ĵaluzema, ĉu? Tio ne estas bagatelo! Ĝi povas endanĝerigi la hejman pacon!

Henjo: Karlo tute ne mistraktas min, sed lia ĵaluzemo ofte ĉagrenas min. Elizabeto, ĉu vi kredas, ke senbaza ĵaluzo estas pruvo de amo?

Elizabeto: Ne. Ĉe la plej feliĉaj paroj, kiujn mi konas, ĵaluzemo apenaŭ ekzistas. Jes, oni povas ĵaluzi, ĉar oni amas; sed mi vidis amojn malpli egoistajn kaj pli maturajn . . . Sed jen, mi teoriadas, dum Karlo ĵaluzas. Kompatinga

mia! Vi tiel hundece, tiel largokule adoras lin, ke mi ne povas kredi, ke vi donas al li kaŭzon por ĵaluzi.

Henjo: Ho ne, nel . . . Sed mi ja havas etan problemon. Tiu sciencstudento en la alia apartamento, Petro Pep, simpatia dekokjarulo, kredas ke li amas min. Ho, tio estas nur bovida amo; sed ĝi povus iĝi ĉarma, senofenda ludo kun guto da romantiko . . . Li nepre forgesos min tuj, kiam li trafos simpatian knabinon samaĝan. Li volas trubaduri min, ne delogi min . . . sed Karlo ĉiam demandadas pri la knabo. Ne plaĉas al li, se mi ridetas al la laktportisto aŭ al la kurbubo de la spicisto. Li neniam legus leteron mian sen mia permeso, sed li ofte petas permeson . . . Kaj se mi parolas al alia viro, surstrate, en butikoj, en kunkeno, Karlo rigardas min kiel kato ĉe musotruo!

Elizabeto: Kato kun tre verdaj okuloj, sendube!

Henjo (ridante): Ne, nel! Sed alie, li estas la plej milda, amema, bonkora edzo.

Elizabeto: Tia ĵaluzo ja estas timinda afero. Ni devas eltrovi rimedon kontraŭ ĝi. Henjo, vin li amas, nepre; sed ĉu li iam rigardas aliajn virinojn?

Henjo: Absolute nel!

Elizabeto: Ideo formiĝas nebule en mia menso. Mi devos streĉi mian risorton. Henjo! Se vi trovus lin en kompromita situacio kun alia virino . . . ?

Henjo (grimacante): Sed tio tute ne plaĉus al mi.

Elizabeto: Ankaŭ vi, ŝajne, estas sufiĉe homa. Sed se la situacio estus fakte tute senkulpa . . . kaj vi mem sciis, ke ĝi estas senkulpa . . . se ni iel aranĝus situacion . . .

Henjo (heziteme): Jes . . . ? Kion vi celas?

Elizabeto: Tiam vi havus la avantaĝon! Vi povus tiam koleri, demandadi, persekuti, kribi, minaci . . . kaj tio estus taŭga leciono por li kaj igus lin malpli postulema.

Henjo: Aŭ ĉu eble mi povus montri, en tia situacio, ke spite ĉion kion mi vidis, mi daŭre fidis al li? Mi certas, ke la klarigo estos bona?

Elizabeto (ridante): Jes, eble tio pli plaĉus al via mola korteto! Mi volus doni al li pli drastan lecionon . . . Sed vi memoras, ke en la lernejo mi ĉiam volis ludi rolojn, konspiri . . . vi memoras, ĉu, pri la bela ĉokoladskatolo, kiu enhavis tri blankajn musojn?

Henjo: Jes, kaj la granda dramo de la forkurinta monahino, kiu fakte estis vi en kurtenoj . . .

Elizabeto: Jen! ek! Mi ĵus trovis ideon. Henjo, mi mem estu la edzrabistino . . . ĉu vi havas ian vualon aŭ ŝalon?

Henjo: Mi havas grandan nigran ŝalon kun longa franĝo; ĝi apartenis al mia avino . . . Karlo neniam vidis ĝin.

Elizabeto: Alportu ĝin! (*HENJO iras en la litĉambron.*) Kaj iom da talkpudro . . . Mi kredas, ke Karlo tute ne memoras min, sed ni zorgu iomete . . . Henjo, mi mem metos vian edzon en kompromitan situacion.

Henjo (revenante kun ŝalo kaj talkpudro): Kiel?

Elizabeto: Ho, se mi ne povos senti lin, mi iel svenos en liajn brakojn aŭ ĉirkaŭbrakos lin . . .

Henjo: Kion vi diros, se li poste procesos kontraŭ vi pro malĉasta atenco?

Elizabeto (ridegante): Mi diros, ke li estas terure maldankema! Rigardu! (*Surmetas lipfarbon pli dike ol kutime.*) Kaj mi iĝos korŝire pala. (*Blankigas la vizaĝon per talk-*

puŝo kaj aranĝas la ŝalon sur la kapo.) Jes; virta sed vulkane arda hispana vidvino, ĉu ne?

Henjo: Ho, Elizabeto, ne farludu plu! Mi aŭdas lian paŝon sur la straton (*Kuras en la kuirejon; tuj revenas.*) Karlo revenas! Kial? — Eble por kontroli pri mia virtulo!

Elizabeto: Estus domaĝe perdi tiun ĉi teatrekan ŝminkadon. Ĉu vi permesas, ke mi tuj ekludu mian rolon?

Henjo (heziteme): E . . . jes . . . se . . .

Elizabeto: Kaŝu vin, do! Nu, kiam li estos en tre ĝena situacio, vi envenu kaj superŝutu lin per demandoj kaj riproĉoj. Ludu vian rolon same vigle kiel mi. Vi estas multe tro bonkora! Estu vera prokurorino; insistu pri lia kulpeco!

Henjo: Kien mi iru . . . ? Mi kaŝos min dum tempeto en la banĉambro . . .

Elizabeto: Kaj envenu, kiam vi vidas aŭ aŭdas ion vere sensacian . . . (*HENJO eliras per la koridora pordo.*) Bone! Nun ni senaplobigos tiun ĉi juriston, kiu kredas, ke oni povas posedi edzinon laŭ kontrakto, sub sigelo, kun aŭ sen hipoteko, sen esceptaj klaŭzoj kaj kun rajto postuli devigan sinkulpigan atestadon . . . (*Ordigas la ŝalon kaj, sidiĝante sur la sofo, penas aspekti kiel eble plej romantike tragika. Paŝoj aŭdiĝas ekstere.*) Jen li!

(*Sed PETRO PEP, la dekokjara studento, timeme frapas sur la pordo, poste enŝovas la kapon. Li estas bona, plaĉa, iom naŭva junulo.*)

Petro: Sinjorino Kvik! . . . Sinjorino Kvik! Pardonon, ĉu sinjorino Kvik estas hejme?

Elizabeto: Ne; ŝi ĵus eliris.

Petro: Dankon. (*Li malaperas, kun aŭdebla vespiro.*)

Elizabeto: Jen, sendube, la sopiranta studento! (*Novaj paŝoj aŭdiĝas.*) Ni esperu, ke nun la juristo venas. (*KARLO envenas.*)

Karlo: Karega, oni ĵus portis mian klienton al la hospitalo por eltranci la apendicon! Kompreneble mi ne povas viziti lin . . . Karega! (*Rigardas en la kuirejon.*) Kara mia! Henjo! (*Rigardas en la litĉambro.*) Kie vi estas? (*Subite eksuspektas denove.*) Kun tiu Pep, eble . . . aŭ en la strato kun iu fripono . . . Henjo! (*ELIZBETO ludas laŭtan ploradon.*) Ho . . . sinjorino, kion vi faras tie ĉi?

Elizabeto (kiu nun ludas rolon, kiu kiel eble plej malsimilas al ŝia kutima maniero paroli kaj gesti; ĉio iĝas ege teatraĉe troigita): Ho, sinjoro Kvik, vi ne rimarkas min, kaj mi tiom, tiom, tiom bezonas vin! — Via edzino invitis min eksidi; ŝi eliris por fari kelkajn aĉetojn. Ŝi tute bone fartas.

Karlo (afable): Ĉu vi bezonas miajn profesiajn servojn, sinjorino?

Elizabeto: Jes, ho jes! Mi bezonas eksedziniĝon. Mi bezonas protekton kontraŭ mia edzo . . . sed urĝe, urĝe. Sinjoro Kvik, mia edzo estas monstro! (*Stariĝas laŭ impona tragika pozo.*) Li batas min ĉiutage; mi estas kovrita per vundoj kaj kontuzoj!

Karlo: Ho sinjorino, sinjorino! ĉu viro vere povas frapi virinon?

Elizabeto: Demandu al mia edzo; frapi min estas lia ĉefa amuzo! Helpu min tuj, sinjoro Kvik!

Karlo: Mi ja helpos vin, sinjorino, se vi estas en tia situacio. Sidiĝu, mi petas. (*ELIZABETO daŭre staras kaj malrapide proksimiĝas al li.*) Vi kredos min malvarma kaj severa; sed vi devas kompreni, ke ni devas pridiskuti la aferon kun malvarmaj kapoj.

Elizabeto: Mia kapo brulas, brulegas! Sentul! (*Ŝi kaptas la manon de KARLO kaj premas ĝin kontraŭ sian frunton. KARLO ĝentile forprenas la manon, poste tuŝas per ĝi sian jakon, rimarkas la blankan makulon de talko kaj videble ekmiras pri la strangaĵo.*)

Karlo: Mi parolis nur metafore, sinjorino.

Elizabeto: Jes, mi komprenas ja ke . . . vi havas malvarman kapon kaj malvarman sangon . . .

Karlo (*elprenante notlibron*): Do, ĉu plaĉos al vi sidiĝi, sinjorino? Ni konsideru la pruvojn. Ĉu ni havos sendubajn pruvojn pri la krueleco de via edzo?

Elizabeto (*daŭre starante kaj proksimiĝante*): Ho jes, jes, sinjoro Kvik! . . . Ah, vi estos mia savanto! Mi povos montri al vi tiom da grandaj bluaj kontuzoj! (*KARLO estas videble ĝenita.*) Vidu, unue mi montros al vi la kontuzan tapeton kiun tiu bruta besto ĵus faris sur mia brusto! (*Ŝi komencas malkovri la bruston, sed KARLO tre rapide haltigas ŝin.*) Ho ve, ve!

Karlo: Pardonu min, sinjorino, sed alia virino devas ĉeesti dum tiaj esploroj. Ni atendu mian edzinon.

Elizabeto: Ho ve! Kion mi do povos fari?

Karlo: Unue ni povos preparoli kaj prinoti multajn aferojn, sen tiaj konkretaj pruvoj . . .

Elizabeto: Ho, kara, kara sinjoro Kvik, mi petegas, ke vi helpu min! Mi estas en vere terura situacio! (*Kaptas liajn manojn kaj rigardas lin petege. Paŝoj aŭdiĝas ekstere.*) Ho, tio estas mia edzo, kiu venas por mortigi min! Savu min! (*Ŝi kvazaŭ freneze ĉirkaŭbrakas KARLON kaj ludas svenon. Li ne povas ne ĉirkaŭbraki ŝin por subteni ŝin. La koridora pordo tre malrapide malfermiĝas.*)

Karlo: Estu kuraĝal Venu al la sofo kun mi! (*Oni aŭdas furiozobruon malantaŭ la pordo. KARLO penas porti ELIZABETON al la sofo, sed trovos ŝin iom peza. Dum li luktas kun la inerta korpo, la pordo pli malfermiĝas kaj PETRO PEP envenas, kolerega.*)

Petro: Protokanajlo! (*KARLO, konsternita, faligas ELIZABETON, kiu subite elsveniĝas kaj ekkoleras.*)

Elizabeto: Mallertulo! Mi terure frapis mian kapon kontraŭ la planko!

Petro: Fia, fripona satiruso! Ho, kial la mondo ne eksplodas? Vi havas la plej dolĉan, bonan, ĉastan edzinon, kies ŝuetojn vi ne rajtus purigi; kaj dum ŝi forestas, vi amin-dumas kun malmorala virino!

Elizabeto (*sidante sur la planko*): Ej, ej, brava junulo, ni preterpasu mian moralon!

Petro: Vi devus hontegi, sinjoro Kvik! Sinjorino Kvik ja meritas virtan viron! (*KARLO malfermas la buŝon por paroli.*) Kaj ne mensogu, makako! kapro! mustelo! Mi vidis ŝin en viaj brakoj! Mi aŭdis vin inviti ŝin al la sofo! Tiun fivirion, kiam vi havas tian karan, indan edzinon!

Elizabeto (*penante ne ridi*): Ho ve! mi ŝatas lin, vere!

Karlo: Nu, junulo, foriru, mi petas. Vi ne komprenas la situacion. Ĉio iros bone, se vi nur estos tiel afabla forlasi nin.

Petro: Forlasi vin, por ke vi povu senĝene perfidi perfektan virinon, ĉu? Prefere mi mortos! Hooo! (*Kun hurlo, li subite ĵetas sin al KARLO. Ili pugnobatas unu la alian. Ili akcidente piedbatas ELIZABETON, kiu rapide restariĝas kaj ekkrias.*)

Elizabeto: Henjo! Henjo! (Ĉirkaŭrigardas; vidas la viŝilon kaj penas disigi la virojn per viŝilaj vipobatoj.)

Karlo (surprizita): Vi vokas mian edzinon! (Dum KARLO atentis ELIZABETON, PETRO preskaŭ renversas lin per granda bato.)

Petro: Vi stulta, aĉa, malfidela, perfida, vulpa, kulpa, malpia, fia mizerulo! (La du viroj renversas la florvazon.)

Elizabeto (senespere faligante la viŝilon): Henjo! Venu tuj! (HENJO alvenas kaj staras ĉe la pordo.)

Henjo (laŭte): Petro! Kion vi faras al mia edzo?

Petro: Li perfidas vin, la porko!

Karlo: Li miskomprenas!

Elizabeto: Li alvenis je maltaŭga momento!

} Kune.

(La du viroj denove furioze batas unu la alian, renversas seĝon k. t. p.)

Henjo: Petro! Cesu! Karlo! Petro! Paciĝu! Kio estas? Estis nur ŝercol! Petro! Karlo! Ho, viroj, viroj, viroj! (Kuras en la kuirejon; revenas preskaŭ tuj kun la piprujo. KARLO kaptas PETRON per la ŝultroj kaj volas skui lin; PETRO kaptas KARLON per la gorĝo kaj volas strangoli lin. HENJO ŝutas pipron inter ili, vikle.)

Henjo: Ĉu vi bezonas la Ĝeneralan Sekretarion de la Unuiĝintaj Nacioj?

(Ambaŭ viroj ternas kaj devas lasi unu la alian.)

Karlo: Kion vi (ternas) faras?

Petro: Mi nur volis (ternas) protekti vin, sinjorino (ternegas) . . . sinjorino (ternegas, poste eligas kun heroa peno) . . . Kviki! (ternas denove).

Henjo: Kompatinda Petro! Sidiĝu! (PETRO sidiĝas sur la sofo kaj tuj ternas.) Pardonu, sed mi devis iel disigi vin!

Karlo: Kiu estas tiu (ternas) sinjorino? (ternas).

Henjo: Ni devas pardonpeti. Ni havis ideon, kiu malsukcesis.

Elizabeto: Ne batu vian edzinon; la ideo estis mia.

Petro: Ne kredu, ne kredu! li invitis ŝin al la sofo! (ternas).

Karlo: Ne faru tiom da bruoj! (ternas laŭtege trifoje) kaj ni eble povos klarigi la aferon.

Elizabeto: Sinjoro Kvik, mi prezentu min pli ortodokse nun; mi estas Elizabeto Plaŭd, amikino de via Henjo.

Petro: Mi ne aplaŭdas.

Karlo: La konfidenca amikino de Henjo!

Elizabeto: Guste tiel. (PETRO ternas.) Mi venis al Henjo, kiel ni aranĝis. Poste, ni volis . . . aŭ almenaŭ mi volis . . . iomete blagi vin. Mi promesis meti vin en kompromitan situacion.

Karlo: Do, vi suk . . . (ternas) . . . cesis.

Elizabeto: Ni intencis nur ŝercon. Sed tiu bona junulo, kiu tre admiras Henjon . . .

Petro: Admiras! Mi amas ŝin . . . (ternegas) . . . mi amos ŝin eterne! (ternas denove).

Elizabeto: Vi diris eterne, ĉu, kaj ne terne? Tiu bona junulo, kiu admiras Henjon, hazarde vidis la belan drameton, kiam mi trudis al vi ĉirkaŭbrakon. Kompreneble, li kredis, ke vi trompas bonan edzinon.

Karlo: Hol (*Paŭzo.*) Jes. Jes, mi komprenas. Jes, ĉio komecas klariĝi.

Henjo: Ĝi intencis, ke nur mi vidu vin en tiu bela situacio.

Petro (*kovrante la vizaĝon per la manoj*): Ho, kia stultulo mi estas, kia idioto!

Henjo: Vi agis tre ĉarme . . . nur erare. (*PETRO aspektas pli feliĉa, kaj restarigas la seĝon. HENJO ridetas al li.*) Dankon.

Karlo (*iom severe*): Fine mi povas kompreni, kial sinjoro Pep batis min. Sed mi ne komprenas ankoraŭ, kial vi volis reĝisori tian drameton . . . eĉ lude kompromiti min antaŭ la edzino. Se tio ja estis ŝerco . . . kaj mi kredas vin . . .

Elizabeto (*humile*): Dankon.

Karlo: Ĉu ĝi estis ŝerco deca?

Elizabeto: Ne, sinjoro Kvik.

Karlo: Ŝercoj kutime plaĉas al mi, eĉ pipraj ŝercoj . . . (*PETRO ternas*) . . . almenaŭ metafore pipraj ŝercoj . . . sed mi amas Henjon tre, kaj geedzeco ne estas frivola afero, sed io sankta kaj serioza. Kial vi elektis tian ŝercon? (*ELIZABETO rigardas HENJON kaj silentas.*) Nu, se nur vi iomete hontas . . . ni forgesu la aferon, ĉu?

Elizabeto: Sinjoro Kvik . . . mi ja estas kulpa . . . sed ĉu vi ne povas vidi motivon?

Henjo: Ne, ne! Ĉiti!

Elizabeto: Mi ne estas juristo, sed nun mi volas fari demandon al vi por helpi vin al justa verdikto. Kiam vi estis en ĝena situacio kun mi . . . kaj tiu studento envenis . . .

kaj tuj suspektis senkulpan, kompatindan vin pri iu fia intrigo . . . kiaj estis viaj emocioj . . . ?

Karlo: E . . . mi ne havis tempon analizi ilin. Nu, koleron . . . ĝenon . . . kaj grandegan surprizon, kompreneble, ĉar mi sciis, ke mi estas senkulpa . . . ĉagrenon . . . doloron pro la ŝajna neeblo konvinki . . . (*KARLO subite silentas kaj ĉirkaŭrigardas.*)

Elizabeto: Ĉu vi komprenas?

Karlo (*malrapide*): Jes . . . mi komprenas.

Henjo: Karlo, ni tute ne intencis tiel drastan lecionon! Mi ne sciis, ke Petro venos.

Karlo: Mi scias, ke vi ne sciis. Jes: mi certas, ke vi ne sciis, ke Petro . . . Jes; mia propra ĵaluzemo estis same senbaza. (*Paŭzeto.*) Bona leciono por mi.

Henjo: Pardonu min, Karlo.

Karlo: Pardonu min, Henjo. Mi preferus instruiĝi sen batalo kaj pipropluvo, sed la leciono mem estis utila. (*Pli gaje.*) Tamen, vi devos pagi pro via eta delikto, ĉu ne? Mi aljuĝos . . . dek kisojn. (*Kaptas la edzinon en la brakoj kaj tuj pagigas tiun punon.*)

Elizabeto: Kaj kio pri mi, kiu pli respondecas?

Karlo: Ho, karcero, nepre. Ni malliberigos vin tie ĉi dum la tagmanĝa horo.

(*PETRO komencas kolekti la falintajn florojn.*)

Henjo: Kompreneble, tio signifas en lia ĵargono, ke li invitas vin tagmanĝi, Elizabeto. Kaj kion, ho kion vi faros pri Petro, kiu agis tiel brave sed tiel malprave?

Petro: Mi meritas, ke vi ĵetu min al la teretaĝo!

Karlo: Ne. Sinjoro Pep, vi ne foriros sen fari ian kavaliran geston al sinjorino Kvik. Mi volas pruvi al ĉiuj, ke mi perdis tiun stultan ĵaluzemon.

(PETRO bukedigas la florojn kaj iras ceremonie al HENJO. Li kliniĝas kaj donas la florojn al ŝi. Ŝi akceptas ilin, kliniĝas, proponas al li la manon. Li kisas ĝin. ELIZABETO kaj KARLO aplaŭdas. KARLO ĉirkaŭbrakas HENJON. PETRO, kiu enspiris pipron sur la mano de HENJO, salutas per grandega terno dum la kurteno rapide falas.)

LA MORTO DE KABIR

Lirika Dramo

PERSONOJ:

KABIR, 85-jara	}	Islamanoj
NANAK, 14-jara		
ABU, proksimume 30-jara		
ALI, proksimume 30-jara		
ISMAIL, 45-jara		
ZAJD, 60-jara	}	Hinduoj
PRAKAS, 50-jara		
ARVIND, 30-jara		
RAM DAS, 60-jara		
MANU, 18-jara		

SCENO:

La ĉefa ĉambro en la domo de la maljuna KABIR, iama teksisto, kiu dum multaj jaroj estis granda religia gvidanto kaj spirita esploristo. Simpla hinda domo de la dekkvina jarcento. La solaj mebloj estas: hinda lito, tre malalta, sur kiu la mortanta KABIR kuŝas sub kovrilo; grandega akvujo kaj kelkaj akvokruĉoj; la malnova teksilo. Tre bela ŝtofopeco pendas sur la muro. Kiam la kurteno leviĝas, KABIR dormas; la disĉiploj sidas sur la planko kaj rigardas lin. La knabo NANAK ploras. Oni devas indiki distingon inter la hinduoj kaj la islamanoj per malsimilaj vestoj, ekz. la islamanoj portas turbanojn. KABIR kaj NANAK portas la atributojn de nek unu religio nek la alia. KABIR vekiga; tuj ISMAIL alrapidas kun akvokruĉo.

Ismail: Ĉu vi soifas, Majstro?

Kabir (malforte sed klare):

Ne, ne plu.

Mi nun soifas nur al plena ĝu'
de liberiĝo, ĉar mi baldaŭ vivos,
kie mi nek malsatos, nek soifos,
nek strebos plu en malperfekta scio,
sed iĝos ero en la mens' de Dio,
preter konflikto kaj dezir' tortura,
vivos sen ĉi ĉifita korp' malpura;
mi dankas vin; sed akvo ne signifas,
kaj nur al liberiĝo mi soifas.

Abu: Ho, Majstro, kial vin forŝiras Fato?

Kabir: Por ke ni ambaŭ evoluu, frato.
Nanak, plej kara knabo, ne plu ploru;
Dio min liberigas; Lin adoru.
Se vi fieras, ĉar vi iĝas viro,
ĝoju kun mi pro mia plueniro.

Nanak (*tra larmoj*):

Mi penos, Majstro!

Kabir: Karaj fratoj, venu
proksimen, por ke mi patrece benu
vin por la lasta fojo; kaj mi volas
paroli — sed malforte mi parolas . . .

(*La DISCIPLOJ aranĝas sin apud KABIR, ALI metas ku-
senojn por apogi la kapon de sia gvidanto.*)

Ram Das:

Pli dolĉaj ol mielo kaj ol oro
pli brilaj, viaj vortoj en la koro
dum longa tempo gvidis nin, pacigis
nin malsamulojn, en frateco ligis.

Zajd: Majstro, al ni vi montris veran bonon.
Neniam ni forgesos lecionon
tiel benatan, sanktan.

Prakaŝ: Benu nin,
ho kara Majstro de l'fratec-doktrin'.
Kun islamanoj mi pro la instruo
de vi, volonte manĝas, mi, hinduo.

Ali: Mi, islamano, la hinduojn amas;
Ŝiva kaj Alaho sekrete samas;
kaj tiuj, kiuj ŝajnis nur idoloj
nun ŝajnas belaj, noblaj di-simboloj.

Arvind: Ni pensos tolereme; ni progresos.

Ali: Neniam la instruon ni forgesos.

Kabir: Neniam vi forgesos tion, ĉu?
Mi ĝojas, ĉar mi ne instruos plu.
Kiam vi staros antaŭ vivdilem'
vi devos nun instrui vin, vi mem;
ĉar mi forflosas sur la Dia tajd':
mi benas vin, ho Abu, Ali, Zajd,
Ismail, miaj karaj islamanoj;
restu en simpla vivo vivsultanoj,
ĉar bonfarante, vi ja regos ĉion,
kaj plenposedos sanktan imperion;
Ram Das kaj Arvind kaj Prakaŝ kaj Manu,
mi benas vin; en simpla viv' nirvanu,
ĉar, bonfarante, vi posedos veron
kaj jam eniros pacon kaj liberon.
Nur penso kaj bonfaro estas fortoj;
ĉiaj restaĵoj estas kelkaj vortoj
Vi amu Dion laŭ la propra scio;
pli ol vi amas Lin, vin amas Dio.
La homa vivo estas pli komplika
ol iu ajn formulo; do, amika
ĉiu kun ĉiu hom' alia, restu.

Fratecon en la mondo vi atestu.
Mi malfortiĝas

Ali: Jes, ni ĉiam rolos
laŭ via vol'

Ismail: Silentu! Li parolos
denove.

Kabir: Jam sur min premeĝas gloro,
kiun mi ne komprenas. Metaforo
eble vin helpas . . . el teksist-metio . . .
ĉar ni komprenas laŭ la propra scio . . .
Jen, indan uzon sur la mur' atendas
mia teksaĵo, kiu tie pendas;
mia plej bela; tie, la fadenoj
nigraj kaj oraj, noktoj kaj matenoj,
purpuraj, ruĝaj, rozkoloraj, brilas;
ĉiu fadeno en teksaĵ' trankvilas;
apartaj fadenaroj samkoloraj —
jes, eĉ la kostaj fadenaroj oraj,
inter fadenoj eble la bramanoj —
ŝajnas banalaj en teksistaj manoj;
sed kiam ĉiuj en la ŝtof' kuniĝas,
la desegnita ŝtofo bunte riĉas.
Cu vi komprenas? . . . Velkas mia forto
Fratoj

(Li kviete mortas.)

Ismail: Ho vel jen lia lasta vorto.

(Li kontrolas la pulson kaj spiron de sia Majstro.)

Adiaŭ kaj adiaŭ! ho Kabir!

Ram Das:

Adiaŭ, nia Majstro! nobla vir'!

Prakaŝ: Foriris amo, bonfaremo, gvido.

Abu: Adiaŭ, Majstro!

Nanak (*fidoplene sed modeste*):
Majstro, ĝis revido!

Zajd: La knabo pravas; ne en ĉi surtera
valo, sed eble en la mond' libera
ni lin revidos. Tial, ni ne febru,
sed dece kaj ameme lin funebru.

Ismail: Lia teksaĵo trovos uzon indan.

(Li deprenas la belan ŝtofopecon, iom aranĝas la kadavron
de KABIR kaj respektplene kovras lin.)

Zajd: Kaj ankaŭ ni bezonos ŝtofon vindan.
Nu, blankan tolon, eble.

Prakaŝ: Kial ligi
la Majstron vinde?

Zajd: Por lin enterigi
dece.

Ram Das:

Aĉega penso el serajlol
Li devos bruli sur la sankta fajro:
spicoj, santalo, floroj ĝin parfumos,
puriga, sankta fajro lin konsumos;
kiam la korp' atingos taŭgan ŝanĝon
ni ĵetos liajn cindrojn en la Ganĝon.

Abu: Jen viaj superstiĉoj venas trude!

Arvind: Vi krudaj homoj jam parolas krude!

(La voĉoj laŭtiĝas, dum la disputo iĝas ĉiam pli akra.)

Ali: Ne estas ni kruduloj, aĉa fetol!
Ni estas la servantoj de l'Profeto!

Manu: Ne decas enterigi lin, kaj lasi
vermojn kaj aĉajn larvojn lin trapasi!

Ismail: Silentu, vi, bubaĉo! Ne blasfemu!

Prakaŝ: Silentu mem, hundid', ne anatemu!

Ali: Vi, vindrinkanta ido de hetajro,
ne plu parolu pri l' ofenda fajro!
Ĉu ni bruligu lin? Ĉu estas li
ia rubaĵo, elĵetaĵo? Fi!
Li, nia nobla Majstro, li, sanktulo?

Zajd: Ni enterigos lin.

Arvind: Silentu, nulo!

Ram Das:
Cedu al mia sankta sci' bramana.

Abu: Kanajlo superstiĉa kaj profana!

Ram Das (*glacie kolerega*):
Mi frapus vin; sed la puremo baras.

Nanak (*angore*):
Ho, fratoj, fratoj, kion nun vi faras?
Kvereli ĉe l' kadavro de Kabir?
Kia hontego, fratoj, kaj delir'!
Ho fratoj, fratoj!

Ram Das:
Knab', vi ne komprenas.
Funebron lian ili nun venenas.

Abu: Li superstiĉas en spirita strabo.
Vi ne komprenas la diskuton, knabolo!

Nanak: Vi estas ja pli aĝa; sed ĉu li
ne diris, ke ni ĉiuj laŭ la sci',
kiun ni havas, devos agi? Ĉu
tolero ne valoras pli ol bru'?

Ram Das:
Modestan toleremon mi ja havas,
sed ne pri tio ĉi; ĉi tio gravas.
Ili frenezas plene pro dezir'
profani la kadavron de Kabir!

Zajd: Per konsumiĝo deca kaj natura!

Arvind: Longa putriĝo en la ter' malpura!
Ni ne akceptos vian vindan tukon!

Abu: Ne bakos vi la Majstron kiel kukon!

Prakaŝ: Ho herezul'! La fajro estas sankta!

Ali: Ĝi estas superstiĉo stulta, vanta!

Ram Das:
Volonte mi elverŝos mian sangon,
aŭ elŝirigos mian propran langon,
antaŭ ol mi permesos malvirece,
ke oni nian Majstron, fi! maldece
funebru.

Zajd: Ho, mizera malbenito!

Ali: Se argumentoj temas pri milito,
mi estas preta, pro la Majstro!

Manu: Kaj
mi ankaŭ!

Abu: Kiu, vi, malpura fraj'?
Vi, naŭza fekajbulo?

Manu (*furioze*):

Porkviando!
kaj porkinido!

Abu: Do, jen porka plando!

(*Li vangofrapas MANU.*)

Ram Das:

Lasu la knabon, hundo, aŭ mi penos
vin bridi —

Abu: — kaj pistadon partoprenos!

Prakaŝ (*penante teni lin*):

Ho islaman', respektu la bramanon!

Abu: Forigu vian malpuregan manon!
(*Li frapas PRAKAS.*)

(*RAM DAS tuj frapas ABU, ABU frapas RAM DAS kaj PRAKAS frapas ABU. MANU, post momento de konsterniĝo, ankaŭ eniras la lukton, kiu komencas iĝi grava afero.*)

Arvind: Cu vi, la Alahanoj, batas nur
knabojn kaj multjarulojn, en sekur'?
(*Atakas ABU.*)

Ali: Cu unu solan homon batas kvar
hinduoj, laŭ la leĝ' de l' hinduar'?

(*Li atakas PRAKAS kaj MANU.*)

Zajd: Instruu ilin do per forta man'
pri la maldeco de la tomb-profan'!

(*ABU falas, ISMAIL kuras por helpi lin, ARVIND frapas ISMAIL. ABU leviĝas. ZAJD krias instige. Dum iom da tempo la kverelantoj batalas nur per pugnobatoj, sed subite*

ALI, kolerega, elprenas ponardon kaj penas mortpiki MANU.)

Ali: Flamema, iru al infera flamol!

(*NANAK ĵetas sin inter ilin.*)

Nanak: Ho Majstro, helpu! Helpu, Dia amol!

(*ALI maltrafas MANU, sed malgrave vundas la manon de NANAK. Li faligas la ponardon.*)

Ali: Ho, dum sep jaroj miaj fratoj karis!
Ho, helpu, Alahol! Kion mi faris?

(*La aliaj ĉesas interbatali.*)

Ram Das:

Ponardol! Sangelfluo! Ho, ĉu fratoj —
tiel rapide iĝas malamatoj?
Mi hontas.

Ismail: Ankaŭ mi.

Zajd: Kaj mi, pli aĝa,
ne estis kiel taŭgus, hom' pli saĝa.

Ali: EBLIS posedis min! Damnata klingol!
Kaj pli damnata mi! Mi ĝin el ingo
tiris por murdi, senkulpulon lezis!

(*Li batas la propran bruston kaj ploras.*)

Nanak: Mi ne vundiĝis grave.

Arvind: Ni frenezis.

Ram Das:

Pardonu min, ho Zajd; mi pekis tre.

Zajd: Pardonu min, mi pekis; ve, ho ve!

Abu: Manu, pardonu min; Arvind, Prakaŝ,
pardonu pro la furioza draŝ' —
mi hontas.

Arvind: Pardonite min pardonu,
mi petas.

Prakaŝ: Pli trankvile ni rezonu.

Ram Das:
La Majstron pli sincere ni respektos,
se la funebran agon ni elektos
post diskutad' frateca, deca.

Zajd: Amen!

Ismail: Ram Das, vi plene pravas; jes; sed tamen
vera dilem' ekzistas; en sincero
ni kredas je l' sankteco de la tero
kaj volas enterigi lin; en sama
sincero kredas vi je fino flama.
Kion ni faru? ĉar nek flama tero
nek tera flam' ekzistas.

Ram Das:
Jes, jen vero.

Abu: La tero floras.

Manu: Kaj la fajro brilas.

Ram Das:
Kaj kompromiso nepre malfacilas.
Mi estas preta kompromisi mem,
sed kie estas solvo de l' dilem'?
Kvankam hontinde, peke, ni batalis,
la grava malkonsento ja realis.
Nanak, dum ni fivortojn, batojn ŝutis,
vi sola kiel Kabiran' kondukis.

Ni ĉiuj volas montri nur respekton,
sed la enigmo venkas intelekton.

Ali: L' ideo de la tero naŭzas vin.

Arvind: Fajro ne taŭgas, laŭ l' profet-doktrin'.

Ram Das:
Kion ni faru?

Nanak: Mi ne scias. Eble
se preĝos ni, kviete kaj funebre,
eksidos kaj meditos en trankvilo
kaj ne plu certos ni en malhumilo . . .
eble — ne scias mi — el ia fonto
de Dia amo venos la respondo.

Abu: La preĝo de pekulo estos vana!

Nanak: Venas la kuracist' al hom' malsana.

*(Ĉiuj eksidas kaj komencas preĝi aŭ mediti laŭ persona kaj
grupa stilo. Paŭzeto.)*

Zajd: Alaho, Kompatema, Malrigora,
inspiru nin per ia lumo kora;
ni frontas oftan homan tragedion:
volas bonfari, sed ne havas scion.

Ram Das:
Sinjoro Kriŝna, sendu veran gvidon.
Ne havas ni komprenon aŭ klarvidon.

(Paŭzeto.)

Ali: Ho ve! La mens' turniĝas, sed ne iras!

Manu: Konfuzo kaj konflikto la koron ŝiras!

Nanak (heziteme):

Eble ni trovos ian helpan saĝon,
se nun ni rerigardos la vizaĝon
de nia Majstro. Tiu paco nobla
eble fortigos nin per pac' duobla.
Li ne ĉeestas; ĉar la viv' ŝuldita
al Di' pagiĝis; sed la karn' muldita
per la animo de Kabir' dum jaroj
ankoraŭ belos kiel la nufaroj
trankvile belas sur la lagoj. Li
vivis en flore dolĉa harmoni';
se la vizaĝon nun ni rerigardos,
eble animoj lacaj ree ardos;
ni eble, eble, povos nin absolvi
kaj la problemon pri funebro solvi . . .

Ram Das:

Mi kredas, ke vi pravas.

Zajd: Do, ni provu.

Ismail: Kaj la teksaĵon kun respekt' forŝovu.

(NANAK, RAM DAS kaj ISMAIL tre zorgeme forprenas la ŝtofopecon. La kadavro de KABIR ne plu ĉeestas. La lito estas kovrita per amasego da freŝaj rozoj.)

Nanak: Fratoj, la Majstro ne ĉeestas plu.

(Ĉiuj surgenuiĝas.)

Dio nin helpas vere; jen instru'.
Dum frenezigiĝis ni en furiozoj,
lia animo kantis en libero,
kaj lia morta karno iĝis rozoj,
la sanktaj flamoj de la sankta tero.

(Kurtenfalo.)

LIBERIGO

Unuakta Tragedio

PERSONOJ:

MARIJA STOJIC, proks. 30-jara
NADA VANEK, proks. 25-jara
ZDENKA LEVAR, proks. 18-jara
LJUDMILA LEVAR, proks. 13-jara
DRAGOMIR SEKULIC, proks. 30-jara
MIRKO ZIC, proks. 30-jara
JOSIP HRIBAR, proks. 25-jara
IVO LOGAR, proks. 20-jara
GABRIJEL REBOV, proks. 15-jara
HEINRICH LORENZ, proks. 35-jara

TEMPO:

Dum la lastaj tagoj de la Naciliberiga Milito en Jugoslavio.

SCENO:

Ce la pordo de kampara dometo ie en Jugoslavio: simpla pura dometo, malriĉa sed agrabla; kelkaj floroj apud la pordo. Kuglotruoj en la muro. Apud la pordo MARIJA STOJIC sidas sur benko. Si portas kamparaninan kostumon. Iam ŝi estis bela; nun ŝi restas iom bela, sed suferego lasis siajn postsignojn sur ŝia vizaĝo, kaj ŝia hararo estas frue duongriziĝinta. Si estas tute kripla ĉe la piedoj kaj kruroj. NADA VANEK venas el la domo kun du kudraĵoj, kaj, sidiĝinte sur la benko, donas unu el ili al MARIJA. Ili komencas kudri.

Marija: Dankon, kara Nada. Vere mi tre ĝojas revidi la ĉielon kaj la florojn . . . kaj jen, Nada, muŝo! Mi preskaŭ forgesis, ke muŝoj havas flugilojn . . .

Nada: Ĉu la muŝo ĝenas vin, Marija? Ĉu mi mortigu ĝin por vi?

Marija: Ne, ne, Nadal vi miskomprenas. Ne mortigu ion ajn por mi. Vidu, tiu muŝo havasflugilojn kaj krurojn. Ĝi povas flugi, kuri, danci en la libera aero . . . Kiel la vivo estas mirinda, Nada! Mi volas vivi . . . jes, mi ankoraŭ volas vivi . . .

Nada: Kaj ni vivos, Marija; ni vivos. Baldaŭ nun la lastaj nazioj kaj faŝistoj estos for, kaj denove ni havos nian propran landon, niajn proprajn regantojn. La murdoj, la sklavigoj, la rabado, la torturoj ĉesos. Ni estos ni denove.

Marija (feliĉe): Jes. La suno brilas . . . kaj la muŝoj libere dancas en la sunlumo . . .

Nada: Kaj, Marija . . . ĉu vi vidas la eblon de ia ajn feliĉo por vi mem . . . kun viaj memoroj . . . ?

Marija: Jes. Iam feliĉon. Mia popolo estos libera . . . kaj eble ni vidos pli bonan vivon . . . eble la nova Jugoslavio povos trovi ian taŭgan laboron por kriplulino . . . precipe por militkriplulino . . .

Nada: Eble oni kompensas vin.

Marija: Eble, eble; sed dinaroj ne pagas krurojn kaj sangon kaj virinecon! Sed mi vivos . . . mi flaras esperon en la aero. Kaj vi, Nada; vi ja ne estas stumpa hompeco kiel mi; sed vi havas viajn memorojn pri la nazioj . . .

Nada: Jes, sed plej bone, peni forgesi. Ni ĉiuj devos multon forgesi por ne frenezigi. Dank' al Dio, ke mi ne naskis infanon. Eble mi eĉ edziniĝos iam . . . kiam mi povos venki mian abomenon . . . ne ĉiuj viroj estas tiaj, ĉu?

Marija: Nepre ne. Vi estu feliĉa, Nada; vi rajtas. Vi trovu por vi ian karan, bonkoran viron, kiu havas homan kom-

prenemon . . . iun kiel tiun kuraciston el Beogrado . . . kaj eble vi forgesos tiujn monstrojn . . . Ĉu iu venas?

Nada: Jes, la fratinoj Levar.

Marija: Ĉiam, kiam mi rigardas etan Ljudmila'n, mi ĝojas, ĉar ni sukcese kaŝis tiujn junulinojn; ili devas forgesi nur timon kaj malsaton . . .

(ZDENKA LEVAR kaj LJUDMILA LEVAR alvenas. Ili estas tre ekscititaj kaj ĝojplenaj. Oni emfazas la junecon de LJUDMILA.)

Zdenka: Ho, Marija sidas ekstere!

Nada: Bonan, Zdenka, bonan, Ljudmila. Jes, mi sukcesis helpi ŝin al la pordo. Estis terura trenlaboro, ĉar ŝi tute ne povas stari eĉ; sed valoris la penon!

Zdenka (kisante MARIJA'n): Kara Marija, mi tiel ĝojas vidi vin en la sunlumo. Plifortiĝu rapide!

Ljudmila (kisante MARIJA'n): Vi devos resaniĝi tuj nun, Marija, por marŝi kaj . . . kaj por danci! Ĉio estos tiel mirinde bela! Pretiĝu por danci en la stratoj!

Marija (kun melankolia rideto): Mi faros laŭ miaj plej bonaj ebloj, kara eta Ljudmila. Sed mi ne tro promesos . . .

Zdenka (emociita): Kara Marija, ni ĉiuj tre amas vin! Vi oferis vin por savi aliajn; la vilaĝo neniam forgesos! Sed, Marija, jen belegaj novaĵoj! Ni sukcesis trafi la liberan radion — tutan elsendaĵon, Marija, kapitulacoj ĉie! La nazioj estas vere venkitaj; la lastaj tagoj jam alvenis!

Nada: Ne tro laŭte, Zdenka; ili ankoraŭ nestas kelkloke, ne malproksime; sed kia ĝojo!

Zdenka: Nia propra lando! Niaj propraj homoj regos nin! Ni kreskigos nian propran maizon; ni melkos niajn pro-

prajn bovinojn! Oni ŝajne kaptas naziojn kaj perfidulojn ĉiel! Ili forkuras, detruante, mortigante; sed ili ja forkuras! Baldaŭ ĉio estos finita!

Marija: Kaj la vera vivo komenciĝos! — Mi preskaŭ povas denove ekkredi pri la ekzisto de Dio!

(Bruo ekstere.)

Nada: Kio estas tio? (LJUDMILA kuras por rigardi.)

Zdenka: Mi ne scias kion fari! Mi volas kanti . . . sed tiel malmultaj restas en la vilaĝo por kanti . . . mi volas ridegi . . . kaj mi volas ploreĝi . . .

Marija (kiam LJUDMILA revenas): Ĉu sekure, Ljudmila?

Ljudmila: Jes, jes! Partizanoj! Niaj liberigantoj! Kelkaj nur — kvar, kvin. Ili venas al ni.

Nada: Ni bonvenigu ilin. Boteleto restas.

(La PARTIZANOJ envenas: DRAGOMIR SEKULIĆ la ĉefo, forta homo, bonkora kaj klera, sed nun duone bestigita per suferoj; MIRKO ZIC, pli kruda, kamparano; JOSIP HRIBAR, simpla homo, tre forta; IVO LOGAR, nerv-frakasita, hezitema malfortulo, tre suferinta kaj jam ĉe la rando de frenezo; GABRIJEL REBOV, 15-jara knabo.)

Dragomir: Kamaradinoj, ni bezonas ion por manĝi.

Marija: Panon kaj ovojn ni havas. Malmulto cetera restas.

Dragomir: Sufiĉos. Kaj akvon por lavi nin.

Marija: Tre facile.

Zdenka: Mi iros al la puto. (Foriras.)

Ivo: Ĉu vi estas vundita?

Marija: Jes; sed la vivo estos pli bela nun.

Dragomir: Multe pli bela. Jes, kamaradino, venas la fino de la suferoj; ni kreos pli justan socion; ni kreos progreseman, pacan landon . . .

Nada: Mi ne komprenas tion . . . ni estas simplaj kamparanoj . . . sed se vi forĉasis la naziojn, vi ĉiam estos bonvenaj ĉe ni.

(LJUDMILA, entuziasma kaj emociita, ĉirkaŭbrakas JOSIP.)

Ljudmila: Ho partizanaj kamaradoj, kiom ni ŝuldas al vi! Kiom ni ĝojas vidi vin! Mi helpos kuir grandegan ovaĵon por vi!

Josip (ridas kaj kisas ŝin): Hej! bona knabino!

(ZDENKA revenas kun granda akvokruĉo.)

Ljudmila: Ho franjo, franjo, mi ne scias kion fari, mi estas tiel feliĉa!

Josip (ridante kisas ZDENKA'n): Kaj la fratinon, ĉu? Hej, permesu!

Mirko: Bonega ideo! (Li volas kisi NADA'n, ridante. Ŝi krias proteston kaj kovras la vizaĝon.) Ej, ĉu vi estas tro pruda por doni bonvenigan kison al viro, kiu riskis sian vivon por savi vin? *

Nada: Ne tuŝu min! Ne tuŝu min! Mi petegas!

Marija (urĝe): Lasu ŝin, mi petas, kamarado; mi klarigos poste.

Dragomir: Diable! ni ne bezonas lecionojn pri konduto pere de civiluloj, kiuj ne riskis!

Mirko (eksplode): Ni ne tuŝu vin, ĉu? Kaj kial ne? Ĉu ni ne estas sufiĉe bonaj por vi? Ivo, jen virino — venu kun

mi! Virino bonfaros al vi, vi ne plu restos sendorma . . .
venu!

(Li kaj IVO fortrenas NADA'n, kiu kriegas preskaŭ nehome.)

Nada: Ne! Ne! Ne! Ne denove!

Marija: Kuru, Ljudmila, kuru, Zdenka! Mi konas tiun humoron! For, for!

Josip: Kaj jen por mi! *(Postkuras ZDENKA'n, kiu forkuras, LJUDMILA forkuras, kriegante.)*

Gabrijel: Ĉu mi rajtas?

Dragomir: Jes, jes . . . ĉio licas . . . kaptu . . . vi meritas . . . vi bone batalis . . . Vi stultulinoj! Tiuj aferoj ne okazus, se vi estus pli ĝentilaj al viaj savintoj! — Kaj vi, kun tiu lernejestrina mieno . . . ĉu vi ne havas decan bonvenon por mi?

Marija: Ŝi mortu tuj! Dio permesu, ke ŝi mortu tuj!

Dragomir: Kaj vi . . . *(Li komencas forŝiri ŝiajn vestaĵojn en subita besta amoro.)*

Marija: Vi bezonas virinon, ĉu ne, kamarado?

Dragomir: *(moke)*: Vi estas pli inteligenta ol mi kredis!

Marija: Serĉu aliloke, kamarado; ĉe mi vi ne trovos tion, kion vi deziras. *(DRAGOMIR lasas ŝin.)*

Dragomir: Kion vi diras?

Marija: La nazioj venis antaŭ vi. Ni sopiregis vian alvenon, kamarado. La partizanoj . . . niaj liberigontoj . . . niaj savontoj . . . kaj jen vi venas, kamarado . . . kiel bestoj . . . mi ne plu estas virino, kamarado. La nazioj brulvundis min, tranĉis min, torturis min . . . Levu mian jupon, se vi

volas. *(DRAGOMIR hezitas.)* Jes, vi rajtas levi mian jupon; nur partizano rajtus . . . vi volis antaŭ momento, ĉu ne? *(DRAGOMIR heziteme kaj respektete levas parton de ŝia jupo, kaj vidas la malsupran parton de kripligitaj, multe bandaĝitaj kruroj.)* Jes; la nazioj frakasis ĉiujn ostojn en miaj gamboj, forbrulis mian virinecon, ĵetis min sur sterkejon por morti . . . miaj amikinoj savis min, sed oni diras, ke mi neniam plu marŝos . . . Sed mi vivas . . . kaj hodiaŭ, mi ĝojis pro la sunlumo, kaj ĉar baldaŭ ni estos . . . liberaj.

Dragomir *(malfacile)*: Pardonu min.

Marija: Volonte.

Dragomir: Milito estas tia. Ho ve! Mi antaŭe vidis tiajn frenezojn, tiajn bestigojn . . . Ho ve! Kaj nun mi mem bestiĝas . . . Iam ni eĉ promesis ĉastecon dum la milito. Sed finfine oni eksplodas.

Marija: Vi estas la ĉefo, ĉu ne?

Dragomir: Jes.

Marija: Ĉu vi povas savi la aliajn?

Dragomir: Mi ne scias; mi povas peni. *(Li intencas forkuri, sed subite MIRKO kaj IVO revenas; IVO perdis la mensan ekvilibron.)*

Mirko *(sincere konsternita)*: La ino . . . la ino . . . tuj mortis.

Dragomir: Kio?

Mirko: Ŝi baraktis . . . ni fortrenis ŝin . . . al la kampo . . . ŝi, ŝi havis ian pendaĵon . . . sur la kolĉeno . . . iel ŝi portis ĝin al la buŝo . . . konvulsiis . . . falis . . .

Dragomir: Ĉu certe morta?

Mirko: Mi bone konas la morton.

Marija: Kuracisto el Beogrado rifuĝis ĉi tie dum kelkaj monatoj. Estis li, kiu flegis min kaj savis mian vivon. Mi petegis al li, multfoje, ke li donu al ni ion . . . por ke tiaj aferoj ne reokazu . . . kaj poste ni ĉiam portis. (*Montras sian propran kolĉenon kaj pendaĵon.*) Ni portas la morton super la koro. Mi ne scias, kio estas . . . mi estas neklera . . . sed tiu kuracisto komprenis nian bezonon.

Mirko: Sed kial mortigi sin? Ĉu tiaj aferoj tiel gravas?

Marija: La nazioj seksperfortis ŝin. Multaj nazioj. Ŝi eĉ ne certas pri la kalkulo.

Mirko: Ĉefo, donu al mi taskon, tuj!

Dragomir (*angore*): Savu la aliajn! Ho ve, kio ni iĝis? Kiaj ni estas?

(*MIRKO forkuras, IVO ekplore gas freneze.*)

Ivo: Kamarado Sekuliĉ, mortpafu min tuj! Mi volis esti virol! Mi volis gustumi virinon! Mi kaptis virinon! Kaj ŝi mortigis sin en miaj brakoj! Mortigu min tuj, mi petegas! Mi ne plu rajtas vivi! Mi ne plu volas vivi!

(*DRAGOMIR ĉirkaŭbrakas lin kaj tenas lin forte.*)

Dragomir: Ivo, mia Ivo.

Ivo: Patreto, pardonu min! Mi ne sciis, kion mi faras!

Dragomir (*pli aŭtoritate, sed ĉiam milde*): Ivo, vi estas nur dudekjara; Mirko kaj Josip kaj mi estas multe pli aĝaj, kaj ni volis fari same. Jes, Ivo, eĉ mi, dum blinda kruela momento. Ivo, mi ordonas al vi, savu la aliajn se vi povas. Ho vel kio ni iĝas? (*IVO foriras, DRAGOMIR ĉirkaŭrigardas.*) Kio okazas? — Bonan novaĵon! Mi vidas la alian plenaĝulinon! Ŝi savas sin!

Marija: Zdenka . . .

Dragomir: Jes, ŝi savas sin . . . sur la monteto . . . Josip stumblis . . . jes, jen Mirko postkuras lin . . . ŝi miskomprenas, kuregas . . . ne, nun ŝi komprenas; ili pardonpetas . . .

Marija: Kaj la knabino! Ljudmila estas dektrijara! Ĉu la liberiga armeo seksperfortas infanojn?

Dragomir: Gabrijel ĉasis ŝin . . . ho ve, li estas preskaŭ infano mem. Dekkvinjara. Jen Ivo kuras post li . . . ili estas tre bonaj amikoj . . . eble ĉio iros bone . . . Eble niaj infanoj komencos kunludi nature . . . Tiu rekrutigo el la lernejo estas abomena neceso! Sed eble vi povas kompreni . . . kiel vi nomiĝas, kamaradino?

Marija: Marija Stojiĉ.

Dragomir: Dragomir Sekuliĉ. (*Sidiĝas apud ŝi.*) Marija, vi suferis preskaŭ preter la limo de la homa sufer-kapablo; ĉu vi povas pardoni min?

Marija: Jes.

Dragomir: Vi eble scias . . . kiel longa suferado bestigas la homojn. Iam mi estis ĉefo inter dudek kamaradoj; nun kvin restas. Mi vidis virinojn torturitajn preskaŭ same kiel vi. La nazioj mortigis mian panjon. (*MARIJA simpatie prenas lian manon.*) Jes, mi mem vidis la kadavron de mia panjo; tute sangruĝan . . . kiel senvaloran viandon en la rubejo de la buĉisto . . . Mi neniam vidos mian panjon plu. Marija, ĉu vi komprenas?

Marija: Jes.

Dragomir: Ĉu vi iam ajn mortigis homon?

Marija: Ne.

Dragomir: Mi, jes. Mortigi unu homon estas ege malfacile. Vomaĵo en la gorĝo, rigidaj manoj, kortamburado. Mortigi la duan, la dekduan, la dudekan . . . nenio! Kaj oni ekapetitas . . . oni sonĝas sange. Ĉu vi komprenas? Oni vekigas kredante, ke sango plenigas la okulojn. Oni flaras sangon en rozoj kaj ruĝaj pomoj kaj ruĝa vino. Mia amiko Ivo kelkfoje levas la manon por forviŝi sangon el la okuloj; mi ĉiam timis tiun geston, kaj nun li estas duonfrenetza. Kaj virinoj! Virinoj estas molaj, estas dolĉaj, odoras patrinece . . . kaj donas magian forgeson . . . dum longa tempo ni ne proksimiĝis al virinoj, kaj vi . . . vi kvazaŭ senekvilibrigis min . . . Kaj mi neniam plu vidos mian panjon.

(Krioj ekstere.)

Marija: Ljudmila!

Dragomir: Ne.

(MIRKO, IVO, JOSIP kaj GABRIJEL revenas. Ili trenas HEINRICH LORENZ, kies manojn ili jam ligis. HEINRICH portas nazian uniformon, preferinde altrangan.)

Josip: Vidu, ĉefo, ni kaptis iun!

Marija: La knabineto . . . ĉu la knabineto estas sekura . . . ?

Gabrijel: Kia knabineto? — Ho, jes. Mi forgesis ŝin. Mi ĉasis ŝin, kaj kuglo subite maltrafis min per nur duonmetrol

Mirko: Ŝi estas nun kun la fratino.

Marija: Dank' al Dio!

Dragomir: Kaj ĉu tiu estas la kaŝpafisto?

Mirko: Ne; la kuglo venis el alia direkto; aliaj ŝajne restas.

Dragomir: Nazio altranga . . . eble plej prudente mortpafi lin tuj. *(MARIJA falas svene.)*

Ivo: La virino!

Josip: Ho, la virino mortas. *(Iras al ŝi.)* Ne, svenas.

Dragomir: Gabrijel, helpu min. Akvon. *(GABRIJEL portas la akvokruĉon. Ili ĵetas akvon en la vizaĝon de MARIJA, rektigas ŝin sur la benko, trinkigas ŝin.)*

Heinrich (defie): Heil Hitler!

Mirko: Silentu, porkaĉo! *(Frapas lin sur la buŝo.)*

Dragomir: Marija, ĉu vi fartas malbone? Ĉu tro da emocioj . . . la morto de via amikino . . . ?

Marija: Ne, ne . . . mi bonfartos tuj . . . mi alikutimiĝis jam al ŝokoj kaj teruraĵoj . . . sed . . .

Ivo: La virino ne mortas, ĉu? Ne mortigis sin?

Dragomir: Ne, ne. Marija, kio estas?

Marija (gestante al HEINRICH): Mi ne atendis iam ajn revidi lin . . .

Dragomir: Lin . . . ?

Heinrich (arogante): Heinrich Lorenz, oficiro de la Germana Tria Regno!

Marija: Vi ne prezentis vin tiel formale antaŭe . . . Iom pli da akvo, mi petas. Dragomir. *(DRAGOMIR trinkigas ŝin, rigardas la nazion, komprenas subite.)*

Dragomir: Tiu ĉi nazio estas la oficiro, kiu venis en vian vilaĝon antaŭe, ĉu, Marija? . . . kiu ordonis la mortojn, la torturojn, la sistemajn seksperfortojn . . . ĉu estis li, kiu torturis vin kaj por ĉiam kripligis vin? *(MARIJA kapjesas. DRAGOMIR paŝas rekte al HEINRICH kaj fiksrigardas lin.)* Kaj mi intencis nur mortpafi lin! Kamaradoj, kion ni

faru nun? Ni kaptis la protokanajlon, la kanibalon, kiu preskaŭ senvirigis ĉi tiun vilaĝon. Li forbruligis la virinecon de nia kamaradino, frakasis ŝiajn ostojn kaj ĵetis ŝin sur la sterkejon por morti. (IVO, kriegante histerie, ĵetas sin sur HEINRICH, alterigas lin, kaptas la akvokruĉon kaj komencas bati lian vizaĝon.)

Ivo: Porkol! Porkol! Porkol!

Dragomir (glacie): Ivo, ne mortigu lin. Ni faros justecon. Ivo, vi laboras tro rapide. (IVO ĉesas bati la nazion.)

Josip: Ni rostu la porkon!

Marija: Ne . . . ne . . . (Sed neniuj ajn nun atentis ŝin.)

Dragomir (glacie — terure — kviete): Gabrijel, Josip, serĉu lignon kaj ferstangon.

Josip: Bonege! (Foriras.)

Gabrijel: Mi jam vidis la lignaĵaron malantaŭ la domo. (Foriras.)

Dragomir: Kaj grason. Ni devas havi grason. (Li genuas apud la ligita kaj ne plu defia nazio kaj unufoje vangofrapas lin, ĉiam en nenatura trankvileco.) Aŭskultu, porko. Vi gustumu vian propran medikamenton. Ni rostos vin vivantan. Malrapide. Ni bone grasigos vin; kaj miaj kamaradoj jam spertas pri bonaj malgrandaj fajroj en la freŝa aero. Ĉu vi komprenas, porko? (HEINRICH tordas sin kaj kriegas.) Tro malfrue! Vi ne povas pagi la senkulpajn vivojn, la frakasitajn korpojn, la frenezajn mensojn; sed vi pagos ĉion, kio estas en via konto. (Dua vangofrapo.) Kaj mi havas aliajn ideojn. Eble en la domo estas tondilo . . . kaj kelkaj najloj . . . Venu, kamaradoj! Ni pretigu regalon por la porko! (Iras en la domon kun MIRKO kaj IVO. Ili marŝas sur HEINRICH, kvazaŭ li ne ekzistus. Dum

momento ni vidas nur MARIJA'n, kiu sidas senmove, kun suferoplena vizaĝo, kaj HEINRICH, kiu tordiĝas kaj ploraĉas. MARIJA ne povas tuŝi lin. Ŝi pensas; decidas; apogas la manojn sur la muron; post grandega penado, ŝi stariĝas. Ŝi elprenas tuketon kaj forviŝas la ŝviton, kiu blindigas ŝin. Ŝi denove faras preskaŭ netolereblan penadon kaj marŝas antaŭen, ĝis HEINRICH kuŝas ĉe ŝiaj piedoj. Ŝi anhelas, kaj denove forviŝas ŝviton.)

Marija: Ĉu vi rekonas min? (HEINRICH ĝemas.) Jes, mi scias, kiel oni sentas brulvundojn.

Heinrich (kiu kredas, ke ŝi torturos lin): Slava hundino! Nearja sovaĝulino!

Marija: Mia frato! (Ŝi deprenas la kolĉenon kaj malfermas sian pendaĵon.) Mi ne deziras, ke iu ajn sentu brulvundojn. Mi ne povas savi vian vivon, sed mi volas, ke vi ne suferu.

(Ŝi tre malfacile kliniĝas kaj metas la pendaĵon al la buŝo de HEINRICH.) Tuj, tuj! Tio ĉi estas tre rapida morto. (HEINRICH lekas la pendaĵon, ĝemas, konvulsias kaj mortas. MARIJA staras senmove, lacega, kun la kolĉeno en la mano. DRAGOMIR revenas kun pelvo.)

Dragomir: Jen graso! . . . Marija! Vi staras . . . Vi Li

Marija (montrante sian pendaĵon): Mi mortigis lin. Mi devis. Mi donis mian venenon.

Dragomir: Vi mortigis la porkon, la nazion . . . sed li torturis vin . . .

Marija: Jes.

Dragomir: Sed mi volis venĝi vin!

Marija: Jes. Mi komprenas. Sed mi ne volas venĝi min mem.

Dragomir: Sed vi staras . . . vi staras . . . vi marŝis . . .

Marija: Mi devis. Iel mi trovis la forton.

(IVO kaj MIRKO revenas kun tranĉiloj, tondilo k. t. p., JOSIP kaj GABRIJEL kun ligno.)

Dragomir: Ne necesas. La nazio jam mortis.

Marija: Mi mortigis lin, por ke vi ne rostu lin. Mi devis.

Ivo: Sed —

Dragomir: Kaj ŝi staras! Ŝi trovis la forton stari! Almenaŭ tio estas ĝojiga! La viktimo komencas revivi!

Ivo: Sed kiel ŝi povis fari? Ĉu ŝi pardonis lin?

Marija: Eble jes.

Ivo: Sed kiel, kiel?

Marija: Vi ĉiuj terure suferis, kamaradoj; kaj viaj suferoj preskaŭ bestigis vin. Eble suferoj helpis bestigi lin. Ankaŭ mi tre suferis; sed mi restis stumpa, kripla; mi havis longan tempon por mediti, por suferi, por deziri venĝon kaj finfine ne plu deziri venĝon. Kaj mi vidis, ke suferado ne plibonigas la homojn; ĝi kutime malplibonigas ilin Oni suferigas; kaj tial la viktimo volas suferigi, kaj li suferigas aliajn kiuj rezulte volas suferigi, en senĉesa ĉeno de sufero, venĝo kaj sufero.

Josip: Ĉu ŝi parolas pri la dialektika spiralo?

Dragomir: Eble iasence, kamarado.

Marija: Mi ne komprenas tiajn klerajn esprimojn . . . mi nur finfine komprenis, ke iu devas rompi la ĉenon; kaj tion oni faros nur per pardono kaj amo.

Dragomir: Sed mi ne povas pardoni tiun porkon, kiu torturis kaj frakasis vin!

Marija: Eble vi ne rajtas, Dragomir. Eble ni ĉiam tro facile pardonas la malamikojn de aliaj . . . Sed kiam mi fakte vidis tiun Lorenz ĉe miaj piedoj, mi sciis, ke eble mi povos rompi tiun ĉenon . . . kaj eble helpi vin . . . mi devis malvenĝi . . .

Josip: Ĉu tiu virino parolas pri la neigado de la neigado?

Dragomir: Jes, kamarado ĝuste tiel.

Marija: Nun mi komprenas, ke oni povas per suferado lerni aŭ kruelecon, aŭ malkruelecon . . . ĉar oni pasie malvolas, ke aliaj sentu similajn dolorojn . . . Pardonu, mi ne povas plu stari. *(Ŝi preskaŭ falas. DRAGOMIR helpas ŝin iri malrapide al la benko; ŝi sidiĝas.)*

Dragomir: Marija, mi kredas, ke vi povos multe helpi min kaj gvidi nin post la militofino.

Marija: Ne, ne; mi estas nur simpla kampanino.

Dragomir: Ne gravas. Vi komprenas ion, kion mi serĉis dum jaroj.

Ivo: Donu al ni pacon!

Josip: Ĉu ŝi estas vera kamaradino aŭ burĝulino? Ŝi parolas bele.

Dragomir: Mi kredas, ke ŝi estas — homo. Aliaj nomoj nun ŝajnas tre stultaj. Kaj ni preskaŭ perdis nian homecon eĉ batalante pro la homaro Marija, ni helpos vin, kaj vi helpos nin . . . vi ree marŝos, ĉar vi havas ŝtalan volon; vi estas militviktimo; ni trovos por vi la plej bonan helpon eblan; kaj vi helpos nin retrovi la mensan pacon, helpos nin konstrui post la detruado; vi estos patrino al Gabrijel,

kiu havas neniun ajn, fratino al mia Ivo, kiu tiom bezonas korvarmon; Marija, vi sentigos al ni dolĉajn homajn sentojn, konstruemajn esperojn por la paca patrujo vi (Oni aŭdas fusilpafon, DRAGOMIR, vundita en la brusto, ŝanceliĝas.) Malsupren! (La PARTIZANOJ, krom DRAGOMIR, ĵetas sin teren.)

Mirko: La kaŝpafisto!

Dragomir: Jes. Kaptu. Sed ne torturu.

(MIRKO kaj JOSIP forkuras rapide.)

Ivo: Kaj vi, patreto?

Dragomir: Kaputa Mia pulmo Mi mortas.

Ivo (kurante al li): Sed ni devas helpi vin!

Dragomir (pli forte): For! Gardu vin! Eble kuglo restas! Helpu Marijan en la domon!

Gabrijel: Sed, kamarado

Dragomir (falante sur la genuojn): For! For! Savu ŝin Savu vin!

Ivo: Jen li! Li forĵetas la fusilon, kuras! Atendu min, Mirko! (Forkuras; GABRIJEL sekvas lin.)

Marija: Ho ve, mi ne povas helpi vin! (Ŝi etendas la manojn, DRAGOMIR, tusante kaj jam agonianta, palpe trovas ilin. Li kuŝigas la kapon sur ŝia sino. Ŝi karesas lian kapon kaj rigardas lin kun angora kompato.)

Dragomir: Panjo Panjo

(Malrapida kurtenfalo.)

kaputa: rompita, ne plu uzebla.

LA FREMDULOJ

Fantazia drameto por infanoj

PERSONOJ:

LA ABISENA KATO
LA SIAMA KATO
LA PERSA KATO
LA MANINSULA KATO
MAKULO
VELURO
LANUGO
STRUMPO
NIGRULO
ORANĜO
TIGRO, saĝa maljuna virkato
PILKO, juna katido

SCENO:

Malbela stratangulo en granda urbo. Ni vidas grandan rubkeston. La ABISENA KATO kuras sur la scenejon. Li estas ruĝbruna kun grandaj verdaj okuloj; parto de la malantaŭaj kruroj estas nigra. Li estas konfuzita kaj panikema.

La abisena kato:

Ho, kie trovas mi amikon?

Kial forlasis mi Afrikon?

(La SIAMA KATO alkuras. Li ne tuj vidas la alian. Li estas longa, maldika kato, kremkolora, kun fokbrunaj oreloj, kruroj, piedoj kaj vosto, kaj fokbruna masko ĉirkaŭ la okuloj kaj ĝis la buŝo. Li havas grandajn helbluajn okulojn.)

La siama kato:

Kie mi kaŝos min, sekuros?

Helpon! Ho, kien nun mi kuros?

La abisena kato:

Perdita en la fremda strato!
Terura sort' por fremda kato!

La siama kato:

Ho Abisena Kat' mi ĝojas
renkonti vin; ĉar vi ne bojas!
Ho ve! mi ĵus renkontis hundon!
Li grumblis, volis doni vundon —
Mi siblis, montris ungojn; li
ŝajne ne apetitis pli;
Sed nun min ekturmentas amo
por mia lando, por Siamol

La abisena kato:

Saluton, kato orienta!
Mi ankaŭ estas malkontenta:
Tiu terura incendio
en nia Kat-Ekspozicio
detruis ĉion!

(La PERSA KATO envenas. Li havas longan blugrizan hararon kaj kuprokolorajn okulojn.)

La siama kato:

Kien iri?
— Eble li povos ion diri . . . ?

La abisena kato:

Kiu?

La siama kato:

Jen Persa Kato venas.

La persa kato:

Saluton! (*Sidiĝas.*) Ho, mi preskaŭ svenas.
Vere mi estas preta morti,
mi tian pelton devis porti
kure tra stratoj, inter tramoj!

La siama kato:

Sed ni nin savis el la flamoj.
Brulo ne estas bona tiklo,
rostita kato, ne kuniklo,
estus nek plado tre konvena,
nek, por ni katoj, fin' bonvena!
Sed ni nin savis el la fajro.

La abisena kato:

Sed sen mastrinoj, sen salajro,
sen laktopelvo aŭ kuseno,
kiel ni vivos?

La siama kato:

Nu, per peno.
Mangon ni devos trovi tuj.

La persa kato:

Do, kio estas tiu uj'?

La abisena kato:

Mi volis nur elverŝi ploron,
sed nun mi flaras fiŝodoron!

(La tri KATOJ iras al la rubkesto. Ili forbatas la kovrilon, kiu falas kun klakego.)

La persa kato:

Ho ve! Vi faris grandan bruon!

La siama kato:

Ni metu kapojn en la truon!

(Ili serĉas ion manĝeblan en la rubkesto. La PERSA KATO trovas oston, La ABISENA KATO pecon da fiŝo kaj La SIAMA KATO buterpaperon.)

La persa kato:

Hura! Mi trovis ian oston!

La abisena kato:

Mi havas ion — ha, fiŝvoston!

La siama kato:

Kaj restas iom da butero
sur mia peco da papero!

(Ili komencas manĝi. La MANINSULA KATO envenas.
Li estas griza kaj mallonga. Li ne havas voston.)

La maninsula kato:

Per mia vosto, kiun mi
ne havas, el la incendi'
sin savis tri kolegoj!

La siama kato:

Venu,
Man-insulano! Manĝu — prenu
el la rubkestol

La maninsula kato (serĉante en la rubkesto):
Ha, jen ost'!

La abisena kato:

Kion ni devos fari, post
la manĝo?

La siama kato:

Ni ekserĉos homon
helpeman aŭ la propran domon.
Car nia devo estas provi
iel kaj ie tuj retrovi
niajn mastrinojn.

La persa kato:

Ili kredos,
ke ni pereis. Eble bredos
aliajn katojn. Ni rapidul

La abisena kato:

Siam Kato, vi nin gvidu.
Vi estas tre inteligenta,
kaj, por demandi, elokventa.

La maninsula kato:

Katido venas; ĉu li povos
informi nin?

La persa kato:

Do, tuj ni provos.

(PILKO envenas. Li estas simpatia, ludema nigra katido
kun ankoraŭ bluaj okuloj.)

Allegretto *Pilko (kantante)*

Scherzando *Eta kato — En la strato —*

Ĉesis la paseron, gra... al sun' — flu —

gis; Nun ĉesas li paperon! Mi-aŭ! Mi-aŭ! Mi-aŭ!



(Originala muziko de Marie de Mierre)

La siama kato (ĝentile):

Ni nin prezentas sen permes'.
Ĉu eble vi nin helpos?

Pilko: Jes.

La siama kato:

Ni volas hejmeniri. Ĉu
tra tram- kaj aŭtomobil-bru'
vi povas montri taŭgan vojon?
Se jes, ni sentos dankan ĝojon!

Pilko: Kie vi loĝas?

La siama kato:

Liverpulo.

La maninsula kato:

Duglaso sur la Man-Insulo.

La abisena kato:

Kaj mi, mi loĝas en Oksfordo.

La persa kato:

Mi, en Kimrujo, sur marbordo.
Ni venis al Ekspozicio.

Pilko:

Jen io preter mia scio!
Mi serĉos katon malpli junan,
havantan scion oportunan!
Atendu min, sinjor', mi petas!

(Forkuras.)

La persa kato:

La katideto servopretas!
Estas malvarme tie ĉi!

La abisena kato:

Estas tro brue ja por mi!

La maninsula kato:

Kaj — pli da bruoj! — Kial, nu?

La siama kato:

Ho ve! minaca kata bru'!

(Kriegoj de furiozaj katoj. Envenas anglaj katoj: MAKULO, blanka kato kun nigraj makuloj; VELURO, mola griza kato; LANUGO, blanka kato; STRUMPO, nigra kato kun blankaj piedoj; NIGRULO, nigra kato; kaj ORANGO, rufa kato. PILKO sekvas ilin anhelante.)

Makulo: Forgratu la okulojn!

Oranĝo: Mordu!

Nigrulo: Jes, manĝu ilin!

Makulo: Tiru!

Lanugo: Tordu!

Veluro: Fremduloj!

Ŝtrumpo:
Invadantoj!

Makulo: Fi!

Lanugo: Forpelu ilin!

Veluro: Gratu, vi!

(La fremdaj katoj kunpremiĝas kaj protektas la dorsojn per la rubkesto.)

La siama kato:
Ni venas pace!

Makulo: Fi, foriru!

Nigrulo: Disbatu ilin kaj disŝiru!
Koloraj strangaj! Aĉa vido!

Pilko (anhelante):
Sed ili ne

Makulo: Stulta katido,
silentu!

Pilko: Ili sen malico
petas

Veluro: Vi estas nur novico!

Lanugo: Ho, vidu kiel strangaj formoj!

Ŝtrumpo:
Malestas decaj kataj normoj!
Ili spionas! Vidu, li
ne havas voston! Fi, ho fil

La maninsula kato:
Por mia ras' la manko pravas!

Ŝtrumpo:
Ne, ĉiu vera kato havas
voston!

Veluro (indikante la SIAMAN KATON):
Matura kat' kun bluaj
okuloj — plene malkongruaj
kun kataj leĝoj!

Oranĝo (indikante la PERSAN KATON):
Longaj haroj!
Ne fratoj — ne, ne eĉ najbaroj!

Makulo (indikante la ABISENAN KATON):
Jen, bruna! Vidu la koloron!
Fi dol! Similas li leporon!

La siama kato:
Ho, ne ataku nin! Ho fratoj!
Ni ĵuras, ke ni estas katoj!

(Ĉiuj la fremdaj katoj miaŭas.)

Jen nia lingvo, tute sama!
Tamen, mi estas kat' Siamaj;
li, Maninsula, kaj li, Persa,
li, Abisena — ne perversa!
Ni iam estis ŝikaj, riĉaj —
sed nun perditaj, malfeliĉaj!

Makulo: Spionoj!

Veluro: Malamikoj!

Strumpo:

Pestoj!

Oranĝo: Fremduloj!

Nigrulo: Aĉaj strangaj bestoj!

Lanugo: Mortigu ilin!

La siama kato (*averteme*):

Ni batalos!

Makulo: Ni estas ses, vi kvar!

Strumpo:

Vi falos!

(*La anglaj katoj atakas la fremdajn katojn, kiuj senespere penas defendi sin. Miaŭoj. Siblegoj. Katgrumbloj. PILKO rigardas ĉion malfeliĉe.*)

Pilko: Ho, kiel fari malinstigon?
Venigos mi la onklon, Tigron.
Ili aŭskultos lin; li, aĝa
kaj respektata, estos saĝa!

(*Forkuras. La batalo daŭras kun granda bruoj. La PERSA KATO falas.*)

La persa kato:

Ho ve! Mi mortas! Ho, adiaŭ!

Makulo: Ni venkas! Ili falas! Miaŭ!

La siama kato:

Ni vendu niajn vivojn kare!
Nun ni batalu jaguare!

Strumpo:

Mortigu ilin! Ŝiru vangon!

Nigrulo: Mi volas vidi fremdan sangon!

(*PILKO revenas, kurante, kun TIGRO. TIGRO estas grandega maljuna virkato kun aŭtoritateca mieno. Li estas diverskolore strekita.*)

Pilko: Ho, onklo Tigro, jam sovaĝe
ili batalos!

Tigro: Tre malsaĝe!

— Nevo, forviŝu tiun larmon —

Nun krius mi la kat-alarmon!

(*Li kurbigas la dorson kaj eligas laŭtegan, longegan miaŭon. La batalo ĉesas.*)

Nigrulo: Je mia plenperfekta nigro,
jen la saĝulo, onklo Tigro!

Tigro (*severe*):

Hundoj nin ĉasas; homoj ŝtelas
por senfeligi nin; aŭ pelas
nin for per balailoj; ĉu
ni katoj ankaŭ al detru'
pelos aliajn katojn? Ve!
Katkamaradoj, ne, ho ne!

(*La tri aliaj fremdaj katoj penas flegi la PERSAN KATON, kiu rekonsciigas.*)

Makulo: Sed tiuj bestoj, ho sinjoro,
ne estas katoj! Jen koloro
maltaŭga, stranga senvestecol!

Strumpo:

Jen fremda, malamika specol!

Tigro: Ne! Tiuj katoj strangkoloraj
estas la katoj plej valoraj;
venas, laŭ mia opinio,
el iu Kat-ekspozicio.

La siama kato:
Vi pravas!

La abisena kato:
Ni nur volis iri
hejmen —

La maninsula kato:
Kaj ili, nin disŝiri!

La persa kato:
Kie mi estas?

La siama kato:
Tie ĉi!

Tigro: Ho, anglaj katoj, fi, ho fil
Vi volis grati la okulojn
de fratoj, bati la fremdulojn;
sed en la mondo ĉiuj katoj
miaŭas, ĉiuj estas fratoj;
Pilko, katido ne plenaĝa,
pli ol vi katoj estis saĝa.

La siama kato (ĝoje):
La Persa Kato vivas!

Tigro: Bone!
Nun ni vin helpas laŭbezone.
Al oficejoj de ĵurnaloj
ni iros; ili pri detaloj

demandos; verkos raportetojn;
ricevos la mastrinajn petojn;
— Mastrinoj jam pri perdo plendos;
kaj oni vin al hejmoj sendos.

Makulo: Ni hontas tre!

Strumpo:
Ho ve, ho ve!

Oranĝo: Ni faris malbonon!

Veluro: Ni petas pardonon!

Lanugo: Ni vin malbenis!

Nigrulo: Ni ne komprenis!

Tigro: Jes, tiuj ĉi aspektis strange,
kaj tuj vi pensis unge, sange;
kelkaj el vi ricevis gratojn,
ĉar vi atakis fratajn katojn.
Ili defendis sin. Future
vi devis agi pli mature,
vidante iun fremdan peni
helpi, sciigi kaj kompreni.

(Al la fremdaj katoj.)

Nun, per la langoj vi vin banos.
Al oficej' mi akompanos
vin; ni klarigos ĉiun fakton.
Ĉe mi vi poste trinkos lakton.
Poste vi dormos sur la sofo,
post via preskaŭ-katastrofo!

*(Li forkondukas la fremdajn katojn. La anglaj katoj foriras
honteme. PILKO restas kaj kantas, poste foriras kun salto.)*

Moderato *Pilko (dancanta)*

con eleganza *mf* *Katidoj kun ridoj ĉasu*

pp *Eion. Silkon, Pilkon, Sunradion. Ha - ridoj sen*

poco accel. cresc. *bridoj ĉasu Eion. Lamon, Plumon, Kanaron, Hara.*

poco accelerando *f mf*

(Originala muziko de Marie de Mierre)

(Kurtenfalo.)

PROVLUDO EN LA KLUBEJO

PERSONOJ:

La REĜISORO
 „HAMLETO“ (Petro)
 „OFELIO“ (Anjo)
 „ROSENKRANZ“ (Henriko)
 „GÜLDENSTERN“ ... (Joĉjo)
 „POLONIO“ (Vilĉjo)

SCENO:

Esperantista klubejo. Spaco tre mankas. Sur la muro troviĝas Esperanta afiŝo, portreto de Zamenhof, flago. Kelkaj malkomfortaj lignaj seĝoj estas malbonorde aranĝitaj. Kvin gejunuloj atendas la reĝisoron. La junulo, kiu ludas HAMLETON, estas sufiĉe bela kaj impona; li havas fortan voĉon kaj volas elstari kiel aktoro, sed malfidinda memoro ofte ĝenas lin. Li nun klopodas ellerni sian rolon, tre serioze. Vilĉjo, la ludonto de POLONIO, estas iom laktvizaĝa kaj sentas fortan adoleskulan ampasion pri Anjo, kiu ludos OFELION. Li nun parolas kun ŝi, kaj ŝi penas esti amikeca sen tro kuraĝigi lin. Ŝi estas simpla, simpatia knabino. ROSENKRANZ kaj GÜLDENSTERN, gajaj frivolaj junuloj, interŝanĝas poŝtmarkojn.

„Ofelio“: Sed Vilĉjo, vere vi ne devus tiom elspezi pro mi; tiaj broĉoj estas multekostaj. Mi dubas, ĉu mi rajtas akcepti ĝin.

„Polonio“: Kara Anjo, akceptu ĝin, mi petas. Vere, estas al mi plezuro.

„Ofelio“: Do . . . mi tre dankas . . . sed . . .

adoleska: vir(in)iganta.

„Rosenkranz“: Ĉu vi havas duplikatojn el Monako?

„Güldenstern“: Jes, kelkajn, sed mi interŝanĝus ilin nur kontraŭ . . .

„Hamleto“: Ĉu vi ne povas silentigi tiun bruaĉegon? Mi penas ellerni mian rolon!

„Ofelio“: Ĉu ankoraŭ?

„Hamleto“: Estas facile por vi — vi ne havas longan rolon! Ho, se mi nur havus bonan memoron! Mi povus superi Julion Baghyl

„Cu esti aŭ ne esti — tiel staras
nun la demando . . .“ (*batas sian frunton*).

Mi certas, ke mi povus pli facile lerni la tekston, se mi ne konus la nacilingvan originalon!

„ . . . ĉu pli noble estas
Elporti ĉiujn batojn . . .“

(*LA REGISORO envenas kaj salutas HAMLETON per vigla ŝultrofrapo. Li estas granda, forta, timige energia persono.*)

Oj! — Ho, bonan vesperon.

La Reĝisoro (tre rapide): Bonan, Petrol Bonan, Anjo! Pardonon; la malfunkciiĝo de la elektro malfruigis min iometel Henriko, Joĉjo, mi havas kovertojn por vi poste. Bonan, Vilĉjo! Ĉio preta por Akto Tri, sceno unu — diablo, kie estas Marteno? Kie estas la reĝo?

„Rosenkranz“: Li petis, ke mi pardonpetu pro li; li havas teruran nazkataron.

La Reĝisoro: Diablol Kataron! Kataron! Kataron! Mil brasikoj kaj tridek mil terpomoj! Tiel proksime al la prezentado li devus veni, eĉ se li havus tutan leonaron! Kiel ni provludu Akton Tri scenon unu sen la reĝo de Danlando?

„Güldenstern“: „Malbona io estas en Danujo.“

„Rosenkranz“: Tre eble, post via konduto ĉe la kongreso en Kopenhago.

La Reĝisoro: Ni ne povas perdi la tempon en stultaj ŝercoj! Nu, ni komencu per la monologo de Hamleto.

„Hamleto“: Malfeliĉa mi!

„Rosenkranz“: Ĉu ni du do povos hejmeniri?

La Reĝisoro: Nepre ne; mi uzos Rosenkranz kaj Güldenstern baldaŭ. Ankaŭ Polonion. Nu. Hamleto, vi envenos kvaŭzaŭ dum promenado . . . mediteme . . .

(*HAMLETO penas enveni impone, kaj stumblas kontraŭ seĝon.*)

Princece, ne ursece! (*HAMLETO, rektigante sin rapide, ellokigas la verdan flagon, savas ĝin kaj tenas ĝin en la mano.*) Vere, spaco terure mankas ĉi tie; sed ĉio iros bone, kiam ni provludos en la halo mem. Do, komencu!

„Hamleto“ (*senaplombigita, fuŝparolas per belega voĉo*):

„Cu esti aŭ ĉu nesti — tiel flugas
Nun la demando . . .“

(*La aliaj ekridas.*)

Pardonon.

„Cu nesti aŭ ne nesti, tiel staras
Nun la rubando . . .“

La Reĝisoro: Idioto!

„Hamleto“: Pardonon. Ĝi revenos post momento.

„Cu vesti aŭ ne nesti . . .“

La Reĝisoro: Stultulo! La laringo bone funkcias, sed nur la laringo! Esti, esti, esti, la simpla verbo *esti*, kaj uzu vian kapon — aŭ eble vian napon estus la ĝusta vorto!

(ROSENKRANZ komencas flustran konversacion kun GULDENSTERN.)

La Reĝisoro: Ofelio, ne sidu babilante nun; ni bezonas vin ĉe la fino de la monologo. Ĉu vi havas preĝlibron?

„Ofelio“: Ankoraŭ ne.

La Reĝisoro: Vi devas porti ion en la manoj. (*Serĉas en siaj poŝoj, kaj elprenas kriminalromanon kun tre konsterna kovrilbildo.*) Ne, tio ne tre taŭgos. (*Trovas ŝlosilon de Esperanto en la nacia lingvo.*) Jen, tio pli decos. Kiam vi envenos, rigardu ĝin, kvazaŭ vi preĝus . . . Ne, Anjo, vi ne sekvas la princon, vi renkontas lin; envenu ĉe la alia flanko. (*OFELIO rapidas al la alia flanko de la ĉambro, kaj komencas provi piajn vizaĝesprimojn super la libreto.*) Nu, ĉu via princa moŝto sukcesis malnodi la langon?

„Hamleto“: Mi esperas, ke jes. Ne grimacu, Henriko, mi jam estas sufiĉe nervema. (*Li komencas paroli, iom bele, kaj, kun kreskanta memfido, gesti, forgesante ke li ankoraŭ portas la verdan flagon.*)

„Ĉu esti aŭ ne esti, — tiel staras
Nun la demando: ĉu pli noble estas
Elporti ĉiujn frapojn — ne, batojn, ĉiujn sagojn
De la kolera sorto, aŭ sin armi
Kontraŭ la tuta maro de mizeroj
Kaj per la kontraŭstaro ilin fini?
Formorti — dormi, kaj ĝi tute finis . . .“

La Reĝisoro: Neperfekte . . . sed daŭrigu.

„Hamleto“:

„Doloron de la koro, la mil batojn,
Heredon de la korpo, — tio estas
Tre dezirinda ŝelo. Morti . . .“

La Reĝisoro: Celo, ne ŝelo! Vi ne estas ovo!

„Hamleto“:

„Tre dezirinda celo. Morti . . . dormi . . .
Trankvile dormi! Jes sed ankaŭ sonĝi
Jen estas la barilo! Kiaj sonĝoj
Viziti povas nian mortan dormon
Post la forjeto de la teraj zorgoj, —
Jen tio nin haltigas; tio faras,
Ke la mizeroj tedaj longe daŭras:
Alie kiu volus elportadi
La batojn kaj la matojn de la tempo . . .“

La Reĝisoro: Ne, ne, nel

„Hamleto“ (sincere): Kio do?

La Reĝisoro: Vi diris „la batojn kaj la matojn de la tempo“, kaj devas esti „la bekojn kaj tomatojn de la . . .“ — pardonon! devas esti „la mokon kaj la batojn de la tempo.“

„Hamleto“: Dankon!

„La boton kaj la mapojn . . .“

— Nel!

„La mokon kaj la batojn de la tempo,
La premon de l' potencaj, la ofendojn
De la fieraj, falson de la juĝoj,
Turmentojn de la amo rifuzita . . .“

(POLONIO vespiras kaj bovide rigardas OFELIO'n. OFELIO grimacas al li, kaj la grimaco trafas HAMLETO'n, kiu daŭrigas iom emfaze kaj persone.)

„La malestimon, kiun seninduloj
Regalas al merito efektiva —
Jes, kiu volus tion ĉi elporti,
Se mem, per unu puŝo de ponardo,“
(*mirinda gesto kun la flago*)
„Li ŝovus“ — ne — „povus sin de ĉio liberigi?“

La Reĝisoro: Pli bone; sed demetu tiun flagon; vi ne estas ĉe
Solena Malfermo. Joĉjo, sidadu kviete; mi bezonos vin
baldaŭ. Ĉu vi estas preta, Ofelio? Vi devos enveni ĉe
„Kaj ĉio restas penso, sed ne faro . . .“

„Ofelio“: Jes, jes.

La Reĝisoro: Daŭrigu.

„Hamleto“ (*demetinte la flagon*):
„Kaj kiu do en ŝvito kaj en ĝemoj
La ŝargon de la vivo volus porti . . .“

La Reĝisoro: *Ŝarĝon*, ne ŝargon — ŝargi estas nur pri pafiloj
kaj akumulatoroj.

„Hamleto“: Mi certis, ke estas ŝargo; eble oni tajpis mian
rolon sen supersigno. (*Ripetas, kun terura emfazo ĉe la
supersignitaj literoj.*)

„La ŝarĝon de la vivo volus porti,
Se ne la tim' de io post la morto,
De tiu nekonata land', el kiu
Neniu plu revenas. Kaj pro tio
Plivolas ni elporti ĉion teran,
Ol flugi al mizeroj ne konataj.
La konscienco faras nin timuloj;
Al la kolera halo . . .“

La Reĝisoro: „... koloro hela!“

„Hamleto“:

„Al la koloro hela de decido
Aliĝas la paleco de l' pensado;
Kaj plej kuraĝa, forta entrepreno
Per tiu kaŭzo haltas sendecide,
Kaj ĉio restas penso, sed ne faro . . .“
(*Pli laŭte.*)
„Kaj ĉio restas penso, sed ne faro . . .“

Anjo!

(*OFELIO elreviĝas.*)

„Ofelio“: Pardonon! (*Alproksimiĝas viglege.*)

La Reĝisoro: Anjo, estu pli atentema! Kaj tia enveno tute
ne taŭgas. Vi devas kvazaŭ akcidente renkonti la prin-
con. Nu, vi envenu iom malrapide, kun la kapo klinita —
ne, ne, ne la mentono sur la brusto — — jes, pli bone
— — kaj kvazaŭ vi legus pie el via preĝlibreto — — diru
ion duonvoĉe, se vi volas — — Hamleto, ripetu la ver-
son, mi petas . . .

(*OFELIO pretigas bonan envenon, rigardante la libreton.*)

„Hamleto“:

„Kaj ĉio restas penso, sed ne faro . . .“

„Ofelio“ (*legante el la ŝlosilo kun pia vizaĝesprimo*):
„En Esperanta gazeto mi vidis vian adreson kun
la rimarko, ke vi estas arma oficiro. Mi ankaŭ
estas oficiro . . .“

(*La tri aŭdantoj ridegas.*)

„Hamleto“: Vi bulkokapulino!

„Polonio“: Ne parolu tiel ofende pri la knabino!

„Ofelio“: Mi milfoje pardonpetas; mi distriĝis.

La Reĝisoro: Ni devos trovi veran preĝlibron por la venonta provludo! Denove!

„Hamleto“ (*lace*):

„Kaj ĉio restas penso, sed ne faro.“

(OFELIO envenas tre taŭge.)

La Reĝisoro: Multe pli bone!

„Hamleto“:

„Sed haltu! Ha, la ĉarma Ofeliol

Nimfeo, prenu“

La Reĝisoro: Ho, nimfo, ne Nimfeo; nimfeo estas blanka akvolilio.

„Hamleto“: Pardonon! Mi pensis pri „feo“.

„Ho, nimfo, prenu ĉiujn miajn pekojn

En vian puran preĝon!“

„Rosenkranz“: Kia aliteraciego!

„Güldenstern“: Stopu la trinkotruon!

La Reĝisoro: Silentu! Vi malhelpas la emociojn!

„Ofelio“:

„Mia princo,

Kiel vi fartas en la lasta tempo?“

„Hamleto“:

„Mi dankas vin humile, — bone.“

„Ofelio“:

„Princo,

Mi havas kelkajn signojn de memoro

Ankoraŭ, kiujn longe jam mi volis

Al vi redoni; mi vin petas, princo,

Akceptu ilin nun!“

(*Proponas al li la Slosilon.*)

La Reĝisoro: Ne, Ofelio, ĉu vi ne komprenas la tekston?

Vi ne proponas al li la preĝlibron; li iam donacis al vi juvelojn, kaj nun vi volas redoni ilin. Vi devos porti kelkajn juvelojn.

„Ofelio“: Tiu broĉo taŭgos dume.

„Mi havas kelkajn signojn de memoro . . .“

„Polonio“: Ho, ne donu tiun broĉon, Anjo, mi petas!

„Ofelio“: Ne ofendiĝu, Vilĉjo, estas nur en la rolo. (*Donas sian broĉon al HAMLETO.*)

„Mi havas kelkajn signojn de memoro

Ankoraŭ, kiujn longe jam mi volis

Al vi redoni; mi vin petas, princo,

Akceptu ilin nun!“

(*HAMLETO retropaŝas kaj denove renversas seĝon; GÜLDENSTERN movas ĝin.*)

„Hamleto“: Diablo, spaco terure mankas ĉi tie!

La Reĝisoro: Ĉio estos pli bona en la halo.

„Hamleto“: La version, mi petas.

„Ofelio“:

„Akceptu ilin nun!“

„Hamleto“:

„Ne, ne! Neniam

Mi ion al vi donis.“

„Polonio“: Ne, estis mia donaco!

La Reĝisoro: Silentu, mi petas!

„Ofelio“:

„Kara princo,
Vi scias ja, vi ilin al mi donis . . .“
(*hezitas*)

— Mi ĉiam fuŝas pri ĉi tiu parolado —

„La indo de la donacoj“ — —

ne, tio ne bone skandiĝas . . .

„Hamleto“: Kial vi ankoraŭ ne ellernis vian rolon? Vi fuŝigas la mian!

„Polonio“: Vi havas perfektan rajton buŝaĉi tiamaniere, ĉu ne?

„Ofelio“: Ludi kun vi estas terure malfacile!

„Rosenkranz“: Mi perdas la vesperon ĉi tiel

La Reĝisoro: Daŭrigu, Anjo; kelkaj aliaj rolantoj ne estas pli konsciencaj ol vi.

„Ofelio“:

„Kaj vi akompanadis . . .“ — ne.

La Reĝisoro:

„Kaj la donacojn vi akompanadis . . .“

„Ofelio“: Dankon, jes.

„Kaj la donacojn vi akompanadis
Per tiaj dolĉaj vortoj, ke la indo
De la donaco multe pliiĝadis.
Nun vi sangiĝis . . .“

La Reĝisoro: Sangiĝis. Li ne ricevis baton sur la nazol

(ROSENKRANZ kaj GULDENSTERN dum tiu ĉi parolado komencas flustri ŝercojn.)

„Ofelio“: Oni malbone maŝinskribis la kopiojn.

„Nun vi ŝangiĝis — prenu do la donojn:
Doloraj estas donoj al la koro,
Se ili plu ne venas de la koro.
Jen ili estas, princo, mi vin petas.“

„Hamleto“:

„Ha, ha, ha! Ĉu vi estas virta?“

(GULDENSTERN ridegas pro la ŝerco.)

„Ofelio“ (*ofendita*): Mi ne meritas tion.

„Guldenstern“: Ej, mi ne ridis pri vi!

„Ofelio“:

„Princol?“

„Hamleto“:

„Ĉu vi estas bela?“

(ROSENKRANZ laŭte ridas pri privata konversaciaĵo.)

„Ofelio“ (*ekploreme*): Sinjoro reĝisoro, mi scias, ke mi ne estas tre bona esperantistino, sed mi ne venas al la klubo por toleri tiajn malĝentilaĵojn!

„Polonio“: Tute ne estas juste; oni ĉiam ĉikanas kaj insultas la knabinon, kaj ŝi ĉiam penas fari bone!

„Guldenstern“: Ho, metu korkon en la faŭkon; neniuj ajn volis ofendi.

La Reĝisoro (*pugnobatante la tablon por silentigi ilin*): Gesamideanoj! La atmosfero tute ne taŭgas al nia tasko! Pensu serioze: Kion ni faras? Ni volas prepari prezentadon de majstra traduko — traduko de klasika verko, kaj traduko de Zamenhof mem! Ĉu ni ne povas porti iom da deca respekto al tia tasko? Ni fuŝas kaj malatentas, kaj tiam ni

ekkverelas. Henriko, Joĉjo, mi nun ne havos la tempon provludigi vin, post tiom da interrompoj; se vi vere volos foriri, pli bone foriru, ol interrompu.

(ROSENKRANZ kaj GÜLDENSTERN pretigas sin por foriri. ROSENKRANZ akcidente prenas la gantojn de HAMLETO.)

Kaj diru al Marteno, ke li nepre resaniĝu antaŭ merkredo, aŭ mortu pro la strebado resaniĝi!

„Rosenkranz“: Tio tre konsolos lin.

La Reĝisoro: Daŭrigu.

„Ofelio“:

„Kion vi per tio ĉi volas diri, via princa moŝto?“

„Hamleto“ (tre plate kaj praktike): Henriko, vi havas la miajn gantojn.

„Rosenkranz“: Ha, jes, pardonon. Bonan nokton! (Prenas siajn proprajn gantojn kaj foriras kun GÜLDENSTERN.)

„Ofelio“ (agacite):

„Kion vi per tio ĉi volas diri, via princa moŝto?“

„Hamleto“:

„Ke, se vi estas virta kaj bela, via virto ne devas komunikiĝi kun via beleco.“

„Ofelio“:

„Mi vidas, ke mi eraris.“

La Reĝisoro: Ne, Ofelio, vi eraris.

„Ofelio“: Jes: „Mi vidas, ke mi eraris.“

La Reĝisoro: Ne, vi eraris, dirante ke vi eraris, vi ne vidas, ke vi eraris!

„Ofelio“:

„Mi vidas, ke mi eraris.“

Mi eraris, dirante ke mi vidas . . . (Senespere) Altestimata, kiel mi eraris?

La Reĝisoro: Vi devus diri: „Ĉu beleco povus havi pli bonan kolegon . . .“

„Ofelio“:

„Ĉu beleco povus havi pli bonan kolegon ol la virto, princo?“

(La lumo subite malfortiĝas.)

„Polonio“: Ho, ne alia elektro-malfunkciiĝo, mi petas!

„Hamleto“: Ni daŭrigu la dramon, iel. Ni terure perdas tempon!

„Ofelio“: Mi bedaŭras, ke mi tiom fuŝas.

„Polonio“: Vi faras tre bone!

„Hamleto“ (emfaze volas daŭrigi):

„Estas vero: sed la forto de la beleco pli facile faros el la virto malĉaston, ol la forto de la virto egaligos al si la belecon. Tio ĉi antaŭe estis paradokso, sed nun la tempo montras, ke tio ĉi estas vero.“ (POLONIO ternas.)

Porko! „Mi iam vin amis.“

„Ofelio“:

„Mi vidas, ke mi eraris.“

Ne, pardonon, mi vidas, ke mi eraris.

„Efektive, princo, vi kredigis min pri tio.“

(La lumo eĉ pli malfortiĝas.)

„Hamleto“: Ni daŭrigu la dramon!

„Vi ne devis al mi kredi: ĉar virto ne povas tiel
inokuliĝi al nia maljuna arbo, ke la antaŭa ne restu.
Mi vin ne amis.“

„Ofelio“:

„Mi vidas, ke mi eraris.“

(La lumo tute malfunkciigas.)

„Hamleto“ *(laŭte)*:

„Iru en monaĥejon!“

„Ofelio“ *(panike)*: Mi ne povas trovi la pordon!

La Reĝisoro: Momenton; elektra poŝlampo troviĝas en la
tabla tirkesto. *(Grandaj moviĝoj, stumbloj k. t. p. aŭdiĝas
el la mallumo.)*

„Hamleto“: Ho, ni povas deklami niajn rolojn bone en mal-
lumoj, ĉu ne?

La Reĝisoro: Idiotol kial vi volas kisi min?

„Polonio: Mi vidas, ke mi eraris!

„Hamleto“ *(laŭtege)*:

„Iru en monaĥejon!“

(Kurtenfalo.)

La frazoj, kiujn „Ofelio“ legas erare, troviĝas en la angla ŝlosilo.
Oni povus simile uzi frazon el ŝlosilo pli konata en alia lando, ekz.
„Mi vidis grandan hundon en la ĝardeno.“ Ĝi estu kiel eble plej
maltaŭga.

OBSERVU DIETON!

PERSONOJ:

OLIVIO OSTSAK, kiu estas tre maldika

PAŬLINO PORK, kiu estas tre dika

MARINJO MEZ, kiu havas normalan kaj plaĉan formon

KELNER(IN)O

SCENO:

*Angulo en bona restoracio. Ni vidas du tablojn kun la ku-
timaj tablotukoj, glasoj, karafoj, ujetoj, manĝilaroj, menuoj
k. t. p. OLIVIO OSTSAK kaj PAŬLINO PORK envenas.
Ili portas saketojn kaj estas butikumintaj. La KELNERO
proponas al ili tablon. Ili sidiĝas.*

Olivo: Vere, mi tute ne sentas la inklinon manĝi, sed mi
faros mian devon!

Paŭlino: Mi estas malsatega; sed vere mi devos bridi min!

Kelnero: Ĉu la sinjorinoj deziras, ke mi pendigu la paltojn?

Olivo: Jes, mi petas. *(La KELNERO prenas kaj forportas
ŝian palton. Ŝi residiĝas.)* Ĉu ne vi, Paŭlino?

Paŭlino: Ne, dankon; mi preferas gardi ĝin. *(Tuj kiam la
KELNERO estas for.)* Fakte, Olivo, mi forte suspektas,
ke la kunkudraĵoj de mia robo komencas krevi, kaj mi ne
volas esti ekspozicio de grasajo!

Olivo: Kompatinda mia! — Kion ni prenu? *(Ili rigardas la
menuon.)*

Paŭlino: Densa pizosupo! Mi adoras densan pizosupon! Sed
mi devas preni tomatosukon! *(vespiras.)*

Olivo: Ili havas ananasosukon! Mi ne trinkis fruktosukon dum pluraj semajnoj . . . Ne; mi estos forta; mi prenos unu el la densaj supoj.

Paŭlino: Ho ve! Iel mi vere devos malgrasiĝi! Kaj mi estas ĉiam malsata, malsatega, kvazaŭ lupo estus en mia stomako! Kaj vidu la apetitvekajn pladojn tie ĉi: Bifstekoj kun frititaj terpomoj; porkaĵo kun farĉo, saŭco, bakitaj terpomoj kaj brasikaĵo; anseraĵo — kaj mi adoras anseraĵon! — Anasaĵon! kolbasoj kun frititaj terpomoj kaj pansaŭco! — ho ve!

Olivo: Mi envias vian bonan apetiton. Mi devas preskaŭ ŝovi ĉiujn manĝaĵojn en mian gorgon. Sed mi iĝis tiel maldika, ke mia frato nomas min la Vivanta Skeleto; kaj mi deziregas havi allogan, virinecan formon. Mi ĝuas nur fruktojn kaj salatojn; sed mi nepre devas serĉi la plej grasiĝajn manĝaĵojn. Ho ve! Mi vomemas je la penso, tuj!

La Kelnero: Kion la sinjorinoj deziras?

Paŭlino (mizere): Mi prenos tomatosukon unue; poste, mal-mole kuiritan ovon kun salato.

La Kelnero: Ĉu la sinjorino deziras salaton kun oleo kaj vinagro aŭ kun majonezo?

Paŭlino: Nur kun kelkaj gutoj da vinagro aŭ citronosuko. Ho ve!

Olivo: Mi manĝos unue densan pizosupon; poste porkaĵon rostitan kun bakitaj terpomoj, pomsaŭco, farĉo kaj brasikaĵoj. Ho ve!

La Kelnero: Ĉu la sinjorinoj deziras panon kaj buteron?

Paŭlino: Ho ve! ne!

Olivo: Ho ve! jes! Freŝan panbultkon kun butero. (*La KELNERO foriras.*) Ho, kia taskego!

Paŭlino: Mi eksperimentis pri ĉio; varmegaj banoj, malvarmaj duŝoj, citronosuko, gimnastiko, drogoj, masaĝo; kaj mia sola espero nun estas mia dieto! Kaj mi malsatas dum la tuta tago: kaj la odoroj tie ĉi torturas min! Ĉu vi konas alian metodon por maldikiĝi?

Olivo: Mi ĉiam serĉas metodon por dikiĝi; mi aspektas kiel masto. Mi manĝas laktokremon, buteron, kukojn, ĉokoladon; sed mi neniam dikiĝas! Domaĝe, ke vi ne povas donaci al mi vian propran superfluan!

Paŭlino: Jes, tio estus tre simpla solvo. (*La KELNERO alportas pelveton da supo, panbultkon, buteron, glason da tomatosuko.*)

La Kelnero (al PAŬLINO): Vi deziras supon, ĉu ne, sinjorino?

Paŭline (avide): Jes, mi deziregas la supon (*kun vespirego*). Sed la tomato-suko estas por mi. (*La KELNERO aranĝas ĉion, kaj foriras.*)

Olivo: Se nur iu formanĝus tiun ĉi pelvegdon da supo por mi!

(*PAŬLINO komencas trinki la tomato-sukon, kvazaŭ ĝi estus medikamento. OLIVO senapetite ekmanĝas la supon kun pano. MARINJO MEZ, bela junulino kun tre plaĉa formo, envenas, ĉirkaŭrigardas kaj eksidas. Ŝi komencas rigardi la menuon.*)

Paŭlino (duonflustre): Se nur mi havus tian formon!

Olivo: Kie?

Paŭlino: Tie — la virino, kiu ĵus envenis.

Olivo: Jes ja; nek tro dika, nek tro maldika. Ni kuraĝiĝu; tia konturo valorus nian penadon. — Jes, vere ŝi estas perfekta. (*Iom pli kuraĝe manĝas la supon.*)

La Kelnero (venante al MARINJO): Kion la sinjorino deziras?

Marinjo: Kio estas plej bona hodiaŭ?

La Kelnero: Mi povas sincere rekomendi hodiaŭ la anseraĵon; ĝi estas tre mola, bonega. La bovidaĵ-kotletoj estas ankaŭ tre bonaj.

Marinjo: Bone, mi prenos la anseraĵon.

La Kelnero: Kion la sinjorino deziras por komenci?

Marinjo: Momenton; mi prenos ion, kio harmonios kun la anseraĵo. (*Kun ĉarma rideto.*) Mi malofte manĝas tie ĉi; kaj la gastronomio meritas atenton, ĉu ne?

(*La KELNERO turnas sin al la aliaj klientinoj.*)

La Kelnero: Ĉu la sinjorinoj jam scias, kion ili deziras poste?

Olivo (mizere): Kremkuko; poste, biskvitoj, butero kaj fromaĝo; kafo kun lakto kaj sukero. Ho ve!

Paŭlino: Mi turmentiĝos, vidante vin manĝantan tiujn bon-gustaĵojn! (*Mizere al la KELNERO.*) Mi devos mendi freŝan pomon, kaj tason da nigra kafo. Sen sukero. Ho ve!

Marinjo: Nun, mi estas preta. La anseraĵo estas la ĉefa plado. Vi donas ĝin kun ĉiuj akompanaĵoj, ĉu ne?

La Kelnero: Jes, sinjorino; rostita anseraĵo, kun salvia-cepa farĉo; pomsaŭco; rostitaj kaj kuiritaj terpomoj; burĝon-brasikaĵo.

Marinjo: Bone. Mi komencas per la maldensa supo — la

kokidaĵ-buljono; poste, la anseraĵo kun akompanaĵoj; peco da pomtorto kun kremo; biskvitoj kaj blua fromaĝo; kaj taseto da nigra kafo.

La Kelnero: Bone, sinjorino. Mi alportos la supon. (*Foriras.*)

Paŭlino (heziteme): E — pardonu, sinjorino, sed ĉu mi rajtas fari unu iom intiman demandon?

Marinjo: Kion vi deziras scii, sinjorino?

Paŭlino: Kiel vi povas ĝui rostitan anseraĵon, terpomojn, kremon, tortojn kaj tiel plu sen dikiĝi?

Olivo: Ne, ne! Ni volas sciiĝi — se la formulo ne estas sekreta: — Kiel vi povas havi tiel agrable virinecan konturon sen manĝi pli ol vi deziras?

Marinjo: Ho . . . mi ne scias. Mi apartenas al tiuj homoj, kiuj povas manĝi kion ajn ili volas, kaj ĉiam gardas la saman konturon. Ha, mia supo! (*La KELNERO donas al ŝi supon.*) Mi neniam dum la vivo uzis dieton; mi manĝas nur laŭ mia gusto kaj kaprico. (*La KELNERO foriras. Tuj PAŬLINO kaj OLIVO ĵetas sin sur MARINJON, forprenas ŝian seĝon, ekbatas ŝin sur la planko. La KELNERO revenas kurante kaj kriante.*)

Marinjo: Helpon! Ho ve!

La Kelnero: Sinjorinoj, kion vi faras?

Paŭlino: Justeco ne ekzistas en tiu ĉi mondo!

(*Rapida kurtenfalo.*)

MANEKEN-PARADO

Oni bezonas ian podion, aŭ almenaŭ tapiŝon sur la planko. La estro aŭ estrino priparolas diversajn kostumojn, dum la manekenoj envenas, paŝadas antaŭ la publiko kaj foriras. La manekenoj devas paŝadi kiel eble plej elegante kaj digne. Ili montras la vestaĵojn tre avantaĝe kaj ridetas ĉarme al la publiko. La estro aŭ estrino staras flanke kun notoj. Se oni deziras, oni povas ankaŭ uzi mallauĉtan muzikon.

La Estro: Niaj sinjorinoj multe scivolas pri la vestaĵoj, kiuj estos laŭmodaj por la venonta kongreso. Tial ni organizis, je granda kosto kaj post vasta laborado, maneken-paradon, kiu montros al vi kelkajn el la plej okulfrapaj modoj, kiuj, laŭ niaj plej lastdataj informoj, furoros en la kongreso.

(La unua manekeno envenas.)

Jen, unue, tre tradicia stilo; unu el la naciaj — aŭ internaciaj — kostumoj de Esperantujo. Vi rimarkos la pajlan ĉapelon, laŭ antikva kaj iom vireca stilo. *(La manekeno demetas la ĉapelon.)* La hararanĝo sekvas la plej respektindajn tradiciojn de nia movado; ĝi estas la jam mondrenoma Birdnesta Frizuro, kiu memorigas nin pri la nesto de nia Pac-kolombo. Vi rimarkos la simplan malfirman harnodon kun interesa aŭreolo de nefiksitaj haroj. La bluzo celas interesan malsimetrion per la mankanta butono, kaj la trikita jako, kiu lasos tiom da spaco inter si mem kaj la korpo, estas alegoria vestaĵo; ĝi signifas, ke ĉiu esperantistino estas larĝmensa kaj preta ŝirmi aliajn homojn. Simpla negladita jupo sen difinita konturo, kaj grandaj ŝuoj laŭ la blatomortiga stilo, kompletigas tiun

ĉi ŝikan kostumon. Kompreneble ŝi ĉiam portas la verdan stelon; ju pli grandan, des pli taŭgan.

(La dua manekeno envenas. Ŝi estas vestita per granda pak-tola sako, ligita ĉirkaŭ la kolo per verda rubando kaj ĉirkaŭ la maleoloj per dua verda rubando. Kompreneble la manekeno ne paŝas elegante.)

Ĉiuj vere ŝikaj virinoj pensas multe pri la vojaĝkostumo. Ĝi devas esti okulfrapa, sed samtempe praktika. Mondfama modejo desegnis tiun ĉi ŝikan kostumon por la vojaĝo al la kongreso. Rimarku la klasike simplan konturon kaj la ne troigitan garnituron je kontrasta koloro. La praktika valoro de tiu ĉi vojaĝkostumo estas facile komprenebla. Ĉar la kongreso ĉiam okazas dum semajno, kiam la vagonaroj estas plenplenaj, kaj aliaj vojaĝantoj premas nin el ĉiuj direktoj, la mondfama modejo desegnis kostumon, kiu ne povas difektiĝi per ĉifiĝo, kiu ne montras la neeviteblan malpurecon, kaj kiu protektos pli delikatajn subvestojn kontraŭ falintaj sandviĉoj kaj glaciaĵoj, infanaj manetoj, renversitaj bierglasoj, la malmolaj manoj de la pasportkontrolisto aŭ doganisto, kiu skue vekas la vojaĝantinon . . . kaj ĉiuj aliaj kutimaj ĝenoj de longa alkon-gresa vojaĝo. La bela garnituro ĉe la kolo kaj la maleolo havas ankaŭ praktikan utilon; se ekzemple, alloga fraŭlino ekdormas, sidante apud sinjoro, en plenplena kupeo . . . en tiu ĉi kostumo, ŝi ne povas timi, ke eble li kaptos la okazon fie karesi ŝin. Ĉar ricevi karesojn dum oni dormas estas stulta perdo.

(La tria manekeno envenas. Ŝi portas normalan, someran robon, sed grandajn braceletojn sur kiuj troviĝas klingoj; etan tornistran; kaj klingojn sur la ŝuoj.)

Tiu ĉi kostumo estas taŭga por la kongreso mem; vi vidos la tre originalajn ornamaĵojn. Ĉar normalaj virinaj man-

saketoj tute ne havas spacon por kongreslibro, fontoplu-
mo por subskribi albumojn, la libro kiun oni impulse aĉe-
tis ĉe la librobudo, dokumentaro en kovertego, la bild-
karto, kiujn oni aĉetis por sendi al geamikoj kaj trovos la
tempon poŝti nur post la fino de la kongreso, la cirkulero
kiun nekonata kongresano urĝe ŝovis en viajn manojn, la
karto kun la vortoj de la Himno, kiun vi teorie, sed nur
teorie, jam konas parkere . . . kaj ankaŭ por pudrujeto,
kombilo, ekstra ĵartelo, naztuketo kaj aspirino-piloloj —
oni nun permesas, ke eĉ la plej ŝika virino portu mal-
grandan tornistran ĉe kongreso. Tiel oni ankaŭ liberigas
ambaŭ manojn por pli urĝaj celoj. La klingbraceletoj kaj
piedornamajoj estas tre ŝikaj kaj forte akcentas la virinan
delikatecon de la kostumo. Vi komprenos, ke ili ankaŭ
havos altan valoron praktikan, kiam ŝi volos alproksimiĝi
al la rendevua tabulo, preni alvenintan leteron, vidi la
novajn kongresfotaĵojn, aŭ aĉeti poŝtmarkojn.

*(La kvara manekeno envenas. Si portas someran robon kun
grandega poŝo kiel sako sur la ventro. Tiu sako estas jam
plenplena.)*

Rivala modfismo elpensis tiun ĉi interesan solvon al la
ĉiama problemo de kongresoj: kiel oni portu siajn diver-
sajn bezonataĵojn. Jen ni havas ion vere revolucionan; ĝi ve-
nas rekte el Parizo; jen la nova Kangurua Konturo! La
poŝo povas esti el kontrasta aŭ simila ŝtofo, kun aŭ sen
broderio. Denove, tiu ĉi stilo forigas la ĝenon porti doku-
mentojn kaj aliajn aĵojn en ambaŭ manoj kaj sub ambaŭ
brakoj. *(La manekeno elpoŝigas kongreslibron aŭ verdan
flagon kaj montras ĝin al ni.)* La feliĉulino kiu portas la
novan Kanguruan Konturon povas ankaŭ gardi kelkajn
sandviĉojn sur la robo, antaŭ ol ŝi metos ilin sub la ro-
bon; ĉar vi ĉiuj scias, ke dum kongreso oni ne trovas la
tempon por tagmanĝi normale.

*(La kvina manekeno envenas. Si portas robon taŭgan por
festo — plenan baltualeton aŭ pli simplan formal-okazan
robon; ĝi estu vere bela, kaj preferinde el nilono aŭ alia
nova ŝtofo; sed alie la estro povos blufi.)*

Kompreneble virino elektas tre zorge la robon por la
Kongresa Balo. Hodiaŭ ni montras belan tualeton, laŭ la
lasta modo, en neĉifebla, makulrezistanta ŝtofo. Post la
fino de la Kongresa Balo oni povas resti same pura, freŝa
kaj ŝika kiel ĉe la komenco. Makulrezista ŝtofo estas la
plej taŭga, kiam inter kirliĝanta amaso glaso facile ren-
versigas sur la robo, cigaredcindroj falas ĉien kaj glaciaĵoj
emas salti el la teleretoj. Pri la utileco de moderna neĉif-
ebla ŝtofo, neniu ajn kiu ĉeestis Esperantan Kongreson
povas dubi. Ni konsilas, ke kun la neĉifebla robo elegan-
ta sinjorino uzu la novan kisrezistantan lipfarbon. Tiel ŝi
ĉiam restos elegantal

*(La sesa manekeno envenas. Si portas bankostumon kun
grandaj verdaj steloj sur la brusto kaj sur la postaĵo.)*

Dum la Ekskursa Tago oni ofte iras al la marbordo kaj
kaptas la okazon naĝi aŭ sidadi en la sunlumo. Per tiu ĉi
tre laŭmoda bankostumo ŝi povas esti sidanta aŭ naĝanta
reklamo por Esperanto sen kosto al la movado. La verdaj
steloj ankaŭ certigas, ke la amikoj trovu ŝin sur la plej
homplena strando.

*(La sepa manekeno envenas. Si portas robon kun granda
vatitaĵo sur la postaĵo, kaj granda kapuĉo sur la dorso. Si
portas malgrandan kusenon.)*

Sed ĉiuj scias, ke la kongreso havas seriozajn erojn, kaj
jen lastmoda, sensaciø kostumo por la Internacia Somera
Universitato, la Solena Malfermo, la Belarta Konkurso
kaj similaj okazoj. Vi rimarkos la originalan konturon de
la basko. Tiu stilo ne nur allogas per interesa kaj virineca

kurbo, sed provizas komforton, se la paroladoj kaj prelegoj tro longe daŭras. Kiam sidlokoj povas esti malsufiĉaj aŭ rimarkinde malmolaj, kia genia ideo — kunporti sian propran sidlokon! Se la paroladoj vere iĝas netolereble enuigaj, oni povas kaŝi sin en la kapuĉo (*la manekeno montras la metodon*) kaj perdi sin en agrabla verda revado. Finfine, ni havas kuseneton kiel luksan akcesoraĵon: kiam la salutantoj el ĉiuj landoj parolas malaŭdeble, tro longe aŭ per la nacia lingvo, la kongresanino povas, aranĝinte la sidlokon taŭge, kaŝinte la kapon en la kapuĉo kaj apoginte ĝin sur la kuseneto, ĝui freŝigan dormon eĉ dum la ceremonio mem.

Finfine ni havas por vi la plej novan sensacion inter sinjorinaj modoj.

(*La oka manekeno envenas. Ŝi portas ordinaran blankan littukon, fiksitan per dika ŝnurpeco ĉirkaŭ la talio kaj kelkaj grandaj pingloj sur la ŝultroj.*)

Jes, jen la nova konturo por urĝaj kazoj, la plej lastmoda stilo por la kongresanino, kiu perdis la valizon aŭ ne sukcesis solvi la ĉiaman problemon pri lavado kaj gladado. Simpla hotela littuko, pruntita kun aŭ sen permeso, tiel bonguste aranĝita, estas, kiel vi ĉiuj konsentos, tute deca laŭ eĉ la plej rigoraj postuloj de la pudoro; kaj multaj konsentos ankaŭ, ke drapiritaj vestaĵoj plej taŭgas al ĉiuj virinaj formoj krom la plej belaj.

Do, ni montris al vi kelkajn modojn, kiuj nepre taŭgos por la venonta kongreso. Mi esperas, ke vi ĉiuj atentis la kutiman averton en la kongreslibro, ke ni meritu la respekton de la publiko, kaj ke vi ĉiuj, belaj sinjorinoj kaj eĉ pli belaj fraŭlinoj, penos esti kiel eble plej ŝikaj, pro la honoro de nia movado!

Dankon kaj ĝis revido!

LA PROVO

PERSONOJ:

PETER BROWN (anglo), 25-jara
 JAKOB NILSSON (svedo), 55-jara
 S-ino MADELEINE MOREL (svisino), 50-jara
 BIANCA CINTOLI (italino), 20-jara
 ELMER FAIRFAX (usonano), 30-jara
 JAROSLAV ŠIMÁČEK (ĉeĥo), 30-jara

SCENO:

Angulo ie en Kongresejo dum la Interkona Vespere. Tablo kaj 6 seĝoj. La afiŝo aŭ flago sugestas la medion. PETER BROWN, simpatia, iom hezitema, modesta juna anglo, sidas ĉe la tavolo kaj penas kalkuli pri siaj elspezoj.

Peter Brown: Tagmanĝo, kvar kronoj kvindek. Libreto, du kronoj; tio faras ses kronojn kvindek. Glaciaĵoj, dudek kvin — — — ses kronoj sepdekkvin.

(*JAKOB NILSSON envenas, sed vidante ke PETER kalkulas, hezitas trudi sin. Li estas agrabla, klera homo.*)

Bildkartoj, unu krono, kaj poŝtmarkoj, unu krono kvindek, kaj tio faras naŭ kronojn dudek kvin — — — .

(*SINJORINO MADELEINE MOREL envenas. Ŝi estas vigla, aktivema, helpema virino.*)

S-ino Morel: Pardonon, sinjoro, ĉu hazarde vi ĵus vidis viron tre altan kaj iom dikan kun ruĝa dianto en la butontruo?

Peter Brown: Ne, sinjorino; mi bedaŭras, sed mi tute ne atentis la preterpasantojn.

S-ino Morel: Mia edzo malaperis en la svarmo, kaj lia korespondamiko serĉas lin.

(Foriras rapide. JAKOB NILSSON pliproksimiĝas. Li ne parolas Esperanton perfekte, sed tre sincere strebas. Li portas kongreslibron kaj malgrandan teknon.)

Jakob Nilsson (tre ĝentile): Pardonu min, sinjoro; ĉu vi disponas kelkajn minutojn por helpi min?

Peter Brown: Volonte. Kion vi deziras? Ĉu vi ne volas sidiĝi?

Jakob Nilsson (sidiĝante): Dankon. Mi estas en embaraso. Mi venis ĉi tie . . . n pro oficiala tasko. Mi estas, fakte, observanto, sendita de UNESKO; kaj UNESKO komisiis al mi la taskon verki ampleksan raporton pri la kongreso, kaj, precipe, pri Esperanto kiel . . . kiel komunikilo inter ordinaraĵoj homoj. Mi devis rapide lerni la lingvon, kaj ankoraŭ ne parolas tre flue . . . mi studis dum nur kvar semajnoj . . .

Peter Brown: Ĉu vere? Vi parolas tre bone, do.

Jakob Nilsson: Ho, mi estis kompetenta lingvisto jam, kaj Esperanto ŝajnas tre facila . . . Sed la lingvo mem ne estas mia ĉefa problemo. Mi ja povas ricevi multajn utilajn informojn de la oficialaj instancoj . . . sed mi aparte bezonas aŭskulti ordinaraĵojn konversaciojn inter ordinaraĵoj homoj por sciigi, ĉu ili vere povas uzi la lingvon kvazaŭ nature.

Peter Brown: Nu, mi povas tuj respondi al via demando; kaj la respondo estas, jes. Vi komprenas min kaj mi vin, ĉu ne? El kiu lando vi venas?

Jakob Nilsson: Mi estas svedo. *(Kliniĝetas.)* Jakob Nilsson, el Stokholmo. Kaj vi?

Peter Brown: Peter Brown — — en Esperantaj rondoj mi kutime nomas min Petro Bruno, el Novkastelo, Anglujo.

Jakob Nilsson: Jes, ni du povas bone interparoli. Sed niaj lingvoj iom similas, kaj mi estas lingvisto . . . Vi komprenas . . . mi devus provi inter multaj homoj . . . kaj mi nepre ne rajtas trudi min en privatajn konversaciojn. Kaŝaŭskulti estus same malĝentile. Kion mi povus fari, por vere observi tiajn aferojn sen ofendi?

Peter Brown: Se vi diros, ke vi estas observanto de UNESKO, ĉiuj helpos kaj informos vin.

Jakob Nilsson: Jes; sed ĝuste tion mi deziras eviti. Se oni scios pri mia celo, oni nepre troigos diversmaniere; idealistoj kutime emas troigi pri siaj idealoj, ĉu ne?

Peter Brown: Jes; mi devas konfesi, ke tio povas okazi. Nu, kion fari? Ĉu helpus al vi, se mi nun kunvokus kelkajn homojn el diversaj landoj, kaj ni konversacius?

Jakob Nilsson: Sed, sinjoro, tio estus perfekta aranĝo por helpi min — — ankoraŭ por komenci! — — Ne, *almenaŭ* por komenci.

(Sinjoro MOREL revenas.)

Peter Brown: Ha, ŝin mi iomete konas — —. Ĉu vi trovis vian edzon, sinjorino?

S-ino Morel: Jes, dankon, sinjoro; kaj mi prezentis al li lian amikon. Nun oni povas dum horo disigi ilin nur per tankoj.

Peter Brown: De kie vi venas, sinjorino?

S-ino Morel: El Novkastelo.

Peter Brown: Ĉu vere? Ankaŭ mi venas el Novkastelo.

S-ino Morel (manpremante): Do, mi ĝojas renkonti vin . . .
Mi ne memoras, ke mi vidis vin ĉe la loka grupo.

Peter Brown: Bedaŭrinde, mi maloftege ĉeestas grupkunvenojn. Ne pensu malbone pri mi; mi ofte devas deĵori vespere. (*Al NILSSON*) Nu, sinjoro Jakob Jakobsson . . .

Jakob Nilsson: Pardonu, sinjoro Brown, Jakob Nilsson.

Peter Brown: Ho, mi pardonpetas! — — Nu, tiu ĉi konversacio ne tre helpas vin, ĉu? Ĉar ni estas samlandanoj, eĉ samurbanoj. (*Al S-INO MOREL.*) La sinjoro volas provi la lingvon, aŭskultante konversaciojn inter diverslandanoj

S-ino Morel: Nu, nenio estas pli facila! Ni povas aranĝi tuj. Ni nur ĉirkaŭrigardu iomete. (*Vokas, laŭte kaj senĝene.*) He, fraŭlino! Jes, vi, fraŭlino! venu ĉi tien, mi petas! (*BIANCA CINTOLI, bela junulino, envenas.*) Sinjoro! Ĉu vi disponas momenton? (*ELMER FAIRFAX envenas rapide kaj entuziasme. Li estas vigla, amikiĝema viro; la vestoj estas iom, sed ne karikaturece, atentigaj.*)

Elmer Fairfax: Kiel mi povas helpi vin, samideanino?

Bianca Cintoli: Kion la sinjoroj deziras?

Peter Brown (admire): Ho, mi tre dankas, sinjorino. Mi neniam trovas la kuraĝon tiel voki du nekonatajn personojn.

S-ino Morel: Mi bone vidas, ke vi ĉeestas vian unuan kongreson. Ĉe via dua, vi timos nenion ajn; vi parolos al ĉiuj, kisos ĉiujn belajn knabinojn, petos subskribojn de niaj plej eminentaj eminentuloj, precipe kiam ili estos videble okupitaj . . . sed ni daŭrigu serioze! Vi parolu; la afero estas via.

Peter Brown: Fraŭlino, mi petas, kie estas via hejmo?

Bianca Cintoli: Novkastelo. (*PETER BROWN gestas senespere.*) Ĉu mi ne plaĉas al vi, sinjoro? Fakte, mi ne loĝas en Novkastelo mem, sed en vilaĝeto najbara . . . sed nur la vilaĝanoj rekonas la nomon . . . Ĉu vere mi ne plaĉas al vi?

Peter Brown: Vi persone, bela fraŭlino, ne povus ne plaĉi al mi . . . sed nuntempe ni serĉas homojn, kiuj ne venas el Novkastelo.

Bianca Cintoli: Kaj 'omoj — — homoj . . . kiuj ne venas de proksime?

Elmer Fairfax: Se la afero tiel staras, mi timas, ke ankaŭ mi ne estos utila; ĉar mi venas el la centro de Novkastelo, kvankam, pro la konstanta malsano de mia patrino, mi ne povas ofte viziti la klubon. Mi povas ĉeesti la kongreson nur, ĉar mi lasis panjon ĉe mia onklino, dum mi faras grandan porkomercan vojaĝon . . . Sed kial Novkastelanoj ne taŭgas?

Peter Brown: Ĉar tiu sinjorino kaj mi estas ankaŭ Novkastelanoj, kaj tiu ĉi bona sinjoro, Nils Jakobsson

Jakob Nilsson: Pardonu min, sinjoro Brown, Jakob Nilsson.

Peter Brown: Pardonon! Ho, tiuj svedaj nomoj! — — Nu, tiu ĉi bona sinjoro volas aŭskulti konversaciojn inter homoj el kiel eble plej diversaj landoj, pro (*JAKOB NILSSON gestas sekrete*) . . . e, pro speciala celo.

S-ino Morel: Do, sendube kelkaj kongresanoj ne venis el Novkastelo. Mi uzu mian voĉon denove! (*PETER BROWN invitas BIANCA CINTOLI sidiĝi apud li. Ŝi sidiĝas.*) He, sinjoro! (*Bruo de falantaj libroj aŭdiĝas.*) Ho ve! (*Post momento, JAROSLAV SIMÁČEK envenas kun brakopleno da libroj.*) Ĉu mi surprizis vin, samideano? (*Helpas lin demeti la librojn sur la tablon.*)

Jaroslav Šimáček: Estas nenio, sinjorino . . . ho, dankon.
Mi portas tiujn al la librovendistoj, kaj mi penis porti tro multajn samtempe. Ĉu mi povas servi vin?

Peter Brown: Jes, sinjoro; kie troviĝas via hejmo?

Jaroslav Šimáček: En Novkastelo . . . (*Ĉiuj gestas senespe-re.*)

Peter Brown (pugnobatante la tablon): Diablo!

Jaroslav Šimáček: Kiel mi misfaris aŭ misdiris? Ĉu vi ne aprobas, ke ni penu vendi niajn librojn?

S-ino Morel: Ne, ne — — vi faris nenion ajn malbonan, kaj ni pardonpetas; sed ni serĉas homojn el diversaj landoj, kaj la hazardo ĉiam prezentas homojn el Novkastelo . . . Sinjoro Nilsson, se vi volas fari esplorojn pri Esperanto, mi plej volonte prezentos vin al nia honora prezidanto, doktoro Edmond Privat. Li povos multe helpi vin, ĉar li havas profundan scion pri la historio de la movado kaj la lingvo. Ankaŭ li estas tre bonkora kaj afabla, kvankam li estas tiel altestiminda korifeo — — li tute ne estas moŝteca.

Jakob Nilsson: Mi ne komprenis absolute ĉiun vorton, sed mi tre dankus al vi, se vi prezentus min al tiu doktoro Privat.

Bianca Cintoli: Ĉu vi vere konas doktoron Privat, sinjorino?

S-ino Morel: Jes, tre bone. Mi estas amikino de la tuta familio.

Bianca Cintoli: Mi dufoje aŭdis liajn prelegojn, kaj ege admiras lin.

Peter Brown: Ankaŭ mi envias vin pro tia amikeco.

S-ino Morel: Jes, mi tagmanĝas kun li sufiĉe ofte.

Elmer Fairfax: Sed kiel tio povas okazi?

Jaroslav Šimáček: Mi tute ne vidas la eblon.

S-ino Morel: Ej, sinjoroj, mi ne kutimas mensogi.

Elmer Fairfax: Mi ne volis ofendi, sed ĉu vi ne loĝas en Novkastelo?

S-ino Morel: Jes, jes.

Elmer Fairfax: Do, kiel vi povas ofte viziti doktoron Privat?

S-ino Morel: Mi povus trovi lian hejmon kun bandaĝitaj okuloj!

Bianca Cintoli: Mi tute ne komprenas. Ĉu vi?

Peter Brown: Ne.

Jaroslav Šimáček: Nek mi!

(*Intelekta lumo subite envenas la menson de ELMER FAIRFAX. Li elpoŝigas kaj foliumas sian kongreslibron.*)

Elmer Fairfax: „Doktoro Edmond Privat, Evole 3, Neuchâtel, Svislando.“ Nun mi komprenas! Vi, sinjorino, venas el Neuchâtel, Svisujo, apud tiu belega lago. Kaj kompreneble, vi esperantigis la urbonomon kiel *Novkastelo*.

S-ino Morel: Jes, mi estas Madeleine Morel, el Neuchâtel.

Elmer Fairfax: Kaj mi estas Elmer Fairfax el Newcastle, Wyoming, Usono.

Jaroslav Šimáček: Kaj mi venas el Nové Hrady, kies nomo ankaŭ signifas *Nova Kastelo*.

Elmer Fairfax: Kie troviĝas Nové Hrady?

Jaroslav Šimáček: En Ĉeĥoslovakujo — en Bohemio, proksime al la aŭstra landlimo. Mi estas Jaroslav Šimáček.

Peter Brown: Ho, kaj mi plendis pri svedaj nomoj! Sed ĉeko estas multe pli terura!

Jaroslav Šimáček: Miaj amikoj nomas min Jarĉjo, kaj mi ne estas ĉeko, mi estas ĉeĥo, iom pli solida!

Peter Brown: Ŝajnas ke nur tiu ĉi belulino kaj mi venas el mia Novkastelo. Mi estas anglo — Peter Brown — kaj venas el Newcastle-on-Tyne — — tio estas, ĉe la Tajno.

S-ino Morel: Ha, jes, mi aŭdis pri la urbo de ŝipoj kaj karbo.

Peter Brown: Do, fraŭlino, ni du aŭtentikaj Newcastle-anoj devos subteni unu la alian, ĉu ne? Ni aranĝos postkongresan renkonton por priridi tiun ĉi komikan koincidaĵon.

Bianca Cintoli: Mi bedaŭras, ke ne. Mi loĝas apud Castelnuevo en Italujo, kaj mia nomo estas Bianca Cintoli.

Peter Brown (ridante ĝis li devas viŝi la okulojn kaj anheli): Ho, sinjoro Jakobsson, pardonu min, sinjoro Nilsson, vi jam bone provis la lingvon, ĉu ne? Vidu, kvin homoj el malsimilaj landoj interparolis, kaj tiel perfekte komprenis unu la alian, ke ili kredis, ke ili estas samlandanoj!

S-ino Morel: Nur ĉar ni ĉiuj estas tiel fervoraj esperantistoj, ke ni inklinas esperantigi ĉion eblan, eĉ kiam estus eble pli bone ne fari.

Jakob Nilsson: Kaj tiu ĉi provo jam tiom impresis min, ke mi volas vere esperantigi min mem kaj helpi la movadon.

Elmer Fairfax: Hura!

Peter Brown: Estu do, estonte, nia samideano Jakob Nilsido!

Jakob Nilsson: Dankon pro la baptito; nun mi invitas vin kaftrinki kun mi por dece festi la okazon.

LA KLUBA BIBLIOTEKO

PERSONOJ:

PAŬLINO, la kluba bibliotekistino, mezaĝa.

ALICO, klubanino, juna kaj beleta.

SCENO:

Angulo en loka Esperanta klubejo. Modere granda libro-bretaro kun multaj Esperantaj libroj. Ligna tablo kaj du-tri lignaj seĝoj. Afiŝtabulo ie, kun bela Esperanta afiŝo kaj kelkaj oficialaj informoj, personaj afiŝetoj k. t. p.

PAŬLINO sidas ĉe la tablo kaj zorge kontrolas la kluban librostokon, helpate per registro kaj sliparo; la enhavo de la unua breto nun kuŝas sur la tablo. PAŬLINO paroletas al si mem.

Paŭlino: Applebaum: JOZEFO. Palblua kovrilo. Jozefo, Jozefo, kie vi estas? Ĉu vi forkuris en Egiptujon? Ho, jen ĝi. (*Apartigas libron.*) Auld: ESPERANTA ANTOLOGIO. (*Serĉas en kajero.*) Jes, kiel mi kredis . . . Petro legas ĝin. Tiu studento estas tre bona junulo — ĉiam poeziema. Auld: LA INFANA RASO. Jen. (*Apartigas libron.*) Auld kaj Rossetti: ANGLA ANTOLOGIO. Kie ĝi estas? (*Serĉas en kajero.*) Ho, Emilio nun uzas ĝin por prepari deklamadon en la jarkunveno. Baghy: LA VERDA KORO. VIKTIMOJ. SUR SANGA TERO. SONGE SUB POMARBO. Bone. Bone. Bone. Bone. (*Formetas kvar librojn kaj markas en la registro.*)

Baudelaire: LA FLOROJ DE L' MALBONO. Johano legas ĝin . . . ho, ne, li jam redonis ĝin. (*Apartigas la libron.*) Boulton: KVARPIEDA KAMARADO. (*Serĉas ĉie.*) Ne. (*Serĉas en la kajero.*) Ne. Sendube la kamarado

formarŝis sur la kvar piedoj. Mi devos peti pri konfeso! (*Skribas en notlibreto.*) Kaj kie estas Butler: KLASIFO de ESPERANTAJ TEMOJ? Estas ĉefe mi mem, kiu uzas ĝin. Ho, jen ĝi. Bone. Jen ŝirita kovrilo; vere, mi bedaŭras, ke ni ne povas tuj bindigi tiujn paperajn eldonaĵojn; mi penos ripareti ĝin. (*Apartigas libron.*) Fi, malpurulaĉo kiu lasas gluecajn bonbonpaperojn en libroj! Tio verŝajne estas Francisko; li ĉiam maĉas ion. Kiel bovo! Bone. Bone. Bone. Kion LETEROJ de ZAMENHOF faras ĉi tie inter la B'oj kaj C'oj? — Eble nia Anjo kapablas ortografii Zamenhof, eĉ komencante per B; post kelkaj ŝiaj ekzercoj, mi ne mirus. — Kie troviĝas la malfeliĉa vidva volumo? — Mirinde! en la ĝusta loko! (*Metas la alian volumon sur la lastan librobreton. ALICO envenas. Ŝi ĉirkaŭrigardas kun miro.*) Bonan vesperon, Alico; kion vi deziras?

Alico: Sed, Paŭlino, ĉu ne estas kunveno hodiaŭ?

Paŭlino: Ne; ĉu vi ne vidis sur la kluba programo: „Nenia Kunveno“? — Ni decidis pri tio, pro la muzikfesto en la urbo, en kiu sufiĉe multaj niaj anoj intencis partopreni.

Alico (*pli malgaje ol oni atendus pro tia bagatelo*): Ho. (*Iras al la afiŝtabulo kaj rigardas la programon, poste parolas deprimate*): Jes. Vi pravus. Ĉu estas mesaĝo por mi? — „Venu al Frostavallen!“ — Jes, tion mi ŝatus fari, sed nuntempe mi havas nur pencon kaj duonon je la fino de la semajno. (*Laŭtleĝas kun melankolia amuzo.*) „Mi urĝe petas, ke la kanajla, fripona, triviala, egoisma, fia, aĉa porkego kiu ŝajne enpoŝigis mian poŝvortaron redonu ĝin TUJ“. — Tre taktoplana peto, ĉu ne? (*Pli ĝoje.*) Jen noto por mi! (*Prenas ĝin kaj legas.*) „Kara Alico, bonvolu alporti mian EL LA MANIKO al la venonta kunveno. Ĉiam via Marinjo.“ Nur pri libro.

(*Forlasas la afiŝtabulon kaj vagadas en la ĉambro malgaje.*)

Paŭline (*amikece*): Ĉar ne estas kunveno, mi kaptos la okazon kontroli la stokon en la kluba biblioteko. Ĉu vi volas helpi min dum horeto?

Alico: Ne, mi foriros! Mi iros hejmen . . . ne, kial? — Jes, mi helpos vin; kion alian mi faru? (*Sidiĝas ĉe la tablo, kun komika-kortuŝa manko de entuziasmo.*) Kiel mi helpu vin?

Paŭlino: Se vi povus trovi la librojn, dum mi diros la nomojn, tio tre simpligus mian taskon.

Alico: Jes, mi kapablas fari tion.

Paŭlino: Carolfi: PREGARETO.

Alico: Jes.

Paŭlino: Carlsson: SVEDA POEMARO.

Alico: Jes.

Paŭlino: Daŭdet: LETEROJ EL MIA MUELEJO.

Alico: Kia ĝi estas?

Paŭlino: Ho, tute videbla, ne broŝureto . . .

Alico: Mi ne vidas ĝin.

Paŭlino: Do, eble ĝi mankas! (*Prinotas ĝin en sia registro. ALICO ekflaraĉas ploreme; PAŬLINO rigardas ŝin sciivoleme-simpatie.*) Dedijer: BIOGRAFIO DE TITO. Modere granda libro.

Alico: Jes, jen ĝi.

Paŭlino: Dickens: BATALO DE L' VIVO.

Alico: Jes.

Paŭlino: Doroŝevic: ORIENTAJ FABELOJ. Malgranda.
(ALICO denove ekflaraĉas, kaj penas ne plori.) Alico,
io malgajigis vin, ĉu ne? Ĉu mi povas helpi vin?

Alico: Ne.

Paŭlino: Laŭ via deziro; mi ne volas ŝovi la nazon en fremdan vazon. Engholm: AL TORENTO. (ALICO ekplogras.) Nu, mi ne ordonis al vi fari torenton! Kio estas, Alico?

Alico: Estas nenio . . . nur Karlo . . . mi kredis, ke eble mi renkontus lin ĉi tie . . . hodiaŭ . . . aŭ almenaŭ li lasus mesaĝon por mi . . .

Paŭlino: Elkraĉu la tuton, kara mia! Ĉu io estas malbona en via rilato? Mi kredis, ke vi kunestas preskaŭ ĉiuvespere.

Alico: Ni kverelis terure antaŭ semajno!

Paŭlino: Kiel bedaŭrinde!

Alico: Mi kulpis. Li volis iri al la kinejo, ĉar li estis laca; kaj mi volis promeni, ĉar mi sidadas dum mia laboro; kaj iel ni koleriĝis, kaj mi diris, ke li estas egoisma . . . kaj ankaŭ mi estas egoisma

Paŭlino: Kiel ĉiuj ni eraremaj homoj!

Alico: Mi atendis, atendis, ĉu li telefonos min ĉe la oficejo; skribos al mi; serĉos min ie; mi tute volas paciĝi kun li sed knabino ne devas ĉasi knabon, ĉu? Mi ne scias, ĉu skribi al li . . . eble mi ne kuraĝas . . . kaj mi esperis, ke hodiaŭ vespere mi dece havos la okazon paroli kun li . . . sed li ne eĉ lasis mesaĝon . . . mi kredas, ke li ne volas repaciĝi !

Paŭlino (simpatie): Kaj vi ankoraŭ amas lin, ĉu ne?

Alico: Jes.

Paŭlino: Li ja ŝajnas al mi aminda junulo, kaj mi konfesas, ke mi esperis, ke via amo sukcesos. Esperantistaj geedziĝoj estas tiel bonaj por nia propagando! — Sed ne pro propagando vi deziras revidi lin, kaj viaj esperoj ne estis nur pri Esperanto, ĉu?

Alico: Kion mi devas fari?

Paŭlino: Tiom da malsukcesaj homoj estas pretaj konsiliajn kiel aranĝi la vivon, ke mi hezitas facilanime konsili. Via vivo estas via vivo. Se mi nur povus helpi vin Mi kredas, ke tio estas nur stulta, forgesbla kverelo . . .

Alico: Jes, ankaŭ mi kredis tion dum tri tagoj; sed kiam li tute ne kontaktiĝas kun mi . . . ŝajnas, ke li ne volas

Paŭlino: Ĉu eble li estas for de la urbo? — Ne; tio ne malhelpus, ke li skribu leteron. Malsana, eble? aŭ neordinare okupita . . . Alico, ne miskomprenu min; mi ne volas bagateligi vian ĉagrenon; sed mi ne certas, kion vi devus fari; kaj vi ne certas. Mi proponas, ke vi helpu min pri la biblioteko, kaj kiam la tasko estos finita, vi venu hejmen kun mi, kaj ni komforte preparolos ĉion.

Alico: Vi estas ĉiam tre bonkora kaj simpatia, Paŭlino!

Paŭlino: Ej, mi dum multaj jaroj estas la konfespatriino de la klubo! Pri multaj knaboj, mi dirus: „Ek for, kaj feliĉa perdo!“ Sed via Karlo estas simpatia junulo, kaj mi kredas, ke vi povus feliĉigi unu la alian.

Alico: Mi helpu vin pri la libroj; estas ja bone havi ian okupon.

Paŭlino: Do: ek. Engholm: INFANOJ EN TORENTO.

Alico: Jes.

Paŭlino: Forge: ABISMOJ. Ĉu vi konas ĝin?

Alico: Ne. Jen ĝi?

Paŭlino: Sufiĉe bona libro — sed eble vi pli konsilinde ne legos ĝin nuntempe. Goethe: FAŬSTO I.

Alico: Jes. — Rigardu; jen kombileto en la libro!

Paŭlino: Ho, oni trovas la plej strangajn forgesitaĵojn kaj forlasitaĵojn en bibliotekaj libroj. Mi ne scias, kiel fritita terpompeco iam troviĝis inter la paĝoj de libro, sed eĉ tion mi iam trovis! — Malpura porko! — Sed mi oftege trovas kovertojn, leterojn, ekzercojn, harpinglojn, ŝnuretppecojn . . . la leganto volas memorigi sin pri la paĝo, kaj poste forgesas pri la memorigilo . . . Hohlov: LA TAJDO.

Alico: Jes.

Paŭlino: Ignotus: AMO EN LA JARO DEKMIL.

Alico: Jes.

Paŭlino: Kabe: UNUA LEGOLIBRO.

Alico: Mi ne vidas ĝin. Ho jes; jen ĝi; bela reaperolo!

Paŭlino: Kalocsay: STREĈITA KORDO.

Alico: Jes . . . Ho ve, ĝi estas terure surskribaĉita!

Paŭlino (*rigardante la libron*): Tiu manskribo estas de Johano! Li sentas neforigeblan emon malbeligi librojn, pri-notante la neologismojn! Kalocsay: LINGVO, STILO, FORMO.

Alico: Jes.

Paŭlino: Kalocsay: RIMPORTRETOJ.

Alico: Ne.

Paŭlino: Malgranda libro.

Alico: Ne, mi vere ne vidas ĝin. (PAŬLINO *markas en la registro.*)

Paŭlino: Kalocsay: EZOPA SAĜO, la famaj fabloj.

Alico: Mi ne vidas ĝin. Kiel ĝi aspektas?

Paŭlino: KOKO-libro — unu el tiuj libroj bone binditaj, grizaj, tre belaj.

Alico (*montrante tian libron*): Tia?

Paŭlino: Jes. Sed ĝi estas de Szilágyi: MISTERO MINORA. Legu ĝin iam — tre bona detektivromano, originala en la vera senco de la vorto. Sed kie estas EZOPA SAĜO? (*Serĉas en la kajero.*) Ho, mi surpriziĝas . . . Leono havas la fablojn. Eble ĉar li estas besto! . . . Kivi: SEP FRATOJ.

Alico: Ŝajne iu fiulo tetrinkis super ĝi kaj renversis la tason!

Paŭlino: Mi surmetos paperan kovrilon. Kurzens: MIA SPEKTRO.

Alico: Mi ne vidas ĝin. Ĉu ĝi estas historio pri fantomoj?

Paŭlino: Ne, bonega poemaro — malgranda flava libro. Li perfekte verkas pri malfeliĉa amo.

Alico: Ho jes, jen ĝi . . . eble mi devus tuj prunti ĝin!

Paŭlino: Lapenna: RETORIKO.

Alico: Jes. — Ankaŭ tiu ĉi ŝajnas iom malpura. (*Dum ŝi trarigardas ĝin, letero elfalas. Ĝi estas tre pura, kaj aŭfrankita. ALICO prenas ĝin.*) Ankoraŭ sigelita! (*Turnas la leteron kaj spiras spasme.*) Al mi! — De li! Paŭlino, kio tio povas esti? De Karlo — al mi . . . en la biblioteka RETORIKO — kun poŝtmarko . . . ne sendita . . .

Paŭlino: Mi sugestas, ke se la letero estas adresita al vi, la leĝoj de la honoro permesas, ke vi malfermu ĝin, kaj eĉ legu ĝin.

Alico: Jes. Vi pravas. Ne, mi timas. Jes, mi devas legi ĝin.
Ne, eble li koleras. Mi legos ĝin! (*Malfermas la leteron per harpinglo.*)

Paŭlino: Ĉu mi foriru dum momento?

Alico (*legante*): Ne . . . ne. Karulo! Aŭskultu, Paŭlinjo:
„Karega Alico, mi vere ne scias, kion diri al vi. Mi eĉ
trafoliumis RETORIKON, serĉante helpo pri trafa
esprimado; sed ĉar vi ne estas publika kunveno, ĝi ne tre
helpis min. Kara Alico, ni du kverelis pri bagatelo. Mi
estis malbonhumora, kaj mi kulpis, ne vi. Mi hezitas vi-
ziti vin, ĉar mi ne certas, ke mi estos bonvena post mia
maltaŭga konduto; sed kara Alico, mia plej kara, se vi
pardonas min, bonvolu telefoni min kiel eble plej baldaŭ.
Mi ankoraŭ amas vin, kaj esperas ke ni povas forgesi kel-
kajn malsaĝajn vortojn. Ĉiam via, Karlo.“ — Paŭlino!
(*Forte ĉirkaŭbrakas sian amikino.*)

Paŭlino: Mi tre ĝojas. Ej, ej, mi ne estas Karlo!

Alico: Ne, sed mi devas tuj ĉirkaŭbraki iun! Ho, povus esti
vi, aŭ Kurzens, aŭ Lapenna mem! Sed kiel la letero
kaŝis sin tiel?

Paŭlino: Mi kredas, ke li volis enpoŝtigi ĝin survoje ĉi-tien,
kaj, sendube pro emocio, forgesis ĝin. Oni ja povas tiel
fari!

Alico (*tre laŭte kaj urĝe*): Kie estas la plej proksima tele-
fonejo? (*Forkuras.*)

Paŭlino (*kun indulgema rideto*): „Ho, mia kor', ne batu
maltrankvile!“ — Mi malofte bedaŭras, ke mi ne plu
estas juna . . . Ŝi amu, mi laboru. Lapenna: AKTUALAJ
PROBLEMOJ Do, jen unu solvita!

(*Rapida kurtenfalo.*)

LA SONGO DE LA KURSGVIDANTO

Al d-ro Ivo Borovečki, kiu inspiris min verki tiun ĉi dramon.

PERSONOJ:

RIGARDANTOJ 1, 2, 3

kaj aliaj RIGARDANTOJ laŭ la disponebla personaro.

RIGOR, juĝisto.

SEVER, juĝisto.

LA PROKURORO, granda, forta viro, potenca oratoro.

LA DEFENDA ADVOKATO, malgranda museca viro.

LA AKTISTO

DU POLICANOJ

LA AKUZITOJ: NENJO NEN

FREJA FRESO

KARLO KROK

BLINDA BURĜO

FRANCESO FLIRT

LA KURSGVIDANTO (aŭ KURSGVIDANTINO)

SCENO:

Se oni uzas kurtenon, la KURSGVIDANTO parolas antaŭ
la kurteno. Se ne, li povas paroli antaŭ la scenejo mem. La
sceno prezentas terorrĝiman tribunalon. La reĝisoro uzu
sian fantazion por sugesti ion solenan kaj timigan, tamen
memorante, ke ĉio estas songo kaj ŝercafero. Altaj sidlokoj,
kiel eble plej imponaj, por la du JUĜISTOJ; esperantaj
flagoj; super la kapoj de la JUĜISTOJ troviĝas la vortoj:
JUSTECO SUB LA STELO, EĈ SE FALOS LA ĈIELO.
Sidloko por la PROKURORO apud la JUĜISTOJ; aku-
zitejo; sidloko por la DEFENDA ADVOKATO apud la
akuzitejo; sidlokoj por la RIGARDANTOJ.

LA KURSGVIDANTO aperas antaŭ la kurteno, en piĝamo
kaj noktsurtuto. Li parolas kvazaŭ en songo aŭ deliro.

Mi sonĝis . . . mi sonĝis dum nokto malpaca . . . kuŝiĝis tre laca . . . jen, jen en la kapo nebulo kaj nubo . . . ho ve, nia klubo! Mi luktis dum jaroj . . . kontraŭ stultaj eraroj . . . kun ofta korpasmo pro malentuziasmo. La lernantoj ne brilas . . . kaj tro krokodilas. Ho fil' verdaj vivoj sen akuzativoj! Ho, stelportantoj sed duonmortantoj! Mi sonĝis pri teroro . . . jes, verda diktatoro . . . pri vigla forrabotado de ĉiu sabotado . . . por la bono de l' movado. La sonĝ' estis kruela . . . sed ho, por mi tre bela . . . !

(Li subite parolas al la aŭdantaro pli decideme.)

Jes: mi sonĝis dum febra nokto; mi sonĝis pri la Revolucia Tribunalo de Esperantujo; kaj nun vi vidos mian sonĝon.
(Foriras.)

(La kurteno leviĝas. LA RIGARDANTOJ, en kiel eble plej strangaj kaj diversaj kostumoj, envenas kaj rapidas al sidlokoj, parolante unu al la alia.)

Rigardanto 1: Ĉu ni havos multajn akuzitojn hodiaŭ?

Rigardanto 2: Mi kredas, ke jes; la verda polico ĉeestis la lastan klubkunvenon.

Rigardanto 1: Kiuj estos la juĝistoj hodiaŭ?

Rigardanto 2: Rigor kaj Sever, eble la plej timataj.

Rigardanto 3 (naŭva junulino): Mi neniam ĉeestis tian proceson antaŭe; ĉu ĉiuj akuzitoj tie ĉi estas fuŝesperantistoj?

Rigardanto 2: Jes, samideanino, aŭ eble malamikoj de Esperanto; ĉar tie ĉi troviĝas nia Revolucia Tribunalo, starigita por batali kontraŭ la Fuŝistoj kaj la Oponantoj.

Rigardantoj: Morton al la Fuŝistoj! Morton al la Malverduoj!

krokodili: paroli nacilingve inter esperantistoj.

Rigardanto 3: Ĉu la procesoj tie ĉi estas tedaj vortinundaj aferoj, kiel kutime?

Rigardanto 2: Ne; tie ĉi oni faras justecon, rigore kaj rapide, sen juristaj sofismoj.

La aktisto (envenante): Silentu, gesamideanoj, pro la Verdaj Juĝistoj!

(Fanfaro aŭdiĝas, se eble, aŭ iaspeca solena muziko. Ĉiuj stariĝas. RIGOR kaj SEVER envenas el la du flankoj, renkontiĝas, manpremas, sidiĝas. La PROKURORO kaj DEFENDA ADVOKATO envenas kun dokumentoj. RIGOR geste permesas al ĉiuj sidiĝi. La AKTISTO kontrolas siajn dokumentojn.)

Rigor: Ĉu ĉiuj bezonataj personoj ĉeestas? *(Ĉirkaŭrigardas.)*
Jes. Ĉu ni komencu?

Sever: Tuj.

Rigor: Aktisto, voku la unuan akuziton.

Aktisto: Alkonduku Nenjon Nen, la akuzitinon!

(Du verdaj POLICANOJ alkondukas kaj starigas en la akuzitejon NENJON NEN, junan komencantinon. Sia hararo estas taŭzita; ŝi estas tre pala; ŝi tremas.)

Rigor: Prokuroro, vi rajtas paroli.

Prokuroro (ekstarante; tre rapide parolas): Hieraŭ vespere, en la Klubejo en Sirakuza Strato, la akuzitino, Nenjo Nen, forgesis tridekdu akuzativojn, dum ŝi parolis kun sia kuzino pri la akuŝo de la onklino; kaj ĉar la akustiko estis bona, ŝia voĉo akuta, ŝi ŝiris ĉies orelojn.

Rigor (ĝentile): Prokuroro, ĉu vi afable povus paroli iom

malpli rapide? Mi ankoraŭ ne certas, ĉu vi akuzas ŝin pri akuzativoj, akustiko aŭ akuŝo?

Prokuroro: Pardonu min, via Juĝista Moŝto; mi ripetos. (*Ripetas la akuzon multe malpli rapide. Sidiĝas.*)

Nenjo Nen (kriegante): Kompatu mi! Kompatu mi!

Rigor: Defenda Advokato, ĉu vi povas diri ion por mildigi la punon de via kliento?

Defenda Advokato (ekstarante): Pri punkto de proceduro, via Juĝista Moŝto: oni ankoraŭ ne demandis, ĉu mia klientino estas kulpa aŭ ne kulpa.

Rigor: Via klientino jam pruvis sian kulpecon.

Nenjo Nen: Ho, kompatu mi! Ne mortpafu mi! Mi studos la gramatiko! Mi studos la gramatiko! Mi reformos mi!

Rigor: La tuta kortumo aŭdas.

Defenda advokato: Jes, mi aŭdas; kaj tial, mia sola defendo de mia mizera klientino devas esti, ke ŝi estas komencantino.

Rigor: Ĉu eterna, aŭ aŭtentika, valida komencantino?

Defenda advokato: Dekmonata.

Rigor: Tial ŝi ne meritas la mortopunon.

Nenjo Nen: Ho, danko! Mi tre dankas vi!

Rigor: Silentu, krimulino! Aktisto, skribu la decidon de la kortumo: La kulpulino Nenjo Nen estos malliberigita en kelo, kun elektra lampo kaj adekvata stoko da gramatikaj libroj, ĝis ŝi povos montri al la kontrolisto plenan komprenon pri la akuzativo. Dieto: akvo, pano, butero, terpomoj kaj napoj. Korespondado permesita; elirantaj

leteroj cenzuritaj. Kulpulino, la dato de via plena liberigo restas en viaj propraj manoj. Forkonduku la kulpulinon. (*La POLICANOJ komencas fortreni NENJON NEN, kiu baraktas kaj kriegas.*)

Nenjo Nen: Kompatu mi!

Rigor: Kulpulino Nenjo Nen, unu tago da vere serioza studado klarigos al vi la aferon, kiun vi neglektas kaj fuŝadas. Vi povos liberiĝi post maksimume unu semajno. La kortumo, pensante pri via juneco kaj komencanta grado, punas vin tre milde.

Nenjo Nen: Tio signifas mia tuta vivo! Mia tuta vivo! (*La POLICANOJ fortrenas ŝin.*)

Rigor: Alkonduku la duan akuziton! (*La POLICANOJ envenas kun FREJA FREŜO. Si estas mezaĝa, kaj nun aspektas taŭzita, malbonorda, timoplena. Kiam la POLICANOJ penas starigi ŝin en la akuzitejo, ŝi duone kolapsas kaj restas en groteska pozo.*)

Sever: Prokuroro, vi rajtas paroli.

Prokuroro (ekstarante): La akuzitino, Freja Freŝo, diradis dum multaj jaroj, ke ŝi estas esperantistino, sed nia polico ĵus kontrolis ŝian dosieron, kaj trovis ke: unue, ŝi neniam pagis kotizon al U. E. A. aŭ eĉ al la landa asocio; due, ŝi kutime portas verdan stelon, sed se iu alparolas ŝin Esperante sur la strato, ŝi ĉiam respondas: „Don't you speak English?"; trie, ŝi ne abonas iun ajn esperantan gazeton kaj neniam aĉetas esperantajn librojn; kvare, ŝi iris al la klubejo por ĉiuj societaj vesperoj aŭ festmanĝoj, sed malĉeestis por prelegoj kaj aferkunsidoj. (*Sidiĝas.*)

(*La RIGARDANTOJ diversmaniere montras konsternon kaj malaprobon.*)

Don't you speak English: ĉu vi ne parolas angle. (Oni enigu la lingvon de la lando)

Sever: Akuzitino, ĉu vi estas kulpa aŭ ne kulpa?

Freja Freŝo (malforte): Kulpa pri ĉiuj punktoj.

Sever: Defenda Advokato, ĉu vi povas diri ion por helpi vian klientinon?

Defenda advokato (ekstarante): Via Juĝista Moŝto, dum tri monatoj de la nuna jaro mia klientino estis malsana. Mi povas montri kuracistajn atestilojn. (Sidiĝas.)

Sever: Prokuroro, ĉu la krimoj de la akuzitino rilatas nur al la nuna jaro?

Prokuroro (ekstarante kun dokumentoj): Ne, via Juĝista Moŝto, sed al la lastaj tridek jaroj. (Sidiĝas.)

Sever: Aktisto, skribu la decidon de la kortumo. La kulpu-lino Freja Freŝo estos sendita, en katenoj, al la oficejo de la Centro de Esploro kaj Dokumentado.

Freja Freŝo (kriegante): Ne, ne! Ne tien!

Sever: Kaj tie ŝi faros punlaboron dum ses monatoj. Dieto: pano, akvo, supo kaj ankaŭ kafo laŭ bezono.

Freja Freŝo: Sinjoro Juĝisto! Mi estas maljuna, malsana! Ne sendu min al Centro de Esploro kaj Dokumentado! Ĉiuj scias, ke eĉ por fortika persono ses monatoj tie estas preskaŭ certa morto, pro troa laboro! Sinjoro Juĝisto . . . !

(FREJA FREŜO svenas kaj la POLICANOJ senceremonie forportas ŝin.)

Rigardanto 3: Kio estas la Centro de Esploro kaj Dokumentado?

Rigardanto 2: La plej timata laborejo en la tuta movado. Multaj jam mortis tie.

Sever: Alkonduku la trian akuziton! (La POLICANOJ alkondukas KARLON KROK. Li aspektas pala kaj senespera.)

Rigor: Prokuroro, vi rajtas paroli.

Prokuroro (ekstarante): Via Juĝista Moŝto, la jena kazo ne estas ordinara. La akuzito, Karlo Krok, krimis dum la lasta Universala Kongreso. Samideano denunciis lin; du bravaj verdaj policanoj, civilvestitaj, sekvis lin; li denove, pli grave, krimis. Kiam ili volis aresti lin, li forkuris. Ili sekvis lin tra diversaj landoj kaj urboj kaj kaptis lin antaŭ nur du tagoj. Li estas ege danĝera krimulo, multkrimulo, sabotisto kaj perfidulo; kaj mi esperas, ke li sange pagos sian krimon! (Sidiĝas, senspirigite.)

Rigor: Sed, Prokuroro, kio estas lia krimo?

Prokuroro (ekstarante): Mi pardonpetas, via Juĝista Moŝto; mia indigno forportis min. Sed mi vidas kelkajn junajn homojn tie ĉi, eĉ delikatajn junajn virinojn; mi ne volas tro ŝoki ilin. Ĉu via Juĝista Moŝto permesas, ke mi skribu la akuzon?

Rigor: Jes. (La PROKURORO skribas kelkajn vortojn kaj montras ilin al RIGOR, kiu tre ŝokiĝas. La PROKURORO sidiĝas.) Mi tamen ne povas silenti! Akuzito Karlo Krok, oni akuzas vin tiel: En Universala Kongreso, en la kongresejo mem, vi plurfoje parolis laŭte, nacilingve. (Ĉiuj JURISTOJ kaj RIGARDANTOJ kovras la vizaĝojn, RIGARDANTO 3 svenas; la aliaj prizorgas ŝin.) Ĉu vi estas kulpa aŭ ne kulpa?

Karlo Krok (senespere): Kulpa.

La Rigardantoj: Morton! Fil! Vel! Morton! Honton! Al la paforotol (kaj tiel plu.)

Rigor (post silentiga gesto): Defenda Advokato, ĉu vi povas diri ion, kio helpos vian klienton?

Defenda Advokato (ekstarante): Mia kliento konstatas, ke lia krimo estas nepardonebla; sed li humile petas, ke la kortumo indulgu lin, permesante al li adiaŭi sian maljunan patrinon. Ŝi atendas ekstere. (*Sidiĝas.*)

Rigor: Aktisto, skribu la decidon de la kortumo. La krimulo Karlo Krok estos tuj forkondukita kaj mortpafita. Li rajtas malfruigi la justecon de Esperantujo dum dek minutoj por adiaŭi sian patrinon. (*La POLICANOJ forkondukas KARLON KROK, kiu ĝemas.*) Alkonduku la kvaran akuziton! (*Nenio ajn okazas.*) Alkonduku la kvaran akuziton! (*Post paŭzeto.*) Defenda Advokato, ĉu vi scias ion pri via malfrua kliento?

Defenda Advokato (ekstarante): Fakte, via Juĝista Moŝto, mia kvara kliento rifuzis paroli kun mi. (*Ĉirkaŭrigardas.*)

Rigor: Do, eksidu. (*La DEFENDA ADVOKATO eksidas.*) Aktisto, iru kaj enketu kio okazis. (*La AKTISTO kliniĝas kaj eliras.*) La kortumo kaptos la okazon ripozi iomete. (*Kriegoj aŭdiĝas, luktobruo, battoj, protestoj. La AKTISTO revenas, kure.*)

Aktisto: La akuzito luktas. Li estas tre batalema. Li jam sangigis la nazon de policano. Ekstraj policanoj nun luktas kontraŭ li. Sed ili devigos lin veni tuj.

(*La du POLICANOJ trenkondukas BLINDAN BURGON en la akuzitejon. Li videble luktis. Li nun estas ligita per pezaj katenoj. La UNUA POLICANO premas jam ruĝan natzukon al sia nazo kaj rigardas la plafonon.*)

Sever: Ĉu la akuzito estas nun sekure katenita?

La unua Policano (tra nartzuko): Jes, via Juĝista Moŝto.

Sever: La kortumo permesas, ke vi foriru por lavi la vizaĝon.

La unua Policano: Mi tre dankas vian Moŝton. (*Militsalutas per la dekstra mano, ankoraŭ sekigante la nazon per la maldekstra, kaj foriras.*)

(*BLINDA BURGO furioze sed sensukcese luktas kontraŭ siaj katenoj.*)

La dua Policano: Silentu! (*Nova katenbruo.*)

Sever: Respektu la decon de la kortumo!

Blinda Burĝo: Mi ne agnoskas la aŭtoritaton de tiu ĉi kortumo!

Sever: Prokuroro, vi rajtas paroli. (*La PROKURORO ekstaras.*)

Prokuroro: La akuzito . . .

Blinda Burĝo: Mi ne agnoskas la aŭtoritaton de tiu ĉi kortumo!

Sever: Haltigu tiun gramofondiskon, aŭ mi ordonos, ke oni ŝtopu vian buŝon. Prokuroro, vi rajtas paroli.

Prokuroro: Tiu ĉi akuzito, profesoro Blinda Burĝo, ne estas esperantista sabotisto, sed rekta malamiko de Esperanto. (*Krioj de indigno kaj abomeno.*) En grava publika kunveno, li deklaris jene: Esperanto ne estas lingvo! (*RIGARDANTO 3 svenas denove. La JUGISTOJ kovras siajn vizaĝojn.*) Li deklaris, ke neniu ajn povus pere de ĝi verki poemojn, ke oni ne povus esprimi amon per Esperanto!

Blinda Burĝo: Kaj tio estas vera! Mi estas klera lingvisto, profesoro pri lingvoj! Mia fidinda lingvista instinkto certigas al mi, ke Esperanto ne estas lingvo! Tiu ĉi kortumo ne ekzistas! Vi ĉiuj malekzistas! Halucino iel trafis min;

aŭ mi sonĝas, kaj baldaŭ mi vekiĝos! Vi ĉiuj estas nur fantomoj! Esperanta kulturo ne povas ekzisti! Tia kulturo kontraŭus ĉiujn leĝojn de la lingvistiko!

(Finfine, la POLICANO sukcesas ligi tukon ĉirkaŭ la buŝon de la akuzito.)

Sever: Defenda Advokato, ĉu vi povas diri ion por helpi vian klienton?

Defenda Advokato (ekstarante): Via Juĝista Moŝto, mi respekteme proponas, ke la akuzito ne kapablas pledi, pro manko de cerba ekvilibro. Pro li, kvankam li ne kapablas instrukcii min, mi volas diri, ke li estas kulpa sed freneza. (BLINDA BURĜO faras bruaĉojn en la tukon. La DEFENDA ADVOKATO sidiĝas.)

Sever: Prokuroro, kion vi opinias pri tio?

Prokuroro (ekstarante): Mi estas preta akcepti la proponon de mia klera kolego. La akuzito neas la ekziston de realaĵoj, kaj tio estas akceptinda pruvo de frenezo. (Sidiĝas.)

Sever: Aktisto, skribu la decidon de la kortumo. La akuzito, Blinda Burĝo, ne kapablas pledi, pro frenezo. La kortumo ne punas frenezulojn, sed kompatas ilin. La verdikto estas: Kulpa sed freneza. La akuzito Blinda Burĝo loĝos en ŝtata frenezulejo, ĝis la mensa ekvilibro revenos. Li havos la helpon de spertaj kuracistoj kaj psikiatroj. Kaj la kortumo esprimas la esperon, ke oni sukcese kuracos lian mensan malsanon. Forkonduku la malfeliĉulon!

(La POLICANO forkondukas la akuziton, kiu ankoraŭ protestas en la tukon.)

Bonvolu revenigi vian kolegon, se lia nazo estas nun en bona ordo. Kaj alkonduku la kvinan akuziton!

Rigardanto 1: Ĉu vi fartas pli bone nun, kara mia?

Rigardanto 3: Jes, dankon, mi ne sciis, ke tiaj personoj ekzistas.

Rigardanto 2: Ne tro ŝokiĝu pro la maldecaj vortoj de kompatinda frenezulo.

(Ambaŭ POLICANOJ revenas, kondukante, ne tre severe, FRANCESON FLIRT. Si estas tre bela, ŝika, ĉarma junulino. Si envenas svingetante la postaĵon kaj ĉarme rideblas al ĉiuj. SEVER, surprizita, rigardas ŝin admire. RIGOR, kiu kontrolas dokumenton, dum momento ne vidas ŝin. Kiam li levas la kapon por paroli, ankaŭ li montras grandan surprizon.)

Rigor (tre severe): Prokuroro . . . (vidas la akuzitinon kaj daŭrigas tre milde) . . . e . . . vi rajtas paroli.

Prokuro (ekstarante): La akuzitino, Franceso Flirt — — —

Franceso Flirt (afable): Jes, jen mi.

Aktisto: Silentu!

Franceso Flirt: Ho, pardonon! (Ŝi ĵetas al la AKTISTO rideton tiel sorĉan, ke li devas subteni la koron per la mano.)

Prokuroro: La akuzitino, Franceso Flirt, multfoje malbonfaris al la reputacio de la movado per okulumado al multaj viroj, per publikaj kisoj kaj karesoj, aŭdeblaj amvortoj dum kongresoj, surstrataj ĉirkaŭbrakoj, kaj aliaj gestoj, faroj kaj vortoj kiuj malbone efikas ĉe la publiko. (Sidiĝas.)

Rigor: Akuzitino Franceso Flirt, ĉu vi estas kulpa aŭ ne kulpa?

Franceso Flirt (aplombe kaj ĉarme): Via Juĝista Moŝto, mi ja faris tiel; sed ĉu tiaj agoj estas malpermesitaj laŭ la leĝoj de Esperantujo?

Rigor (iom pli milde ol kutime): Ĉio estas malpermesita, kio malbonfaras al la reputacio de Esperanto. La akuzitino ŝajne volas konfesi sin kulpa. Defenda Advokato, ĉu vi povas diri ion por helpi vian klientinon?

Defenda Advokato (ekstarante): Via Juĝista Moŝto, mia klientino petas, pere de mi, la rajton pledi mem.

Sever (anhelante): Ho, ne permesu tion! Ne permesu!

Rigor: La justeco postulas, ke ŝi parolu se ŝi volas. Si parolu. (La DEFENDA ADVOKATO sidiĝas.) Akuzitino Franceso Flirt, vi rajtas paroli.

Franceso Flirt (parolas ĉarme kaj okulumas ĉiujn tre sen-aplombige): Viaj Juĝistaj Moŝtoj, mi ja konfesas, ke mi estas flirtema. Belaj viroj kaj spritaj viroj plaĉas al mi; mi estas karesema; mi ŝatas la artojn de la tualetoj kaj sinbeligo; en la sorĉa medio de Universala Kongreso mi eĉ pli ol kutime indulgas miajn naturajn inklinojn. Jes, tio ĉi estas vera, sinjoroj Juĝistoj. Sed ĉu fakte mi malbonfaras al la Esperanta movado? Mi havas tie ĉi, kaj montros al la kortumo, se vi deziros vidi, dokumentojn pri miaj servoj al la movado. En ŝipoj, trajnoj, aŭtobusoj, dancejoj kaj aliloke mi ĉiam kaptas la okazon paroli afable kun viroj. Ĝis nun mi tiel kaptis 1.234 apogantojn por U. E. A. (Senteblan silenton sekvas granda hura-ado.) Kelkajn mi devis kisi por gajni ilian apogon, la plimulton ne. Ĉiujare mi gvidas Esperantan kurson en mia urbo, kaj kutime mi tre sukcesas. Ĉi-jare 60 junaj viroj eklernis Esperanton, la lingvon de la espero. El ili 37 jam aniĝis al la movado. En internaciaj kongresoj, mi ĉiam penas montri al la pub-

liko, kiel afablaj kaj amemaj estas la esperantistoj. Kutime mi plensukcesas. En kafejoj kaj parkoj, dum kongresoj, viroj ofte demandas al mi kio estas Esperanto; kaj mi ĉiam penas varbi ilin, ofte sukcese.

Rigor: Ni vidu la pruvojn de viaj interesaj asertoj.

(FRANCESO FLIRT transdonas al li dokumentojn. Si tuŝetas lian manon, kaj li ekvibras kvazaŭ pro elektro, dum SEVER rigardas lin envieme. Si revenas al la akuzitejo kaj pudras la nazon zorge, dum RIGOR kaj SEVER kontrolas la dokumentojn.)

Rigor: Mi kredas, ke ni devas akcepti tiujn ĉi atestilojn. Aktisto, skribu la decidon de la kortumo. La akuzitino Franceso Flirt estas senkulpa kaj forlasos la kortumon kun absolute senmakula reputacio. La kortumo oficiale aprobas ŝian heroe energian laboron por Esperanto. Samideanino Flirt, vi rajtas foriri, senkondiĉe libera.

Franceso Flirt: Mi dankas vian Juĝistan Moŝton. (Foriras inter huraoj kaj aplaŭdoj. Kiam ŝi reprenas siajn dokumentojn, ŝi donas al RIGOR dankeman kison, kiu tre plaĉas al li, sed ne al SEVER.)

Rigor: Alvoku la sesan akuziton!

Aktisto: Via Juĝista Moŝto, la kortumo ne havas aliajn procesojn hodiaŭ.

Rigor: Bone do; la hodiaŭaj aferoj estas jam finitaj. Mi dankas al ĉiuj pro ilia valora helpo. (La JUGISTOJ kaj ĉiuj leviĝas.) Juĝisto Sever, ĉu ni tagmanĝu kune?

Sever: Mi dankas vin, sed mi devas resti tie ĉi dum mallonga tempo, por kontroli diversajn aferojn. Neniu ajn atendu min. (Ĉiuj foriris, escepte de SEVER kaj la du POLICANOJ; La POLICANOJ komencas rearanĝi la meblojn.

SEVER parolas konfidence al la DUA POLICANO.)
Policano! Mi bezonas gravan informon! (Kiam la POLI-
CANO alproksimiĝas, SEVER montras al li altvaloran
bankbileton.) Tio ĉi estos via, se vi rapide havigos al mi
la adreson, kaj, se eble, la telefonnumeron de la lasta
akuzitino.

La dua Policano: Tre bone, via Juĝista Moŝto. (Foriras.
SEVER eligas grandan vespiron.)

(Kurtenfalo.)

NOTOJ

Ĉe l' akvo de forgeso

Esperable la legendo de Orfeo kaj Eŭridiko estas parto de la mondkulturo; tamen, eble mallonga klarigo utilos al iu. Orfeo kaj Eŭridiko estis geedzoj, kiuj tre amis unu la alian. Kiam Eŭridiko mortis frue per serpentomordo, Orfeo tiel amis ŝin, ke li serĉis ŝin en Hadeso — la greka mondo de la mortintoj, ne necese punejo. Genia muzikisto, li tiel perfekte kaj kortuŝe ludis la liron, ke la reĝo de Hadeso, emociita, redonis la edzinon, nur sub la kondiĉo, ke Orfeo ne rigardu ŝin, ĝis ili denove estu sendube sur la Tero. Ĉe la limo inter la Tero kaj la subtera mondo, Orfeo, pelita de arda amo, rigardis Eŭridikon, kaj ŝi tuj remortis. Baldaŭ poste, kelkaj frenezaj aninoj de Bakho disŝiris Orfeon. Mi penis krei sekvaĵon kiu, same kiel la legendo, enhavas iom da morala signifo.

Leteo, rivero en Hadeso. Ĝia akvo donas plenan forgeson pri la tera vivo.

Stikso, alia rivero en Hadeso; la mortintoj devis transiri ĝin en la boato de Harono.

Pocio, trinkebla medikamento. (*Briquet*: Medicina Vortaro.)

La morto de Kabir

Kabir, kiu fondis la tre tolereman kaj paceman hindan religian grupon de la *Kabir Panthis*, naskiĝis en 1398. La bela legendo pri la metamorfozo de lia kadavro, kiam diversdevenaj disĉiploj kverelis, estas trovebla en diversaj libroj.

Nanak estis renoma disĉiplo de Kabir. Ne estas certe, ke ili fakte konis unu la alian persone; se jes, Nanak tiam ne estis pli ol knabo. Post multaj jaroj, pro longa persekutado, tiu milda kaj strange Zamenhofeca religio aliformiĝis al la batalema Sikhismo.

Ganĝo: La plej grava hinda rivero, sankta al ĉiuj hinduoj. Oni sin lavas en ĝi por forigi pekojn, kaj oni jetas la cindrojn de mortintoj en la riveron.

Porko: Por la islamanoj, kiel por la hebreoj, la manĝado de porkviando estas malpermesita; ili kredas la porkon tre malpura besto.

Eblis: La islama diablo.

Ŝiva, Kriŝna: Hinduaj dioj aŭ personigoj de la ecoj de Dio.

ENHAVO

	paĝo
Dediĉa letero al Julio Baghy	5
Antaŭparolo	7
Virino ĉe la landlimo, tragedio	9
Iluzio, komedio	24
Ĉe l' akvo de forgeso, poezia dramo	41
Vaka seĝo, tragedio	55
2060, fantazia dramo	72
Drasta kuracado, komedio	83
La morto de Kabir, lirika dramo	99
Liberiĝo, tragedio	111
La fremduloj, fantazia drameto por infanoj	127
Provludo en la klubejo, farso	141
Observu dieton! Skeĉo	155
Maneken-parado	160
La provo, kongresa interludo	165
La kluba biblioteko, dialogo	173
La sonĝo de la kursgvidanto, satira proceso	181
Notoj	195
Enhavtabelo	196